

EL POPOLA CINIO

中國藝道

12

1980



Sanjiang-ebenajo en Hei-longjiang-provinco de Ĉinio estas kovrata de vasta fekunda tero. En la 50-aj jaroj la ŝtato komencis starigi tie multajn farmejojn. La Farmejo Youyi estas unu el ili. Post 20 jaroj ĝi fariĝis meĥanizita farmejo. Ĉi-jare ĝi denove havis riĉan rikolton.

Fotoj de ZHANG WEI

La Farmejo Youyi




Maŝinisto

Rikoltado

Tritika kampo






Juna riparistino

Gui Tiren, tutlanda labormodelo kaj farmeja elektroinĝeniero




Aŭtomata sunumado



Malŝarĝado

Semado de sojfabo



Aŭtomata akvumado



Bone kreskan-
taj plantoj

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

Sportistino Fu Jinmei, gajninto de la ĉiuronda ĉampioneco de la virina altmonta skiado en la Tutlanda Skia Konkurso de 1980

Foto de WANG SHOULIANG

SUR LA DORSKOVRILO:

Sonorilaj floroj

Foto de REN SHIYIN

KOLORAJ SERIOJ:

La farmejo Youyi

Vintro de Songhua-rivero

Fotoj pri naturaj belaĵoj faritaj de E-istoj

(1) Restaĵo de la Domo de Akcelo de Industrio en Hiroŝima post eksplodo de la atombombo

(2) Pandoj de Guangzhou gastis en Japanio

Muzeo de Argilaj Militistaj kaj Ĉevalaj Figuroj de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

La Vizitgrupo de "Japana-Ĉina Amikeca Societo Esperantista" en Beijing

Nove trovitaj blankaj bestoj

Dancistino de Tang-dinastio

Foiro en Xinjiang

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de GUOJI SHUDIAN
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Enhavo

Disfloru nia kunlaboro	2
El mia kontakto 50-jara kun la ĉina Esperantujo	2
Sur la grasa grundo	3
De vi mi estas fore	9
NIA KULTIVEJO: Impreso pri la Universala Kongreso de Esperanto	10
Reveno de Vankuvero	12
Japanaj esperantistoj en Ĉinio	14
ESP-NOVAĴOJ	17
KURANTAJ AFEROJ	19
Memore al kamarado Eltunko	20
Mia kompetenta mentoro	22
Ĉinaj poemoj: Hejmen-reveno; Antaŭ forvojaĝo	23
TRA ĈINIO: Vojaĝo al Yangzhou	24
VIDINDAJ LOKOJ: Vintro en Jilin	26
KULTURAJ NOTOJ	29
En moderna laminatejo	30
Ĉiuj prizorgas sin	34
Travivaĵo sur la lago	36
Vojaĝo al la Orienta Insulo	38
Krakovo petas helpon	41
AMIKECO: Mi amas mian ĉinan patrinon	42
KALEJDOSKOPO	44
KARIKATURO	46
Humuraĵoj	47
KORESPONDI DEZIRAS	48
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Imperiestra gvardio antaŭ 2,100 jaroj	50
INDEKSO DE EPC 1980	53

Disfloru nia kunlaboro

AL nia alvoko en la n-ro 2 "VERKU POR EPC" varme respondis amikoj el Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Britio, Finnlando, Francio, FR Germanio, Italio, Japanio, Jugoslavio, Nederlando, Pollando, Rumanio, Svedio kaj Usono, per ensendo de poemoj, eseoj, anekdotoj, legendoj, humuraĵoj, rakontoj kaj eĉ originala romano. Iuj el la kontribuajoj jam aperis en EPC, aliaj atendas konvenajn tempon kaj lokon por publikiĝo. Ni kore dankas ĉiujn niajn kontribuintojn kaj al tiuj, kies verkojn ni uzis, ni jam sendis donacetojn, kiuj ne povas egali al la verkoj en valoro tamen montras nian sinceran dankon pro ilia laboro.

En traktado de la kontribuajoj, ni rimarkis, ke sufiĉe granda parto de ili estas tradukaĵoj, pri kies fideleco ni ne povas kontroli pro manko de la originaloj. Eĉ se ni estus ricevintaj

ilin, ni ne povus tion fari pro manko de scio de multaj lingvoj. Tial ni petas, ke en la estonteco oni ensendu al ni nur originalajn verkojn, escepte de aparte valoraj tradukaĵoj fidelaj en formo kaj enhavo.

La legantaro de nia gazeto troviĝas en ĉiuj partoj de la mondo kaj tre diversaj estas iliaj interesoj kaj gustoj. Estas malfacile verki artikolojn, kiuj povas plaĉi al ĉiuj. Ni esperas, ke la kontribuantoj elektos por si temojn interesajn al la ĝenerala publiko. Por ke EPC servu ankaŭ kiel ĝisdata informilo pri la internacia E-movado, ni petas ke oni ensendu al ni freŝajn informojn pri E-aktivadoj en diversaj lokoj. Ni bonvenigas ankaŭ recenzojn pri novaj Esperantaj eldonaĵoj.

Ni ŝuldas apartan dankon al la ensendintoj de koloraj fotoj

pri naturaj belaĵoj, el kiuj iuj geme brilas en niaj bildopaĝoj. En la venonta jaro ni aperigos ankaŭ fotojn pri la vivo kaj moroj de diverslokaj popoloj. Ni esperas, ke niaj fotartaj specialistoj kaj amatoroj ensendos al ni siajn valorajn verkojn kun lakonaj klarigoj. Kaj krome, ni petos la legantojn elekti tri plej bonajn el la aperontaj fotoj de tiu rubriko en la periodo 1981 kaj ni ilin premios.

Kun ĝojo kaj kontento ni vidas la plivastiĝon de nia kunlaboro kun eksterlandaj samideanoj. Ni esperas, ke ĝi disfloreos en 1981, kaj dank' al varma subteno de pli kaj pli multaj amikoj eksterlandaj EPC fariĝos ĉiam pli bela kaj riĉenhava kaj faros pli grandan kontribuon al nia komuna afero.

La Redakcio

NILO KAVENIUS:

El mia kontakto 50-jara kun la ĉina esperantujo

MIA kontakto kun ĉinoj naskiĝis antaŭ kvindek jaroj. Mi havis korespondon kun sveda kolego, redaktoro Einar Adamson, kaj iu dana ĵurnalisto kun la intenco fondi ĵurnalistan

Esperanto-organizon. Jus tiam mi ricevis el Ĉinio la novan revuon "Ĵurnalisto". Mi tuj skribis al ili. Sed post kelkaj aperintaj numeroj alvenis el Ĉinio letero: Tri redaktoroj de

la revuo estas ekzekutitaj (Inter ili estis Eltunko kaj Yang Qiu-zhen — Red.). Ili laboris tiam sub la regado de Ĉiang Kajŝek. En la sama jaro ni fondis la Tutmondan Esperantistan Jur-

SUR LA GRASA GRUNDO

— Vizito al agrikultura bazo de Heilongjiang

ESTAS kanto «Ĉe Songhua-Rivero», en kiu troviĝas tiaj frazoj: “La hejmloko mia estas ĉe Songhua-rivero en Nord-oriento, kie riĉas arboj, karbo kaj abundas sorgo kaj sojfabo ĉie sur la tero . . .” Ĝi vaste cirkulis en Ĉinio en la tridekaj jaroj. La bela kaj fekunda tero prikantata ja estas la nuna Heilongjiang-provinco de Ĉinio. Tiam la Nordoriento de Ĉinio estis okupata de japanaj agresantoj. La kanto alvokis la ĉinan popolon al batalo por repreni la perditan teron. Kun diskoniĝo de la kanto ankaŭ la abundo de sojfabo kaj sorgo de Heilongjiang profunde impresis la popolon.

En aŭgusto mi vojaĝis al la nomita provinco, rigardis preskaŭ ĉiujn ĝiajn agrikulturajn regionojn vizitante multajn popolajn komunumojn kaj ŝtatajn

kultivejojn. Kie ajn mi estis, mi kvazaŭ ĉiam aŭdis la konatan kanton. Ĉio kion mi vidis tie jam ne estis komparebla kun la antaŭa stato. Hodiaŭ en la loko fama kiel grenejo multe grandiĝis la areo de agroj kaj altiĝis la produktokvanto de greno. Inter ĝiaj agrikulturaj produktaĵoj tritiko jam okupis la unuan lokon kaj ĝuas la saman renomon de sojfabo. Nun krom plenumi la bezonon de la provinco mem, ĝi povas liveri ĉiujare al la ŝtato ĉ. 1.000.000 tunojn da grenoj. Ĝia bonkvalita sojfabo havas grandan debiton kaj ĝuas bonan renomon en Japanio kaj landoj en sudorienta Azio.

Ĉar Heilongjiang havas multe da grasaj agroj kaj abundajn akvofontojn, ĝi estas enlistigita kiel unu el la gravaj agrikulturaj bazoj de Ĉinio kaj rapide konstruata.

LA HODIAŬA SONGHUA-NENJIANG-A EBENAĴO

Forlasinte Harbinon, la ĉefurbo de la provinco, la trajno galopis en la vastega ebenajo Songhua-Nenjiang. Ekster la fenestroj de la vagono jen aperis senlima verda kamparo de sojfabo kaj maizo, jen nigra tero ĵus plugita. Ĉe la grandaj kaj malgrandaj fervojaj stacioj kiujn ni preterpasis viciĝis cilindraj grentenejoj.

La ebenajo situas en la meza parto de Heilongjiang-provinco kaj estas formita el aluvioj de Songhua- kaj Nenjiang-riveroj. Ĝi abunde produktas maizon, sojfabon, sorgon, beton, linon, semojn de helianto k. a. Nun la popola registaro de la provinco jam prenis Hulan, Bayan, Zhao-dong, Shuangcheng kaj aliajn 9 guberniojn kiel ĉefajn guberniojn de agrikulturo de la provinco.

nalistan Asocion. Komencis aperi ĝia organo — “Internacia Ĵurnalisto”. Ĝi estis heredaĵo de la mortintaj ĉinaj ĵurnalistoj.

Ekde tiu tempo daŭris mia kunlaboro kun ĉinaj esperantistoj kaj iliaj organizoj kaj revuoj. Momente mi memoras la nomon de unu malnova revuo: “Ĉinio Hurlas”.

Kiam naskiĝis milito inter Ĉinio kaj Japanio, tieaj esperantistoj estis treege aktivaj. Ekz-e mi ricevis multe da skribitaj kaj

fotitaj materialoj, kiuj montris kiel heroe ĉinoj defendis sian patrolandon. Feliĉe mi havis eblon aperigi parton el la artikoloj en niaj naciaj gazetoj. Multaj tiaj milittemaj fotoj aperis en finna gazetaro, eĉ foje en la milita revuo. Tiam en Eŭropo oni komencis scii pli pri Esperanto-movado en la Malproksima Oriento.

Komencis aperi la nuna revuo “El Popola Ĉinio”. Dum la jaroj ĝi montriĝis, ke ĝi estis tre bone redaktita. Dum la jaroj ĝia enhavo daŭre grandiĝis kaj riĉiĝis.

La unuan fojon multaj el ni eŭropanoj ricevis rektajn kaj verajn informojn el la lando, kiu ĝis tiam estis treege malmulte konata de ni. Specialaj kaj originalaj artikoloj el diversaj temoj, kiel terkulturo, sporto, nacioj de la lando, historio, arto, scienco kaj tekniko, multe klarigis opiniojn de la legantoj ekster viaj landlimoj.

Mi vere el tuta koro gratulas EPC-n pro ĝia jam longa aperado kaj deziras sukcesan venontecon!



Esplorado de la virga tero de Sanjiang

Kiam mi venis al la guberniurbo de Zhaodong, la gubernia respondeculo Sun ĵus revenis de kamparo. Li entuziasme ekparolis al mi pri ilia agrikultura produktado. Li diris, ke la grundo de Zhaodong estas malpli bona ol tiu en la aliaj 12 gubernioj kaj ofte okazis tie printempa sekegeco. Por pliprodukti grenon oni diligente reformas la sterilan grundon, multigas kulturajn specojn, kompletigas irigacian sistemon kaj laŭeble uzas maŝinojn kaj kemisterkon. Dank' al sufiĉaj akvo kaj sterko kaj bona flegado al la kampoj, la grena produktokvanto de la gubernio


en la lastaj tri jaroj pliiĝis de 275,000 tunoj al 460,000 tunoj. Kamarado Sun varme invitis min viziti komunumojn.

Mi vizitis la komunumojn Songzhan kaj Xianjin. La unua estis origine simpla vilaĝo. Kun disvolviĝo de agrikulturo, aperis tie fabrikoj, butikoj, lernejoj, hospitalo kaj aliaj servoj kaj formiĝis urbeto. Post vizito al fabrikoj de elektraĵoj kaj maŝinoj kaj manĝaĵoj de la komunumo mi iris al ĝia fridiga fabriko. Respondeculo de la komunumo diris al mi, ke la fabriko produktas kuniklaĵojn, anseraĵojn kaj fabon,

kaj aliaj komunumaj kaj brigadaj entreprenoj produktas 150 specojn da produktadoj. La jara produkta valoro atingis pli ol 10,000,000 juanojn. Tiu enspezo ludas gravan rolon en disvolvo de agrikulturo kaj plimultigo de enspezo de la komunumanoj. En Xianjin-komunumo mi vidis densajn forstajn zonojn kaj prosperajn sorgajn kaj maizajn kampojn. Ili fosis 155 putojn, kiuj kun aliaj akvofontoj povas kontentigi bezonon de la plantoj. En la lastaj tri jaroj la produktokvanto de greno de tiu komunumo duoble pligrandiĝis.

La grundo kaj klimato de la ebenaĵo konvenas al kulturado de pluraj specoj de plantadoj inkluzive de beto. En Andagubernio de Heilongjiang, grava kultivejo de beto, mi vidis grandajn parcelojn de beto, ĉiun kun areo de pli ol 1,000 muoj (1 muo=1/15 hektaro). Iutage mi venis al Wanbaoshan-komunumo, kiu produktas betojn plej multe en tiu gubernio. Ĝi kulturis beton pli ol 20 jarojn kaj akiris riĉan sperton. Nun oni klopodas por trovi metodojn por pli alta produkto. La estro de la

Plugita tero



komunumo Kang, kiu antaŭe estis teknikisto, gvidis min en rigardo de eksperimentaj parceloj pri sterkoefiko, specioj kaj kreskiga hormono. Li kun memfido diris, ke pasintjare la hektara produktokvanto de greno de la komunumo estis 25.5 tunoj kaj ĉijare ili klopodos por ke ĝi atingu 30 tunojn.

Anda-gubernio havas 103,300 hektarojn da agroj, inter kiuj 70% estas konvenaj por kulturi beton. Tia beto entenas sukeron je 18%. Sukero ekstraktita el tia beto estas tre pura, blanka kaj subtila kaj debitas en la tuta lando. La gubernio ne nur liveras betojn al la ŝtato, sed ankaŭ mem faras sukeron. Mi planis viziti la sukerfarejon, sed malbonŝance, tie iris plivastigo de fabrikkomplezo. Forlasinte Anda, mi veturis al la Qiŝihar-a Sukerfarejo nordokcidente de ĝi. Ankaŭ tie iris konstruado de novaj fabrikkomplezoj kaj renovigo de ekipaĵoj. La fabrikestro diris, ke ĉijare la kultura areo de betoj estas granda kaj betoj bone kreskas; kaj se la sukerfarejo ne estus disvastigita, ĝi ne povus kontentigi la bezonon por prilabori la betojn. Post sia plivas-

tiĝo la fabriko ĉiutage povos prilabori 1,500 tunojn da betoj (antaŭe 1,200 tunojn).

ĈE BORDO DE HEILONG-RIVERO

Norde de la Songhua-Nenĵiang-a Ebenajo kaj ĉe la dekstra bordo de Heilong-rivero en ĝia meza baseno estas ekspluatata regiono nomata Heihe. Iun posttagmezon mi venis al Aihui-gubernio de tiu regiono. Ĝi sidas tuj apud la rivero, kaj transe estas Sovetunio. Kvankam ĝi situas en tre malproksima limregiono, tamen multaj ĉinoj scias ĝin, ĉar 30 kilometrojn for de la nuna guberniurbo estas fama antikva urbo Aihui.


Akompanate de la mastro mi faris viziton laŭ la bordo per aŭto. En la suda parto de la regiono estas ebenajo kaj en la norda multas montoj. Tie belas verdaj montoj kaj riveroj, abundas sojfabo kaj tritiko kaj ankoraŭ estas vasta areo de virgatero. Kvankam tia grundo estas grasa, tamen limigite de la kondiĉoj, kamparanoj antaŭe ne havis forton por ĝin ekspluati. Ii nur kulturis sur malgrandaj ter-

pecoj krudajn grenojn kiujn ili prenis kiel ĉefan manĝaĵon. Nun oni laŭplane ekspluatatas virgan teron kun areo de ĉ. 600,000 hektaroj en la tuta regiono kaj ĉefe kulturas tritikon.

Kiam mi venis al Aihui-komunumo nemalproksime de la guberniurbo, la tiea rikoltado de tritiko estis baldaŭ finota. Sur draŝejoj de la brigadoj oni streĉe ventumis kaj entenejigis tritikon. Oni diris al mi, ke la komunumo kun pli ol 7,600 membroj havas 9,330 hektarojn da agroj, inter kiuj la areo por tritiko konsistigas 75%. Krom grena porcio de komunumanoj, semoj kaj bezono de brutobredado, meznombro ĉiu komunumano povas vendi al la ŝtato pli ol 1 tunon da greno ĉiujare. La meznombra enspezo de la komunumanoj estas la plej alta en tiu regiono.

Por rapidigi la ekspluatadon de virgatero, la popola registaro de Heilongĵiang favore liveris al la regiono Heihe monon kaj agrikulturajn maŝinojn. Antaŭe 70% de la agrikulturaj laboroj de tiu regiono jam estis meĥanizitaj. En 1980 al ĝi aldoniĝis

Spruca irigacio



1,500 traktoroj kaj 500 kombajnoj. Nun 22 brigadoj de la tuta regiono jam estas tute meĥanizitaj.

La agrikultura meĥanizado akcelis la konstruadon de la regiono. Longquanling-brigado estas bona ekzemplo. Ĝi konstruiĝis sur la nove ekspluatita virga tero en 1979. Tiam ĝiaj laboruloj venis de diversaj brigadoj, kiuj subtenis ĝin ankaŭ per traktoroj. En la unua jaro ili laboris tre pene kaj vivis malfacile. Pro manko de legomoj ili havis nur supon. Malgraŭ tio ili persiste ekspluatis 500 hektarojn da virga tero kaj kulturis sur ĝi tritikon. En la kuranta jaro la plugareo de la brigado jam atingis 1,600 hektarojn, kiuj povas produkti 2,250 tunojn da greno. La brigadestro kondukis min por rigardi ilian novan vilaĝon, kie estas nur provizoraj nepavimitaj vojoj, terkabanoj kaj aliaj simplaj instalaĵoj. Sed en tiuj simplaj domoj ĉio estas en bona ordo kaj sur iuj fenestrojloj metiĝas floroj. Adiaŭante min ĉe vilaĝfino li diris, ke nun ili jam pretigis brikojn por konstrui domojn por la komunumanoj en tempo de neokupiteco.

EKSPLUATADO DE LA "GRANDA NORDA SOVAĜEJO"

Post la vizito al la norda parto de la regiono, mi venis al Sanjiang-ebenaĵo en ĝia nordorienta parto. Tie estas marĉa delto formita ĉe la kunfluejo de la riveroj Heilong, Songhua kaj Wusuli. De longa tempo sur tiu loko kreskis nur altaj fragmitoj kaj sovaĝaj herboj kaj frekventis tigroj kaj lupoj. Pro tio oni nomis ĝin "Granda Norda Sovagejo". En la komenco de la kvindekaj jaroj la unuaj eksplu-

atantoj venis tien. Ili konstruis vojojn, fosis kanaletojn por dreni akvon kaj faris semadon, tiel ke la sovaĝejo komencis ŝanĝiĝi.

La ekspluatado de la sovaĝejo estas plenumata ĉefe de ŝtataj kultivejoj. La ĝenerala administracio de la kultivejoj de la tuta provinco sin lokas en la urbo Jiamusi. Mi vizitis la plej frue fonditajn kaj plej grandajn kultivejojn 852, 853 kaj Youyi. Ĉiujare ili produktas 250,000 tunojn da greno. Krome ili produktas ankaŭ ore fungojn, fungojn, fruktojn k.a. kaj ankaŭ entreprenas brutobredadon kaj prilaboradon de agrikulturaj produktaĵoj.

Menciante la kultivejon 853, oni multe parolis al mi pri ĝia kvara filia kultivejo sur la Insulo de Sovageaj Anseroj. Tie estis marĉejo ĉirkaŭata de akvo en tri flankoj kaj ŝlimejo en la alia. En 1957, kiam la ekspluata avangardo venis tien, ili trovis sovaĝajn anserojn kaj iliajn ovojn ĉie sur la insulo, tial oni nomis ĝin Insulo de Sovageaj Anseroj kaj la ŝlimejon "Farunsaŭca Vazo". Antaŭe nur en vintro oni kuraĝis veni sur la insulon por ĉasi kaj fiŝkapti kiam la tero estis frostigita. Post degelo irante tie homoj kaj brutoj ofte dronis en mistera ŝlimejo.

Kun scivolemo kaj respekto al la konstruantoj, mi venis al la insulo. Tamen la legenda insulo jam ne plu estis kaj ankaŭ la "Farunsaŭca Vazo" malaperis. Sur tiu marĉejo oni fordrenis akvon, forigis sovaĝajn herbojn kaj konstruis sur ĝi kultivejon same prosperan kiel aliaj. Ebena ŝoseo kondukas al la pordego de la kultiveja oficejo, vicoj kaj vicoj da brikaj domoj elri-

gardas el verdajoj, ekster la vilaĝo estas senlima tritika kamparo kaj ankaŭ bredejoj de fiŝoj kaj zibeloj.

Mi venis al vicestro de la kultivejo Zhou Shuhuan kaj petis lin rakonti al mi la historion de la kultivejo. Li havas seren karakteron. Li kun facila koro parolis pri la siatem-paj malfacilaj laboro kaj vivo, respektplene prezentis al mi kelkajn martirojn mortintajn en la ekspluatado de la insulo kaj kondukis min al la Monumento de Martiroj.

Inter la martiroj estis Luo Hairong, estro de la transporta grupo. Li dronis en la "Farunsaŭca Vazo" dum transportado de mazuto tra la marĉejo. La aliaj du martiroj oferis sian vivon en pontokonstruado kaj transnaĝo de rivero dum transportado. Oni ĉiam memoras ilin kaj juras bone konstrui la insulon.

Estas ankoraŭ multaj aliaj kortuŝaj faroj de pioniroj kaj iliaj gefiloj. Zhou prezentis al mi la familion de Yang Minzhu. 50-jara Yang estas avangarda brigadestro, lia edzino — estrino de virina grupo kaj lia pliaĝa filino Yang Xiaoyan — elstara traktoristino. Ankaŭ liaj aliaj du infanoj laboras en la kultivejo. Iun tagmezon, akompanate de Zhou mi gastis en la hejmo de Yang. Hejme estis nur la edzino de Yang kaj lia filino Yang Xiaoyan. Montrante la knabino, Zhou diris al mi: "Si estas samaĝa al la nova insulo." La patrino de Xiaoyan intervenis: "Tiam mi tre timis, ke ŝi ne vivos!" Mi ne komprenis ŝian parolon kaj Zhou klarigis al mi: Kiam Yang Minzhu sin anoncis por iri al la insulo kiel pioniro, ankaŭ lia graveda edzino volis.

veni kune kun li. Estis neatendite, ke survoje ŝi akuŝis. Sen-sperta viro devis servi kiel akuŝisto. Forpasis de tiam jam 20 jaroj. Diplomite el mezlernejo Xiaoyan preferis partopreni en la konstruado de la insulo ol eniri en altan lernejon. Komence ŝi laboris kiel kombajnistino kaj poste kiel traktoristino. Malgraŭ ke ŝi estas ankoraŭ juna fraŭlino, ŝi jam gvidas metilernanton!

Forlasinte la insulon mi longe ne povis kvietiĝi. Ĉio en la insulo kaj ĝiaj bravaj ekspluatantoj kaj konstruantoj de tempo al tempo aperas en mia cerbo.

ADIAŬ AL PLUGADO PER ĈEVALOJ

La ekspluatado de la "Granda Norda Sovagejo" estus neplenumebla, se mankus agrikulturaj maŝinoj. Tie ĉu popolaj komunumoj aŭ ŝtataj kultivejoj, ĉiuj multe uzas traktorojn kaj kombajnojn. En nemalmultaj lokoj 70% de agrikulturaj laboroj estas meĥanizitaj kaj iuj laboroj estas plenumitaj tute per maŝinoj. Tio tute diferencas de la stato en la lokoj en suda Ĉinio, kie oni uzas malgrandajn agrikulturojn sur malgrandaj rizkampoj. Nun tie oni ne povas vidi plu plugadon per ĉevaloj.

Tamen nemalmultaj kultivejoj plugis teron per ĉevaloj en siaj fruaj jaroj. Por konformi al grandarea kulturado, ili rapide disvolvis meĥanizadon. La farmejo Youyi fondita en 1955 senĉese aĉetis novajn maŝinojn, kaj pro tio nun ĝiaj semado, plugado kaj rikoltado de sojfabo kaj tritiko estas plenumitaj tute per maŝinoj.

La mastro konfesis al mi, ke plejparto de iliaj maŝinoj estas

malnovaj kaj parto estas de ne-granda ĉevalpovo. Eĉ tiuj novaj maŝinoj importitaj el FR Germanio kaj Usono, kiuj manifestis sian avantaĝon en uzado, iaokaze pruviĝis nekonvenaj al la lokaj kondiĉoj. Tial, elirante el la praktiko, lernante de enkondukita tekniko, la teknikistoj de la kultivejo ĉiamaniere reformas malnovajn maŝinojn kaj projektas novajn. En la lastaj jaroj ili renovigis kaj disvastigis kanalfosan maŝinon, sedimentforigan maŝinon, irigacian maŝinon kaj kelkajn aliajn, inter kiuj tri specoj inkluzive la kanalfosan maŝinon ricevis premion de la Tutlanda Scienca kaj Teknika Konferenco de 1978.

En maiza kampo mi rigardis demonstradon de novtipa maizsemilo. Ĝi estas projektita kaj fabrikita de ili mem kaj ekipita per elektronika monitoro. Se okazas vakeco dum semado, alarma signalo tuj rimarkigas en la stirejo, kaj dank' al tio ne necesas kontrolanto sur la postaĵo de semilo. Tiu maŝino havas superecojn de importita maŝino kiel egalmezura semado kaj ĝusta kontrolado kaj ankaŭ sian propran avantaĝon kiel malmultigo de maŝinhaltoj pro vakeco en semado.

La ĉefa projektisto de la maŝino Gui Tiren estas inĝeniero de la Instituto de Agrikulturaj Maŝinoj de la kultivejo. En la kvindekaj jaroj li jam laboris en la "Granda Norda Sovagejo". Li diris al mi, ke la elektronika monitoro estas relative nova tekniko kaj ĵus uzata en Ĉinio. Li decidis dediĉi siajn lastajn jarojn al la agrikultura modernigo de Ĉinio.

NOVA VIVO DE LA LOĜANTOJ EN LA SOVAGEJO

Je la mencio de la "Granda Norda Sovagejo" oni ofte ekpensas ĝiajn loĝantojn kaj ilian malfacilan vivon.

En mia impresoj la loĝantoj de la sovaĝejo ne timas froston. Portante sur si felajn veston kaj ĉapelon ili ja povas fiŝkapti kaj ĉasi en temperaturo de kelkdek gradoj sub la nulo C. Plejparto de la ekspluatantoj kaj konstruantoj de la "Granda Norda Sovagejo" venis de aliaj lokoj, inter kiuj multaj estas suduloj. Tie ili eltenis provon de frosto kaj fariĝis kompetentaj anoj de la sovaĝejo.

Vicestro de la kultivejo 853 Zhang Qi estas sudulo. Li diris, ke kiam ili ĵus venis al la loko,

Sunumado de sojfabo



ili sentis ĉion interesa, sed ili ne sciis de kie ili devis komenci. Ne estis vojo, nek domoj, ili do starigis per bastonoj kaj pajloj tendojn por loĝado kaj sensoifigis sin per neĝo. Sed tiam ili ĉiuj kredis, ke ili certe sukcesos en ekspluatado kaj fiksloĝos tie.

Hodiaŭ ilia deziro efektiviĝis. Kvankam en la novaj ekspluatataj regionoj oni ankoraŭ devas batali kontraŭ ŝlima marĉejo kaj sovaĝaj herboj, tamen ilia vivo fariĝis multe pli bona ol antaŭe. Koncerne al la malnovaj ekspluatitaj regionoj la ŝanĝiĝoj estas neimageblaj. Tie marĉejo jam fariĝis tritika maro, larĝaj kaj ebenaj ŝoseoj anstataŭis zigzagajn vojetojn kaj vicoj kaj vicoj da brikaj domoj ekipitaj per akvokondukilo kaj centrahejta sistemo anstataŭis malaltajn terkabanojn. Nun sur la senlima stepo aperis kluboj, teatroj, kinejoj, pilkludejoj kaj alta televid-transmisia turo.

La kultivejo 852 plej profunde impresis min. Oni komencis konstrui ĝin en 1957. Nun ĝi havas ĝeneralan kultivejon kaj 7 filiojn kun totala areo de 83,000 hektaroj da agroj. Ĝia ĝenerala kultivejo havas pli ol 10,000 personojn. La kultiveja oficejo, loĝdomoj de kultivistoj, butikoj, amuzejoj, edukejoj k.a. formis movoplenan urbeton.

Kiam mi atingis la sidejon de la kultiveja oficejo, tie iris korbopilka matĉo. Oni diris, ke tie estas elekta konkurso por sporta kunveno de la tuta kultivejo. Ĉiujare en neokupateca sezono ili okazigas sportan kunvenon.

En la peniga ekspluatado, amuzado kaj sportado spicas la monotonan kaj enuan vivon. En sia frua periodo la kultivejo organizis artan ensemblon. Ili prezentis dramojn, operojn kaj

aliajn programojn. Nun multaj brigadoj havas siajn bibliotekon, amuzejon, televidan ĉambron kaj radioĉambron kaj ankaŭ amatorajn aktorojn. Mi intervjuis du kantistojn el ili, unu kun familia nomo Yang kaj la alia Zhang. Ili estas speciale invitatitaj aktoroj de la muzika festivalo "Somero de Harbino". Yang diris: "Ni funkciigas kurson de voĉa muziko kaj harmoniko kun 50 kursanoj elektitaj el diversaj filiaj kultivejoj. Post finiĝo de la lernado ili revenos al siaj kultivejoj por organizi kaj disvolvi amasan artan aktivadon."

Mi ne havis tempon rigardi prezentadon de la arta taĉmento de la kultivejo, sed estis invitita de juna laboristo Wang por rigardi televidan programon en lia hejmo. Li diris, ke la kultivejo jam havas koloran vidoregistrlon kaj ĉijare ĝi konstruos televidelsendan turon kaj donos lecionojn per televido.

FERVOJO POR SUBTENI AGRIKULTURON

Veninte al Heilongjiang mi devis ofte konsulti mapon en vojaĝo. Sed kelkiam la mapo ne helpis. Foje mi veturis de Jiamusi al iu kultivejo. Laŭ la mapo mi devis unue veturi per trajno kaj poste per aŭto. Informiĝinte ke mi iros al la kultivejo, bileto-vendistino donis al mi bileton por trajno veturanta rekte al la kultivejo. Rimarkinte mian miron, ŝi diris kun rideto, ke mi ne uzu plu la malnoviĝintan mapon.

La nova fervojo Fulitun-Qianshao kun longeco de 225 kilometroj jam atingis la kultivejon antaŭ unu jaro kaj nun atingis la plej malproksiman novan kultivejon Qianshao. Ĝi estas konstruita de la ŝtato por disvolvi

produktadon de la malnovaj ekspluatitaj regionoj kaj subteni konstruadon de la novaj regionoj, tial la amasoj nomis ĝin fervojo por subteni agrikulturon. Sur ĝi servas var- kaj pasaĝertrajnoj. Post kiam ĝi malfermiĝis al trafiko, la trajnoj forportas tritikon kaj sojfabon produktitajn de la kultivejoj al aliaj lokoj, kaj enportas diversajn agrikulturajn maŝinojn al novaj regionoj.

Apud la startpunkto de la fervojo estas urbeto Xinglong. Ĝi estas startpunkto por la ekspluatado de la kultivejo Youyi en la kvindekaj jaroj, kaj tiam ne estis vojo por antaŭen marŝi plu. Poste kun disvastigo de la ekspluatitaj regionoj la fervojo etendiĝis pli kaj pli antaŭen. Tial la longeco de tiu fervojo egalas la profundecon de la ekspluatata regiono en ĝia nord-orienta direkto.

Nun la fervojo atingis novan ekspluatatan regionon Jiansanjiang. Ankaŭ ĝia unua laboro estas drenado de akvo de marĉejoj plenaj de ŝlimo, kie kreskas fragmitoj kaj herboj. Nun la plej granda akvodrena konstruo estas Bielahong-rivero. Ĝi estas kanalo kiun oni komencis fosi en 1977. Ĝi havas totalan longecon de 160 kilometroj kaj trafluas tri guberniojn kaj enfluas en Wusuli-riveron. La konstruado por ĝia ĉefa fluejo jam finiĝis kaj tiu por ĝiaj branĉaj fluejoj streĉe iras kaj baldaŭ plenumiĝos.

En la regiono Jiansanjiang estas 11 kultivejoj kun totala kulturata areo de 270,000 hektaroj. Laŭ la plano ĝi plivastigos sian areon ĝis 400,000 hektaroj en 1985, kaj tiam ĝi fariĝos la plej granda ekspluatita regiono de la provinco.

*De vi mi estas fore; ĉe l' fajro, nun, en sol'
 Trapasas nur memore ĉi-vivon sen konsol',
 Kaj kvazaŭ okdekjara jam estas nune mi,
 Maljuna kiel vintro, kaj jam mortinta — vi.
 Gustumas sur l' animon memoroj en silento,
 Iamaj neniaj vekigās en la sento;
 La vitrojn de l' fenestro vibrigas vento-frap'
 Kaj milde, ŝpine fluas fabel' en mia kap'.
 Kaj jen, vi kvazaŭ irus, pretere, tra nebul',
 Malvarmas viaj manoj, jen larmoj je l' okul'.
 Ĉirkaŭas ambaŭbrake vi mian kolon preme
 Kaj kvazaŭ vi dezirus pri io flustri ĝeme.
 Brakumas mi l' trezoron de amo kaj beleco,
 Per kisoj ni kunigas de nia viv' povrecon. . .
 Ho! ĉiam restu muta la voĉo de l' memor',
 Forgesu mi eterne momenton de l' ador',
 Forgesu vin forigi el la brakum' de l' am'. . .
 Mi estos sola, olda, kaj vi — mortinta jam.*

Reverkita kunlabore laŭ
la rumana originalo

de ARMAND SU kaj
CONSTANTIN DOMINTE

* Ĉi-jare Rumanio omaĝis la 130-an datrevenon de la naskiĝtago de sia granda filo Mihai Eminescu (1850 — 1889). Li naskiĝis la 15-an de jan. 1850 en Botosani.

Eminescu estis la plej granda poeto en Rumanio kaj kreis novan vojon en poezikreado. Li havis grandegan influon sur postajn poetojn en Rumanio. Li pasigis preskaŭ la tutan mallongan vivon en malriĉeco. En infanaj jaroj li vagadis kun aktoraj trupoj. Tiutem-



Poeto Mihai Eminescu

pe aperis liaj unuaj poemoj en la revuo "Familio" en Transilvanio. En 1870-1874 li studis en Vieno kaj Berlino.

Lia poezio estas ĉefe tragika kaj dolora. La poeto esprimis fantazian amon al neatingebla amatino, spiritan doloron, kaj aliflanke, ĝemadon kaj profundan kompaton por la subpremataj popolanoj. Eminescu estis ankaŭ pasia patrioto.

En 1883 Eminescu estis turmentata de serioza psika malsano, kiu forrabis lian vivon en 1889.

Krom poezio, li verkis ankaŭ romanon, novelojn kaj dramojn.

Eminescu estis genio, ne nur en la rumana, sed ankaŭ en la monda poezio. Liaj verkoj jam tradukiĝis en pli ol 20 lingvojn, inkluzive Esperanton. Antaŭ preskaŭ 50 jaroj Kolomano Kalocsay jam esperantigis liajn poemojn.


MATERIALO

Grena produktokvanto de la nova Ĉinio

En 1949	113,200,000 tunoj
En 1952	163,900,000 tunoj
En 1957	195,050,000 tunoj
En 1977	282,750,000 tunoj
En 1978	304,750,000 tunoj
En 1979	332,120,000 tunoj

NESTORO DE SARLANDA ESPERANTO-MOVADO FORPASIS

La Sarlanda Esperanto-Ligo informis, ke la 5-an de oktobro 1980, Jakob Schenkel, unu el la plej meritplenaj sarlandaj esperantistoj nin forlasis. Li estis kunfondinto de Sarlanda Esperanto-Ligo kaj servis al ĝi en diversaj funkcioj. Li lingve reviziis la unuan romanon de Bulthuis, *Idoj de Orfeo* kaj estis kuntradukinto de la broŝuro *Volo kaj Vojo de Saarlando* (1951). En 1961 li verkis la historian skizon *Esperanto en la Saar-regiono*. Dum multaj jaroj li servis kiel delegito de UEA en sia loĝloko Gersweiler.



*Bakin kaj Bruno Vogelmann de
FR Germanio en interparolo*

NIA KULTIVEJO



IMPRESO PRI LA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

de **BAKIN**

LASTATEMPE mi vojaĝis al norda Eŭropo. Por mi, tio estas la unua fojo. Kiam mi eliris el la flughaveno de Stokholmo, mi pensis, ke mi eniras en fremdan urbon. Tamen, loĝante en la hotelo, mi sentis familian varmon. Kvankam mi restadis en Stokholmo, la ĉefurbo de Svedio, malpli ol du semajnojn, tamen mi ne volis forlasi ĝin, kiam mi devis adiaŭi la pitoreskan kaj pacan urbon.

Mi venis tien por ĉeesti la 65-an Universalan Kongreson de Esperanto. Mi ne povis precize diri, kiam mi eklernis Esperanton. Eble en 1921. Tamen mi serioze kaj seninterrompe lernis ĝin en 1924-1925. Tiam mi vizitis lernejon en Nanjing (Nankino) kaj letere aĉetis plurajn Esperantajn librojn el la Shanghai-a Esperanta Librejo, inkluzive de la «Fundamenta Krest-

matio» de Zamenhof kaj liaj tradukitaj verkaĵoj. En la libera tempo, mi legis ilin unu post alia. Ĉar mi memlernis kaj al mi mankis ŝanco konversacii, tial mi ne kutimis paroli en Esperanto. En Francio mi ofte korespondis kun du-tri amikoj per Esperanto. En la komenco de decembro de 1928, mi revenis al Shanghai kaj loĝis en hotelo. Ĝutage mia amiko Sofio, sekretario aŭ funkciulo de la Shanghai-a Esperanto-Asocio, vizitis min en la hotelo kaj diris al mi: «La asocio havas vakan ĉambron, transloĝigu tien kaj loĝu dum kelkaj tagoj.» Mi do starigis tie kanvasan liton kaj loĝis preskaŭ duonmonaton. Poste mi luis domon apude en Baoguangli kaj forlasis la asocion en Hongxingfang. Ekde tiam mi fariĝis membro de la asocio kaj post nelonge eklaboris kiel ĝia konsi-

lanto. En iu tempo mi kaj Sofio venis al la asocio ĉiujvespere por plenumi iujn laborojn, ekz. skribi respondajn leterojn, korekti lecionajn ekzercojn de korespondaj lernantoj. Mi tradukis el Esperanto en la ĉinan lingvon la dramon de japana Akita Ujaku «Danco de Skeletoj», la unuaktan dramon de itala E. Amicis «La Floro de l' Pasinto», la dramon de sovetunia A. Tolstoj «La Morto de Danton» kaj la romanon de hungara Julio Baghy «Printempo en la Aŭtuno». En la 28-a de januaro 1932 kanonado de la japanaj agresantoj ruinigis Hongxingfang kaj la sidejon de la Shanghai-a Esperanto-Asocio. Nur tiam mi devigite adiaŭis Zhabei-kvartalon kaj forlasis la Esperantan movadon.

Dum la dek jaroj de plago, la kvarpersona bando, en la nomo

de la “Shanghai-a Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio”, kondamnis min kiel kontraŭrevoluciulon kaj senigis min je la rajto de verkado. Mi nur ŝtele faris iom da traduko kaj krome legis Esperantajn librojn dum libera tempo en mia hejmo. Mi rememoris iujn forgesitajn Esperantajn vortojn kaj mi kvazaŭ revenis en mian junecon. Esperanto denove interesis min, tial mi ĉeestis la Universalan Kongreson de Esperanto. Antaŭ 50 jaroj, mi aŭdis pri la Universala Kongreso de Esperanto. En la Shanghai-a Esperanto-Asocio mi nur hazarde aŭdis, ke oni interparolas en Esperanto. Ĉifoje mi persone spertis, ke ĉiuj kongresanoj venintaj el dekoj da landoj intime parolas la komunan lingvon tre flue kaj nature, ĉie ĉu en kaj ekster la kunvenejo, aŭ sur kaj sub la podio. En la Kongreso oni raportis kaj diskutis en Esperanto tiel lerte kiel en sia nacia lingvo. Sidante tie mi kvazaŭ ĉeestus harmonian familian kunvenon. Mi unuafoje spertis tion. Tamen en multaj jaroj mi sopiris kaj imagis ĝuste tion. Estas bedaŭrinde, ke mi ne povas libere paroli nian lingvon. Ĝi estas parolata de aliaj tiel flue kiel murmuranta akvo aŭ senĉese ŝprucanta fontano; ŝajnas al mi, ke oni kantas belan kanton aŭ ludas harmonian muzikon. Aŭskultante la paroladon, mi tute ebriĝis. Tamen mi parolas Esperanton kun granda balbuto kvazaŭ ŝtonetoj nepoluritaj ŝtopus mian gorĝon. Tamen mi ne malesperas, ĉar la gejunuloj de nia delegacio flue parolas Esperanton kaj ili konatiĝis kun multaj novaj ami-

koj kaj havis intimajn parolojn kun ili. Nia espero ja estas sur ili.

Iu amiko konsilis min ne ĉeesti la Kongreson eĉ 2 tagojn antaŭ mia forveturo al la norda Eŭropo. Li diris: Vi estas jam aĝulo kaj ne devas klopodi por tia kongreso. Ĉar li tute ne sciis, ke mi multe zorgis pri Esperanto en la lastaj jaroj. La kongreso plifortigis mian fidon al Esperanto kaj mi firme kredas, ke Esperanto nepre fariĝos komuna lingvo de la homaro.

Ĉinoj nomas Esperanton “monda lingvo”. Mi opinias, ke tia nomo estas tre bona. Esperanto kreita de pola okulisto Zamenhof, jam provita en 93 jaroj, nun estas rekonita de la tutmonda popolo kiel ununura “monda lingvo”. Ĝi ekvigligas kiel viva lingvo, senĉese disvolvigante kaj riĉiĝante. Kiam mi eklernis Esperanton, mi havis nur maldikan Esperantan vortaron kompilitan de D-ro Kabe kaj nun mi povas uzi plenan Ilustritan Vortaron de Esperanto kun 1,300 paĝoj. Esperanto estas sendube disvolviganta kaj vaste uzata. Inter la 1,800 kongresaj partoprenantoj en la kuranta jaro estis malmultaj maljunuloj kiel mi. La tuta kunvenejo estis plena de vogleco kaj amikeco.

En Stokholmo troviĝas nombro da miaj malnovaj amikoj en svedaj kulturaj rondoj, tial ankaŭ mi havis ne-mal multe da eksterkongresaj renkontiĝoj. Dum la intervidiĝo antaŭ ĉio ili demandis min pri Esperanto. Ili dubis, ĉu Esperanto povas fariĝi

“vera monda lingvo”. Mi do klarigis al ili: Esperanto certe vaste disvolviĝos, sed ĝi ne anstataŭos lingvon de iu ajn nacio, lingvon de iu ajn popolo, ĝi ludas nur la rolon de komuna helpa lingvo. Ĉiu nacio povas uzi tiun helpan lingvon en komunikado kun aliaj nacioj. En estonteco oficialaj dokumentoj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj internaciaj organizoj povos esti publikigitaj en Esperanto. Mi ofte pensas: Kia nova situacio aperus, se ĉiu homo lernus Esperanton! Kiel bone estus, se Esperanto estus parolata en la tuta mondo kiel en la kongreso! Esperanto estas facile lernebla kaj komprenebla ne nur por eŭropanoj, sed ankaŭ por azianoj kaj aliaj nacioj. Tio estas ĝia supereco. Esperanto estas arta lingvo tamen uzata de homoj, ĝi do povas disvolviĝi kaj ĉiam pli riĉiĝi. Fine ĝi formiĝos, iom post iom, en riĉan literaturan trezorejon.

En la kongreso de Stokholmo mi vidis senlime brilan perspektivon de Esperanto.



Reveno de Vankuvero

POST la Dua Pacifika Kongreso de Esperanto, okazigita en Vankuvero, Kanado, la Ĉina Esperantista Delegacio el tri personoj revenis al Beijing (Pekino) en la 8-a de aŭgusto. De tiam pasis jam kelke da monatoj, tamen nia koro ŝajne restas en la kanada havenurbo, restas inter la afablaj gastigantoj, inter esperantistoj el diversaj landoj. . .

Antaŭ ol ekflugi al Vankuvero, ni rememoris la vortojn de nia forpasinta ĉefministro Zhou Enlai. Li diris en 1973, ĉe la bankedo por bonvenigi la kanadan ĉefministron: "En Ĉinio, parolante pri kanadaj amikoj,

oni tuj rememoras doktoron N. Bethune." "La brila figuro de doktoro N. Bethune jam fariĝis historia monumento de la profunda amikeco inter la ĉina kaj kanada popoloj." Ĝuste kun tia respekto kaj amika sento al la doktoro kaj la kanada popolo, nia delegacio venis al Kanado kaj partoprenis en la kongreso. Vankuvero estas la loko, de kie doktoro N. Bethune ekveturis kun aliaj kuracistoj al Ĉinio. Pro tio ni sentas pli grandan intimecon al la urbo.

Ni atingis Vankuveron en la 25-a de julio. Aŭto veturigis nin el la flughaveno, galopante sur vojo borderata per arboj.

Ĉirkaŭe sterniĝas verdaj herbejoj, kaj la gaja aŭto, kvazaŭ senzorga fiŝo, kuradis en la ondetanta verda maro punktita de elegantaj domoj. Jen la tuta vido: bonordo, kvieto, freŝa aero. . . forpelis nian lacegon de longa vojaĝo.


Vankuvero, kiu sidas sur la plej mallonga naviga linio de kanado al Azio, estas grava haveno ĉe la pacifika bordo kaj ankaŭ fina punkto de la tranakada fervojo. Ĝi, kiel aliaj urbegoj en la mondo, havas altajn domojn, purajn stratojn, movoplenajn komerc-kvartalojn. . . Sed ĝi akre distingiĝas de aliaj urboj per sia ĉarma pej-

Prezidanto Du Temple faras raporton en la kongreso.



zaĝo, tial oni nomas ĝin Ĝardeno Urbo, al kiu ĉiujare svarmas diverslandaj turistoj.

La Pacifika Kongreso de Esperanto okazas regule en ĉiu kvara jaro. La unua prenis la lokon en Melburno, Aŭstralio, de la 4-a ĝis la 10-a de januaro, 1976. Kaj la dua inaŭguriĝis en Vankuvero la 26-an de julio kaj fermiĝis la 29-an. La lastan ĉeestis 170 esperantistoj el 13 landoj. La kongresa temo estis disvastigo kaj uzado de Esperanto en la pacifika regiono. Oni profunde diskutis kaj sisteme pritraktis la kongresan temon, kaj krome interŝanĝis sperton en lernado de la internacia lingvo. La magistrato de Vankuvero alte taksis la kongreson. Antaŭ la kongreso la urbestro subskribis invitleteron por bonvenigi fremdlandajn esperantistojn al ĝi. La Kanada Televida Reto elsendis programon pri la kongreso. LKK ricevis 32 gratulajn leterojn kaj telegramojn de UEA, diverslandaj Esperantaj organizoj kaj



La Ĉina Esperanto-Delegacio en Vankuvero

individuoj. Memore al la internaciisma batalanto, la ĉina delegacio projekciis la filmon "Doktoro N. Bethune" kaj invitite faris prelegon "Pri Doktoro N. Bethune en Ĉinio". Ili, precipe la filmo, forte impresis la ĉeestantojn. Iuj emociiĝis ĝislarne. . .

La dua kongreso brilas ne per sia imponeco, sed per sia bona organiziteco. Ĝi estas plene

sukcesa. Ĝi ne nur akcelis la Esperanto-movadon en la pacifika regiono, sed ankaŭ ebligis al diverslandaj esperantistoj amikiĝi. En la kongreso ni renkontiĝis kun gesinjoroj Harmon, kiujn mi konis en Japanio antaŭ 7 jaroj, kun gesinjoroj Schulze, bone konataj inter ĉinaj esperantistoj. Ni vidis ankaŭ niajn korespondajn amikojn gesinjorojn Du Temple kaj Zacherl.

La Ĉina Esperanto-Ligo donacas al la kongreso brokatan portreton de Zamenhof.





Esperantistoj de Ĉinio kaj aliaj landoj en pitoreskejo de Kanado

Ĉe la renkontiĝo ni dronis en ĝojo malfacile esprimebla per vortoj. Certe ni ekhavis multe da novaj amikoj, kun kiuj ni babilis kiel malnovaj konatoj. Amikeco, maro de amikeco. . . Iu kanada amiko trafe diris: “La nuna kongreso ne nur antaŭenigas la disvolvon de Esperanto-movado en la pacifika regiono, sed ankaŭ, estas pli grave, profundigas la interkompreniĝon kaj amikecon inter diverslandaj esperantistoj.”

Post la kongreso, akompanate de prezidanto de Vankuvera Esperanto-Klubo samideano Win Zacherl kaj lia edzino, ni kaj aliaj 21 esperantistoj ekskursis per hotelmobilo al Spencesponto, Vale-monto, Jaspero, Banfo kaj Pentictono. Vere bela, interesa, ĝuoplena kampaĉturismo. En ĉiu loko ni ĝuis sate, brakumis okule ĉian belon de la naturo. Kiam nokto falis, ni mem tendumis, starigis

moveblajn litojn kaj komforte kuŝis en dormosakoj, remaĉante la tagan frandaĵon, abunde superŝutitan de la naturo. La sekvantan matenon ni pakis ĉion kaj — ek al alia pejzaĝo.

Ho, la tuta lando estas bela, kiel en Vankuvero, tiel ankaŭ ekster ĝi. Smeraldaj montoj, unu super alia; puraj akvoj, jen kvietaj jen torentaj. . . Eĉ nun antaŭ niaj okuloj ankoraŭ prezentiĝas Robson-monto 12,972 futojn super la marnivelo, majeste sidanta kaj tutjare kovrata de neĝo; la multkolora lago, magie kalejdoskopanta; la kolumbia glaciejo, sorĉe kvietaj; la akvofalo de Alhabasko, tondre sin ĵetanta malsupren, kun neĝblankaj ŝaŭmoj. . .

Finiĝis la kongreso, daŭras la amikeco. Ni adiaŭis kanadajn amikojn kaj diverslandajn esperantistojn. Ĝis revido, Vankuvero! Ĝis revido, amikoj! La koro restas ĉe vi. . .

LA septembra Beijing baniĝis en forta sunbrilo. En tiu bela sezono la Vizitgrupo de la Japana-ĉina Amikeca Societo Esperantista venis al tiu urbo, kio tre ĝojigis la tieajn esperantistojn.

Vespere de la 9-a de septembro ni, ok ĉinaj esperantistoj, estis atendantaj en la halo de la Beijing-a Aerodromo. “Jen la gastoj venas!” subite iu kriis kaj ni tuj kuris en la malantaŭan parton de la halo. En tiu momento la arĝenthara sinjoro Tokuda Rokuro kun rideto alproksimiĝis al ni mansalutante. Alkuris al ni ankaŭ sinjoroj Harada Hideki, Kunji Heitaro, Mijaŝita Bunzo, Ŝirai Miĉio kaj ridetante mansvingis al ni fraŭlinoj Tadaŝi Ĉizuko kaj Sato Jasuko. “Bonvenon!” “Saluton!” aŭdiĝis en la halo. La aliaj homoj direktis miran rigardon al ni. “Kiun lingvon vi parolas?” “Esperanton!”

Jes, ĝuste per Esperanto la ĉinaj gastigantoj akceptis la japanajn amikojn dum ilia dusemajna vizitado. Ili ĉiam vivis en Esperantujo, ĉu en Beijing kaj Shanghai aŭ en Chongqing. Esperanto strikte ligis la korojn de la ĉinaj kaj japanaj esperantistoj, ĉu en la amikeca kunsido, ĉu en la amuza vespero, ĉu dum la ekskurso.

Nokte de la 10-a okazis renkontiĝo de la japanaj kaj Beijing-aj esperantistoj. Zhang Qicheng, ĝenerala sekretario de ĈEL, Ge Baoquan, estro de la prepara grupo de la Beijing-a Esperanto-Ligo, kaj aliaj kelkdek esperantistoj esprimis varman bonvenon al la japanaj amikoj. Ili salutis unu alian kaj intime interparolis. Tadaŝi Ĉizuko kaj Sato Jasuko kune kantis belan japanan kanton. Kamara-

JAPANAJ ESPERANTISTOJ EN ĈINIO

dinoj el Radio Pekino prezentis la ĥoron "Sakuro". Kantis ankaŭ junuloj, kaj poste Laŭlum deklamis sian poemon. Jam fariĝis profunda nokto. Kiam la japanaj amikoj veturis al hotelo per aŭto, ili ankoraŭ dronis en senfina ĝojo.

La bela monturbo Chongqing estis la dua urbo kiun ili vizitis. Posttagmeze de la 13-a, la Chongqing-a Esperanto-Asocio okazigis kunvenon en la pompa Granda Popola Aŭditorio por bonvenigi la japanajn amikojn. En ĝi estas skulptitaj traboj, cinabraj kolonoj kaj ruĝsilkaj lanternoj. "Oh, ĝi aspektas kiel palaco!" admiris fraŭlino Tadaŝi Ĉizuko. Prezidanto de la Chongqing-a Esperanto-Asocio Li Ren donis salutvortojn en la kunveno. Poste Ran Qingfang, vicprezidanto de la asocio, parolis pri sia konatiĝo kaj amikeco kun Verda Majo kaj ŝia edzo. Por esprimi dankon, Tadaŝi Ĉizuko kaj Sato Jasuko faris te-ceremonion al la gvidantoj de la asocio. En gaja atmosfero la esperantistoj de la du landoj intime interparolis kaj skribis sian nomon por memoro. Eĉ kiam finiĝis la kunveno, ili ankoraŭ ne volis disiĝi. Miĵaŝita Bunzo senlace kinematografis tiujn emociajn scenojn samkiel en Beijing.

Nokte la gastoj, starante sur la montpinto de Pipa-parko en

la centro de la urbo, rigardis malsupren kaj vidis, ke sennombraj lampoj speguliĝis en du orienten fluantaj riveroj kvazaŭ steloj trembrilus sub iliaj piedoj. La fabela ĉarmeco faris al ili la impreson, kvazaŭ ili jam sin levus en la ĉielon. Ili raviĝis kaj admiris senĉese.

Matene de la 15-a, la vizitgrupo adiaŭis tiun urbon kaj kune kun Chongqing-aj samideanoj eniris en kajuton de la ŝipo "Dongfanghong — 35". Ili veturis orienten laŭ Changjiang-(Jangzi)-rivero. Tie troviĝas multaj vidindejoj. La impona Qutangxia, la bela Wuxia kaj la krutega Xilingxia konsistigas la vastan pitoreskejon de la Tri Gorĝoj de Changjiang-rivero. Ambaŭborde de la rivero trovi-

ĝas krutajoj nuboskrapantaj kaj de tie flugas falakvojoj. Ili interplektiĝas kun densa nebulo. Multaj legendoj pri la vidindejoj ĉe la bordoj de la rivero faris la Tri Gorĝojn pli misteraj.

Matene de la 16-a, la ŝipo forlasis la urbon Wanxian kaj daŭre veturis orienten. Post nelonge ĝi preteriris la urbon Baidi, kaj vidiĝis Kuimen, pasejo al la Tri Gorĝoj. Tuj tiam kamaradino Zhou Ningxia el la turisma servo diris al la japanaj gastoj, ke ili elkajutiĝu por ĝui la pejzaĝon. Kiam prezentiĝis Wushan-monto, Zhou ekĝojis: "Bonŝance, hodiaŭ la vetero estas serena, tute sennebula. Vi povas do klare vidi la pinton Diino." Ili rapidis maldekstren de la ŝipo kaj levis sian kodakon por foti. "Rigardu, jen la pinto Diino! La svelta figuro malantaŭ la pinto ja estas Diino mem!" Oni konkure fotis la vidaĵon. Forlasinte la pinton, la ŝipo kuris al Xilingxia. Harada Hideki per la ĉina lingvo ne tre ĝuste prononcata recitis la faman poemon de Li Bai: "Forlaso de Baidi en la Mateno":

Membro de la vizitgrupo Harada Hideki interparolas kun ĉina esperantistineto.



*En matenruĝo mi forlasis la
monturbon Baidi,*

*Ĉe la tagfin' alvenas jam
Jiangling post mil lioj.*

*Boat' malpeza preterpasis
jam mil kaj mil montojn,*

*Eĥas ankoraŭ ambaŭborde
la simiaj krioj.*

Posttagmeze de la 17-a, la japanaj amikoj venis al Wuhan, unu el la tri plej varmaj urboj de Ĉinio. La Wuhan-aj esperantistoj jam antaŭlonge komencis fari preparan laboron por akcepti la japanajn samideanojn kaj kun malpacienca atendado ilin, kiuj estis la unua esperantista vizitgrupo venonta al tiu urbo. Tuj kiam la japanoj atingis Wuhan, ili dronis en la varma amikeco de Esperantujo. Tie troviĝis multaj junaj kaj maljunaj esperantistoj, sed pli multaj estis junuloj. Kuniĝis ridoj, kantoj kaj interparoloj de ĉ. cent homoj. Seĉencz, prezidanto de la Hubei-a Esp-Asocio, kaj s-ro Tokuda Rokuro estas malnovaj amikoj. Ili havis senfinan inter-

paroladon. Ĉiu vizitgrupo ĝoje renkontiĝis kun lokaj esperantistoj, kaj ili fariĝis bonaj amikoj. La tempo pasis rapide, kaj oni jam devis diri "Ĝis revido". Tiam ili ekkantis "Pasintaj Tagoj" pro tiu neforgesebla renkontiĝo.

En la 20-a, la japanaj amikoj atingis Shanghai. Tiu Esperanta lulilo de Ĉinio bonvenigis la gastojn kun sia nova fizionomio. La Orient-Ĉinia Normala Universitato jam decidis preni Esperanton kiel elekteblan kurson, kaj Esperanto estas instruata en la fremdlingva fakultato kiel la dua fremda lingvo ekde la 1-a de septembro, kun 20 lernantoj. La japanaj gastoj ĉeestis lecionon. Profesoro Pandiŝo postulis siajn studentojn doni respondon en Esperanto. La gastoj ĝojis pri iliaj sukcesoj. Postleciona Espkurso funkcias ankaŭ en la Shanghai-a Dua Mezlernejo. Ĝin vizitas pli ol 30 geknaboj, kiuj eklernis antaŭ du monatoj kaj jam povas iom paroli Esperanton. En la klasĉambro kvar lernantoj stariĝis

kaj faris mallongan interparolon laŭ la postulo de la instruisto. Ilia klara prononco kaj orel-plaĉa tono vekis admiron de la gastoj.

Nokte de la 21-a okazis renkontiĝo de la japanaj amikoj kaj ĉ. 20 Shanghai-aj esperantistoj, inter kiuj troviĝis fama verkisto Bakin, kies ĉeesto kortuŝis la japanojn. Sinjoro Tokuda Rokuro, estro de la vizitgrupo, samkiel en la supre menciitaj tri urboj, prezentis donacon al la prepara grupo de la Shanghai-a Esp-Asocio, kaj la lasta siavice donacis la pentraĵon "Tri-hara Knabo Salutas Japanajn Esperantistojn," speciale faritan de fama ĉina karikaturisto Zhang Leping por la vizitgrupo. Fraŭlino Tadaŝi Ĉizuko en kimono kune kun fraŭlino Sato Jasuko solene faris al la gastigantoj ceremonion. La ĉinaj kaj japanaj geesperantistoj interparolis pri amikeco kaj skribis sian nomon unu por alia. Cai Beihua, vicprezidanto de la Shanghai-a Sociologia Akademio, ĝoje rememoris sian konatiĝon kun Verda Majo, kiam li vizitis Liu Ren en Japanio en la dudekaj jaroj. Sinjoro Tokuda Rokuro menciis, ke li ne sukcesis intervidi kun Bakin pro malhelpo de la kvarpersona bando dum lia unuafoja vizito al Ĉinio.

Antaŭtagmeze de 23-a, la japanaj amikoj finis sian viziton. Estis la tempo de disiĝo de la ĉinaj kaj japanaj geesperantistoj sur la aerodromo. Enirinte en la atendejon, la japanaj amikoj eĉ venis al la vitra septo por adiaŭi la ĉinajn samideanojn. "Bonan vojaĝon!" "Ĝis revido!" Kun bedaŭro ili mansvingis unu al alia.


*Japana esperantisto Mijaŝita Bunzo interŝanĝas
kun ĉinaj esperantistinoj sperton en lernado.*



La Vizitgrupo de “Japana-Ĉina Amikeca Societo Esperantista” en Beijing



La Ĉina Esperanto-Ligo kaj la preparita grupo de la Beijing-a Esperanto-Ligo kune aranĝas tekunsidon por bonvenigi la Vizitgrupon de “Japana-Ĉina Amikeca Societo Esperantista”.



Zhang Qicheng (la meza), Ge Baoquan (la maldekstra) kaj Tokuda Rokuro (la dekstra) en interparolado




Ĉinaj kaj japanaj geesperantistoj kantas Esperantan kanton.

Japana kaj ĉinaj geesperantistoj en interparolado




Sur la Granda Muro



Malgrandaj geesperantistoj de am-
baŭ landoj reciprokas donacojn.


Ekskurso en Dingling, unu el
la 13 Ming-dinastiaj Maŭzoleoj




Nove trovitaj blankaj bestoj

Lastatempe la Ĉina Scienca Esplora Grupo de Raraj Bestoj trovis en Shennongjia-regiono en okcidenta Hubei-provinco blankajn moskulojn, kapreolon kaj urson.

Sciencistoj opinias, ke la blankiĝo de la bestoj estas kaŭzita eble de la klimato kaj medio de tiu loko. La blankaj bestoj estas tre valoraj por scienca esplorado.



La blanka urso en Shennongjia-regiono kun absoluta alteco de 1,700 metroj ne estas samspeca ol la arkta urso kaj havas vivkutimon de la ordinara nigra urso.



Blanka kapreolo. La ordinara kapreolo estas herbovora, bruna aŭ kaŝtankolora.



Blanka moskulo

FONDIĜIS LA HUNAN-A ESPERANTO-ASOCIO

Je la 4-a de oktobro de la kuranta jaro la nomita asocio fondiĝis en Changsha, la ĉefurbo de la provinco Hunan.

Frue en la komenco de la tridekaj jaroj tie aktivis esperantistoj, kiuj poste iom post iom silentiĝis pro diversaj kaŭzoj. Ekde aŭtuno de 1979, stimulte de la Dua Tutlanda Esperanta Laborkunveno, la esperanta movado de la provinco ekhavis novan disvolviĝon. Sub la iniciato de Spin, vicedestro de la Agrikultura Komisiono de la Hunan-a Komitato de KPĈ kaj veterana esperantisto, Fulmeto, profesoro de la Hunan-a Normala Instituto kaj Xie Zujun, fondiĝis la Prepara Grupo de la Hunan-a Esperanto-Asocio kaj post unu jaro naskiĝis la oficiala asocio.

La kunvenon de fondiĝo de la asocio ĉeestis pli ol 80 esperantistoj el diversaj lokoj de Hunan. Ankaŭ respondeculoj de la Propaganda Departemento de la Hunan-provinca Komitato de KPĈ, la Federacio de la Sociologiaj Asocioj, la provinca Eduka Buroo, la Turisma Buroo kaj Instituto de Fremdlandaj Literaturoj de la provinco donis salutvortojn al la kunveno. La kunveno ricevis gratulajn telegramojn kaj leterojn de la Ĉina Esperanto-Ligo, lokaj esperantaj organizoj kaj famaj personoj. Ankaŭ aliprovincaj esperantistoj ĉeestis la kunvenon laŭinvite. Profesoro Xue Chengzhi (Seĉenz), prezidanto de la Hubei-a Esperanto-Asocio, faris raporton pri la Dua Pacifika Kongreso de Esperanto.

La kunveno pasigis sian statuton kaj unuanime elektis Spin, Gu Lingshen kaj Fulmeto kiel hono-

rajn prezidantojn, Xie Zujun kiel prezidanton kaj Liang Yuqing kaj Wang Dalian kiel vicprezidantojn.

PLENA ANALIZA GRAMATIKO DE ESPERANTO

Baldaŭ aperos Plena Analiza Gramatiko de Esperanto de K. Kalocsay kaj G. Waringhien. Eldonanto: Universala Esperanto-Asocio, 1980. Kvara tralaborita eldono de Plena Gramatiko. 600 paĝoj (kun multaj tabeloj). Formato 210×148 mm. Kun ampleksa indekso de la temoj. Ĝia apero kompletigos la triopon, kies du unuaj membroj estas Plena Ilustrita Vortaro kaj Esperanto en Perspektivo. PAG, kiel oni ĉe UEA populare nomas la novan libron, produktiĝas tre internacie: verkita de hungaro kaj franco, kompostita en Brazilo, Belgio kaj Nederlando, provlegita en Nederlando, Francio kaj FR Germanio, presata kaj bindata en Ĉinio.

“ĈINA ENCIKLOPEDIA ALMANAKO” HAVAS PAĜON POR ESPERANTO

“Ĉina Enciklopedia Almanako” de 1980 redaktita de la ĉina fama es-

perantisto Liu Huozi eldoniĝis en la fino de la lasta septembro. La libro ĉefe prezentas ĉinajn aferojn kaj ankaŭ inkluzivas gravajn aferojn en politiko, ekonomio, scienco kaj kulturo de Ĉinio kaj aliaj landoj en 1979. Ĝi prezentas ankaŭ la Ĉinan Esperanto-Ligon kaj UEA.

ESP. OFICIALE INSTRUATA EN LERNEJO DE CAGLIARI

En la oktobra n-ro de 1979 ni raportis, ke oni intencas instrui Esperanton al 6 klasoj de unuagrada lernejo de Cagliari en la itala insulo Sardinio. S-ro Nino Pala informis nin, ke oficiala instruado de Esperanto efektiviĝis en tiu lernejo kaj 152 geknaboj jam sukcese finis la Esp. kurson kiu daŭris de januaro ĝis julio en la kuranta jaro. Esp. sonbendoj, leteroj, pk. kaj periodaĵoj el Aŭstrio, Belgio, Vatikano, Germanio, Britio, Svislando, Portugalio, Kanado, Usono, Ĉinio, Aŭstralio kaj Japanio vekis intereson ankaŭ ĉe plenaĝuloj kaj aparta Esp. kurso fondiĝis por ili. La geesp. istoj deziras korespondi kun alilandanoj, precipe geknaboj ĉirkaŭ 10-jaraj. Skribu al ili pere de s-ro Nino Pala, via del Mirto 7,09.00 CAGLIARI (Sardinio), Italio.

La inaŭgura kongreso de la Hunan-a Esperanto-Asocio



FONDIĜIS LA PREPARA GRUPO DE LA SHANXI-A ESPERANTO-ASOCIO

Post la Esperanta Labor-kunveno de Shanxi okazinta en la lasta marto rapide progresis la esperantaj laboroj en la tuta provinco.

En la 28-a de septembro kune okazis en Taiyuan, la ĉefurbo de Shanxi-provinco, kunveno por fondiĝo de la Prepara Grupo de la Shanxi-a Esperanto-Asocio kaj malferma ceremonio de la unua esperanta kurso de Taiyuan. La kunvenon kaj ceremonion ĉeestis 700 esperantistoj kaj kursanoj de la provinco. La kunveno ricevis gratulajn telegramojn kaj leterojn de esperantaj organizoj kaj personoj de diversaj lokoj.

La prepara grupo konsistas el Liu Guanwen, Zhang Deyuan, He Zeyong, Zhao Yunfeng, Han Chenghuang kaj Wen Duanzheng.

ESP. PROSPEKTO DE OULU

En la gubernia ĉefurbo de Nord-Finnlando OULU, okaze de sia 375-jariĝo, aperis unuafoje en Esp. bela turista prospekto pri la nomita urbo, eldonita de la urba turisma komisiono. Oni ricevas senpage petante ĝin (en Esp.) de la urba turistoficejo: Kaupungin matkailutoimisto,



La membroj de la Prepara Grupo de la Shanxi-a Esperanto-Asocio kaj de la unua Esperanta kurso

Torikatu 14, SF-90100 Oulu 10, Finnlando.

KONSULTLIBRO PRI ESP. BIBLIOTEKOJ

En Jugoslavio ĵus aperis bele presita 56-paĝa libreto ilustrita de bibliografo Marinko Ĝivoje (P. p. 5025, YU-41040 ZAGREB-Dubrava) kun titolo kaj resumoj en 6 lingvoj. Unue estas prezentataj la ĉefaj taskoj de biblioteko, klasiksistemoj, listo de bibliografioj kaj katalogoj, konsiloj al bibliografoj kaj poste laŭlanda listo de 120 E-bibliotekoj (publika, asociaj, societaj, privataj) havantaj minimume mil librojn aŭ broŝurojn. Troviĝas ankaŭ fakterminareto kaj aparta ĉapitro pri Esp. muzeoj. Prezo: 12. gld.

PORLEPRULA AGADO

De kelkaj jaroj nia malnova amiko J. Kondor en FR Germanio sin okupas pri porleprula agado. Li estas instruisto en Johannes-gimnazio. Lia kampanjo per la Esperanto-glumarkoj (**Helpu al la lepruloj**) jam pli ol 13,000 DM-ojn enspezis ekde la lanĉado en dec., 1975. Kiu ŝatus havi ĝin (1 folio kun 32 belegaj glumarkoj kostas nur 2 DM-ojn), povas mendi ĝin ĉe: Aussätziges Hilfswerk, Porleprula Kampanjo, 545 Lahnstein, Johannes-gimnazio, FRG. Nepagipovaj landoj ricevu ĝin kontraŭ bele afrankitaj leteroj aŭ bildkartoj kaj s-ro J. Kondor tuj sendos 1-2 foliojn, laŭ deziro! Aparta pago ne estas dezirata.

Horaro de la Ĉiutaga Esperanta Disaŭdigo de Radio Pekino

Pekina Tempo	GMT	Al Regionoj	Ondoj(m)	kHz
4:00-4:30	20:00-20:30	Eŭropo	40.1	7470
			30.1	9965
6:30-7:00	22:30-23:00	Latin Ameriko	32.0	9365
			25.7	11650
19:00-19:30	11:00-11:30	Japanio, Koreio	30.4	9860
			19.3	15510
21:00-21:30	13:00-13:30	Sudorienta Azio	25.6	11685
			19.8	15145



DUTRAKA ELEKTRIZITA FERVOJO TRANSDONITA AL TRAFIKADO EN ĈINIO

Kiel la unua dutraka elektrizita fervojo de Ĉinio, la sekcio 119 kilometrojn longa inter Shijiazhuang kaj Yangquan sur la Shijiazhuang-Taiyuan-a Fervojo malfirmiĝis al trafiko je la 9-a de la lasta septembro kaj funkcias normale.

La fervojo estas ĉefa vojo interliganta la provincojn Shanxi kaj Hebei kaj kondukanta de Shanxi al orienta Ĉinio kaj ankaŭ unu el la kvin arterioj, per kiuj oni transportas karbon de Shanxi al aliaj lokoj. Se la tuta fervojo estos provizita per elektra lokomotivoj, la trapasa kapablo kreskos de 68 ĝis 144 paroj da trajnoj kaj la vartransporta kvanto duoble leviĝos.

PLANO PRI FORSTOKULTURO ANTICIPE PLENUMITA

Ĉinio anticipe plenumis la kurantjaran planon pri forstokulturo je ses monatoj. En la unua duonjaro oni kulturis pli ol 4 milionojn da hektaroj da arboj. Oni starigis novajn forstozonojn en tiuj lokoj de norda, nordorienta kaj nordokcidenta Ĉinio, kiuj suferis sabloventon, sekegecon kaj erozion. En suda Ĉinio oni starigis uruŝian bazon kaj bazon de rapidkreskaj porlignaj arboj.

Krome, oni forstumis areon de 5.3 milionoj da hektaroj sur montoj kaj plantis pli ol 3.3 miliardojn da arboj apud vojoj, riveroj, vilaĝoj kaj loĝdomoj. La novaj forstozonoj povas ŝirmi 1.7 milionojn da hektaroj da agroj.

10 BAZOJ DE EKSPORTAĴOJ KONSTRUITAJ EN XINJIANG

La Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono aktive disvolvas produktadon de eksportaĵoj. Nun tie jam konstruiĝis 10 bazoj de eksportaĵoj, kiel de tapiŝoj, Sanbei-ŝafoj, lupoloj, viandbovoj, musteloj, mosk-ratoj kaj ruĝcervaj junkornoj. La totala vendovaloro de eksportaĵoj de la 10 bazoj en la jaro 1979 atingis pli ol 39 milionojn da juanoj, kiu konsistigis 23% de la totala aĉetsumo de eksportaĵoj de tiu regiono en la sama jaro.

OPTIKAJ FLUORITOMINEJOJ TROVITAJ EN ĈINIO

Liu Zhiqing, vicprofesoro de la geologia fakultato de Zhejiang-universitato, kune kun ses studentoj trovis optikajn fluoritominojn dum sia prospektorado en la provinco Hunan. Iuj el tiuj minoj estas altgradaj kaj havas ekspluatan valoron. Fluorito estas valora natura materialo por fari optikajn instrumentojn. Tiaj minoj estis trovitaj malmulte en la mondo kaj unuafoje en Ĉinio.

CINAJ NATURAJ REZERVEJOJ PLIIGOTAJ

La nombro de la naturaj rezervejoj de Ĉinio kreskos de 72 ĝis 300, kaj ilia areo plimultiĝos de 1.71 milionoj ĝis 9.6 milionoj da hektaroj. La plano estis ellaborita en la Unua Tutlanda Laborkunveno pri Divido de Naturaj Rezervejoj okazinta antaŭ nelonge en Chengdu.

NOVA KONTRAŬRABIA VAKCINO EN ĈINIO

La Wuhan-a Instituto pri Biologiaj Produktaĵoj en kunlaboro kun

aliaj fakaj organizoj elfaris kvar specojn de porhoma kontraŭrabia vakcino el renaj histoj de rato, kiujn Ĉinio havis neniam antaŭe.

Rabio devenas ĉefe de hundo rabia. Nun tia malsano cirkulas vaste en la mondo, inkluzive Ĉinion. Dum la lastaj cent jaroj diversaj landoj faris kontraŭrabian vakcinon ĉefe el ŝafa cerbo. Tia vakcino facile kaŭzas nervan metamorfozon, eĉ dumvivan kripliĝon aŭ morton al certaj pacientoj. Por solvi tiun problemon, iuj landoj komencis esplori kiel fari vakcinon el histoj, en la 60-aj jaroj. Tamen nur kelkaj el ili sukcesis.

NOVA TEKNIKO POR GENERI PANDOJN

Ĉinio unuafoje sukcesis fari aparaton por kolekti spermon per ekscito de elektro kaj tiel starigis rekordon generi pandojn per artefarita ensemado. Pasintjare la Beijing-a Zoologia Ĝardeno aplikis la novan teknikon, tiel ke iu pandino naskis samtempe du idojn. Ankaŭ bone efikis plurfoja provado de tia aparato per elektra ekscito al la rektumo de makula cervo, ruĝa cervo, bovo, kapro, ŝafo, Gango-simio, kuniklo, porko k.a.


LA MEZNOMBRA AĜO DE ĈINOJ EN MULTAJ LOKOJ SUPERIS 70 JAROJN

En somero de la kuranta jaro la Ĉina Medicina Asocio okazigis en Harbin la Unuan Tutlandan Simpozion pri Higiena Statistiko. En ĝi estis voĉlegitaj 50 disertaĵoj, inter kiuj nemalmultaj faris relative profundan esploron kaj analizon pri la loĝantaro. Ili montris, ke meznombra aĝo de la loĝantoj en granda parto de Ĉinio superis 70 jarojn, tio signifas, ke Ĉinio jam viciĝis inter la avangardaj landoj en tiu flanko. Laŭ statistiko antaŭ la Liberiĝo, la meznombra aĝo de ĉinaj loĝantoj estis nur ĉ. 40 jaroj.

HOU ZHIPING:

Memore al kamarado Eltunko

Kamarado Eltunko



LA unua de decembro de la kuranta jaro estas la 31-a datreveno de la martiriĝo de Eltunko. Eltunko estis fama ĉina esperantisto en la kvardekaj jaroj. Antaŭvespere de la liberiĝo de Chengdu (Ĉengdu) en 1949 li estis mortigita de la kuomintang-a reakciularo en malliberejo de Chengdu.

Frue en la komenca periodo de la tridekaj jaroj Eltunko jam havis konon pri Esperanto. Tiam li servis en malnova armeo en Tongguan de Shaanxi (Senhi)-provinco, en kiu estis progresema intelektuloj. Ili ofte pruntedonis al li progresemajn librojn kaj propagandis al li Esperanton. Influante de ili, li komencis mem lerni Esperanton.

Somere de 1934 li petis forpermeson kaj veturis al Shanghai (Sanhajo). Tie li lernis en Esperanta kurso aranĝita de la Shanghai-a Esperantista Ligo. Poste li revenis al Xi-an (Hi-an) kaj aliĝis al la Xi-an-a Esperanta Asocio. Li aktive partoprenis en la kontraŭjapana nacisava movado, faris propagandon kaj disvastigon de Esperanto kaj

samtempe redaktis kaj eldonis la revuon "Xi-an-a Esperantisto" kune kun aliaj samideanoj. Vintre de 1939 li atingis Chongqing (Ĉongking). Tie li laboris en la Koresponda Esperanto-Lernejo kaj fariĝis kapabla helpanto de kamarado Venlo Fen, ĉefa respondeculo de la lernejo. Eltunko ankaŭ fondis Esperantan kurson en la librejo "Vivo" kaj aliaj lokoj. Kvankam li ne havis regulan salajron kaj ofte suferis malsaton, tamen li kun granda entuziasmo faris la laboron de la lernejo. En 1940 li fondis la revuon "Ĉina Esperantisto", al kiu li elverŝis multan ŝviton. En 1941 komunisto Eltunko devis forlasi Chongqing pro la subpremado de la kuomintang-a registaro al la revoluciaj fortoj.

En la postaj ĉ. dek jaroj li sin okupis pri Esperanta movado kun Chengdu (la ĉefurbo de Sichuan) kiel centro. En tiu urbo li unuigis nombron da junaj esperantistoj, fondis Esperantajn kursojn, aranĝis Esperantan ekspozicion, organizis la Lingvan Asocion de Sichuan-

universitato kaj kontaktiĝis kun fremdlandaj progresemaj esperantistoj. Li fondis la Esperantajn revuojn "Ĵurnalisto", "El Ĉina Muziko", "Ĉinio en Karikaturoj" k. a., per kiuj li prezentis al diverslandaj esperantistoj la veran staton de Ĉinio, malkaŝis intrigojn de la kuomintangaj reakciuloj pri la interna milito kaj raportis la novan vivon de la popolo en la liberigitaj regionoj. Tiam li estis membro de la Tutmonda Ĵurnalista Asocio kaj publikigis siajn artikolojn en la bulgara revuo "Internacia Kulturo", kiuj raportis la deziron de la ĉina popolo pri demokratio kaj paco kaj la popolan liberigan militon.

En tiu periodo Eltunko vivis tre malfacile. Pro malbona nutro kaj trolaciĝo de laboro li eksuferis ftizon, sed li persistis en la laboro.

Eltunko estis multtalenta esperantisto kaj bone sciis precipe muzikon kaj poezion. Li esperantigis la ĉinajn kantojn "Gefratoj Plugas", "La Marŝo de l' Volontuloj" kaj "Vojo Nia Pen'". Li diris: "Esperanto

estas muzika lingvo de la mondaj popoloj kaj oni devas disaŭdigi per ĝi kantojn de la ĉina popolo al la mondo." En 1946 la Verdstela Ĥoro de Chengdu prezentis la de li esperantigitan operon "Gefratoj Plugas" kaj la urba radiostacio dissendis ilian programeron kun granda sukceso. Ĉar ĝia kantoteksto estis esperantigita kun rigoraj rimoj kaj klaraj ritmoj, ĝi estas tre taŭga por kantado. Tiam la Bulgara Radiostacio dissendis ĝian fragmenton.

Eltunko estis firma revolucia batalanto. Li faris bravan batalon kontraŭ la kuomintang-aj reakciuloj por la liberiga afero de la ĉina popolo kaj fine oferis sian junan vivon.

En 1935 li estis arestita de la kuomintang-a registaro en Xi-an pro kontraŭjapana propagando. Lia patro estis altranga oficisto de la Lianyungang-Tian-shui-a Fervojo. Por savi sian filon li elspezis multe da mono. La aŭtoritatoj de la malliberejo konsentis liberigi Eltunkon, kondiĉe ke li pentofaros. Li

respondis: "Mi havas nenion por pentofari!" Poste la reakciuloj iom malaltigis sian kondiĉon, ke ili liberigos lin se li subskribos por garantii, ke li ne plu sin okupos pri revoluciaj agadoj. Ankaŭ tion li kategorie rifuzis. Nur en la lasta duonjaro de 1937, kiam la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Ĉina Kuomintango kunlaboris por kontraŭbatali la japanajn agrestantojn, Eltunko estis liberigita.

En 1948 Kuomintango disvas-tigis sian enlandan kontraŭkomunistan militon kaj Eltunko denove estis arestita. En la malliberejo li daŭre propagandis kaj lernigis Esperanton. Li ĉiamaniere klopodis por akiri informojn pri la revolucia batalo de la popolo, skribis ilin sur higiena papero kaj ĝin cirkuligis inter malliberuloj por kuraĝigi ilian batalvolon. Tion rimarkinte, la malamikoj lin kruele torturis, sed li neniom fleksiĝis. Li eĉ publike riproĉis la direktoron de la malliberejo kaj Jiang Jieshi (Ĉiang Kajŝek) kaj pro tio la malamikoj lin

katenis al fera fenestro. Por batali kontraŭ la persekutado de la malamikoj, kun heroa sentimeco li laŭte kantis "La Internacion" kaj kantojn pri la Popola Liberiga Armeo. Timante, ke aliaj malliberuloj aŭskultas lian kantadon, la banditoj devigite forprenis de li la katenon.

Je la unua de decembro de 1949, antaŭvespere de la liberiĝo de Chengdu, la kuomintang-aj reakciuloj masakris la politikajn malliberulojn. Multaj estis eskortitaj al ekzekutejo. Tiam Eltunko rifuzis ascendi la prizonan aŭton al ekzekutejo kaj estis pafmortigita en la prizono. Post la liberiĝo, sur la muro de la prizono oni trovis la Esperantan vorton "Espero" skribitan de li, tio montris lian sopiron al la bela perspektivo de la homaro. Kaj tiel la 35-jara revoluciulo oferis sian karan vivon al la patrolando kaj la revolucio!

Kvankam k-do Eltunko forlasis nin, tamen lia heroa figuro ĉiam vivos en nia koro.



Verkoj esperantigitaj de Eltunko

Mia kompetenta mentoro

ANTAŭ 36 jaroj, en granda ĉagreno pro la politika situacio kaj malriĉega vivo, mi komencis lerni Esperanton. Mi fantazie intencis vidi novan mondon tra nove trovita fenestro de Esperanto por akiri eĉ iom da spirita konsolo. Mi troviĝis en grandega melankolio por la grave vundita Patrio. Interesa kolektado de poŝtmarkoj kaj bildkartoj allogis min, kaj iaj fantazioj alvokis min. Mi volis scii, kiel oni vivas en Usono, Sovetunio, Svisio k. a. Eble Esperanto servos al mi kiel fenestro? Mi lernis tre rapide kaj post duonjara lernado mi jam povis korespondi kun fremdlandaj samideanoj. Ni interparolis pri amikeco, pri personaj ŝatoj kaj pri neviditaj pejzaĝoj. En Esperanto mi trovis oazon meze de la kruela reala socio.

Foje, tute hazarde, mi konatiĝis kun iu esperantisto surstrate, pere de verda stelo sur lia brusto. Li konigis al mi alian esperantiston Eltunko. Li estis malgrasa kaj alta, kun pala vizaĝo. Li kuŝis en hospitalo funkciigita de fremduloj. Li aĝis ŝajne malpli ol 30 jarojn. Estis vintro. Li vestis sin malmulte, tamen aspektis gajhumora. Li ofte ridadis senĝene. Post unu monato mi trovis, ke li estas tre firmvola kaj optimisma al la vivo. Ĉar ni ambaŭ suferis pro la mizera vivo, ni fariĝis tre intimaj amikoj.

Post nelonge mi ekhavis profesion en la redakcio de iu demokratia ĵurnalo. Sub la plumnomo de Jamaŝisa Toĝi, Eltunko skribis por nia ĵurnalo poemojn kaj eseojn. Li komisiis min publikigi en la felietono de la ĵurnalo specialan rubrikon pri Esperanto. Lia trafa analizo pri la situacio forte skuis min. Poste li rekomendis min korespondi kun kelkaj fremdlandaj ĵurnalistoj. Inter ili estis ĉeĥoslovakia Zalupusky kaj dana Sonderbo. Mi komencis skribi artikolojn por iliaj ĵurnaloj kaj iom post iom sereniĝis mia penso. Foje Eltunko donis al mi la ĵurnalon «Xinhua Ribao», petante ke mi esperantigu poemon en la ĵurnalo. Mi ĝoje akceptis lian peton. La poemo legiĝas jene:

*Flugas libere, flugas birdet'
jen en aer',*

*Naĝas libere, naĝas fiŝet' en
river'.*

*Sed gefratoj, kie por ni parola
liber'*

Kanta liber'?

Diru min! Ĉu ne rajtas paroli,

Kanti kaj eĉ voli?

Ni ĝoje kantis tiujn versaĵojn. Poste li adaptis la poemon al melodio kaj publikigis ĝin en la gazeto «Ĵurnalista» kiun li eldonis per privata monrimedo. Sub la influo de lia demokratia penso kaj la helpo de aliaj

komunistoj, mi fariĝis radikala kaj skribis multajn artikolojn kontraŭ la putreco kaj diktatoreco de la malnova registaro. Mi decidis forlasi la malpuran medion kaj iri al la liberigita regiono gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio. Li tute aprobis mian decidon. Poste mi informiĝis, ke li estas komunisto.

En 1948, antaŭ ol iri al la liberigita regiono, mi sendis al li per poŝto mian unikan drapan surtuton. Post nelonge, nia gerila taĉmento estis ĉirkaŭita de kuomintanga trupo kaj post la trarompo mi sola venis al Nanjing (Nankino). Tie mi serĉadis partian organizon. Mi estis tre malriĉa. Informiĝinte pri tio, Eltunko volis tuj resendi al mi la surtuton. Li diris, ke mi ĝin bezonas pli ol li, ĉar mi estas en la fronto. Mi respondis: “Mi havas varman familion, dum vi vivas en la medio kruela.” Post du monatoj mi denove venis al la liberigita regiono. Tio estis la lasta korespondo inter ni.

En la komenco de 1950 mi venis al Chengdu (Ĉengdu) triumfe kune kun nia armeo. Amikoj sciigis min, ke Eltunko mortis en malliberejo de Kuomintangoj. Kun granda doloro mi venis en lian karceron kaj vidis sur muro la Esperantan vorton “Espero” skribitan de li. Kamarado Zhong, kiu siatempe estis en tiu karcero kune kun li, diris al mi: “Eltunko tre obstine batalis en la malliberejo. Foje, dum mallibereja promonado Eltunko diris al mi: ‘Mi estas preta oferi mian vivon. Se poste vi sukcesos eliri el la malliberejo kaj renkontos kamaradon Lin Lan en la armeo, petu lin iri al mia tombo kaj tiam mi povos trankviliĝi.’”

Pro okupateco mi ne povis resti longe en Chengdu. Nur post kelkaj jaroj mi havis okazon plenumi lian deziron. En pluva tago de la unua tagdeko de aprilo, mi sola venis al la Shierqiao-a Martira Tombejo, kie troviĝas la tombo de Eltunko. Vento sentigis al mi malvarmon. Jus aperis burĝonoj sur salikbranĉoj, ankoraŭ ne reverdiĝis la herboj. La tombejo impresis ege dezerte. Sed tie jam estis metitaj multaj girdandoj. Mi riverencis antaŭ la tombo de Eltunko kaj diris al li: "Liberiĝis Ĉinio kaj mi revenis. . ." Mi esploris nereteneble. Subite mi trovis sovaĝan purpuran floron sur la supro de lia tombo. La floro estis unika en la tuta tombejo. Ĝi disvolviĝis en rideto. Mi pensis, ke ankoraŭ vivas mia Eltunko. Mi plukis la floron kaj sendis ĝin al mia amiko, amiko ankaŭ de Eltunko, kiu okupis sin en Beijing (Pekino) pri la afero dezirata de Eltunko: akceli kulture interŝanĝon kaj interkomprenon inter Ĉinio kaj aliaj landoj per Esperanto. Kaj por tiu celo Eltunko eldonis diversajn gazetojn per tre simplaj metodoj de mimeografado, litografado k. a. Sendube, pro tio lia vivo fariĝis ĉiam pli malfacila. Sed nun la belega gazeto «El Popola Ĉinio» distribuiĝas al diversaj lokoj de la mondo. Se Eltunko sciis tion, li certe montrus grandan ĝojon.

Forpasis jam 31 jaroj de post la martiriĝo de Eltunko, sed lia obstina batalspirito kaj lia optimisma sinteno al la homa vivo ĉiam havas influon sur min. Ofte aperas antaŭ miaj okuloj lia figuro kun mieno de gaja ridado. Li eĉ iris en mian romanon lastatempe verkitan. En la romano li estas subtera komunisto, kaj



Chengdu-aj esperantistoj antaŭ la martira tombejo kie kuŝas Eltunko.

la incidento pri pluko de la sovaĝa floro sur lia tombo disvolviĝis en gravan ĉapitron de la romano. Multaj legantoj estis kortuŝitaj de tiu ĉapitro. Kamarado Eltunko meritis, ke oni

honoris lin per la brila stelo en la historio de la ĉina Esperantomovado. Kvankam la stelo jam falis, kio longe dolorigis min, tamen lia brilo ĉiam restos en mia koro.

ĈINAJ POEMOJ

Hejmen-reveno

de HE ZHIZHANG (659-744 p.K.)

En mia frua juneco,

Mi mian hejmon forlasis.

Kiam mi hejmen revenis,

En maljuneco mi fazis.

La hejma ton' ne ŝanĝiĝis.

Miaj tempioj griziĝis.

Al mi geknaboj mir-mienis,

Demandis min kun rideto:

"De kie gaste vi venis?"

ANTAŬ FORVOJAĜO

de MENG JIAO (751-814 p.K.)


En mano de l' kara patrino fadeno,

Sur la forvojaĝonta filo vestaĵo.

Antaŭ la foriro kudradas ŝi dense,

Timante ke malfruos lia reveno.

Tradukis ĈEN ĈAŬJIN (Chen Zhaoying)



Shouxihu-lago

XIAO XUESHENG:

Vojaĝo al Yangzhou



JAM delonge mi volis vojaĝi al Yangzhou (Jangĝoŭ). Tamen tiu deziro realiĝis nur en la somero de la kuranta jaro.

Yangzhou estas antikva urbo kun historio de 2,400 jaroj. Ĝi situas ĉe la norda bordo de la malsupra Changjiang (Jangzi)-rivero kaj havas areon de 67 kvadrataj kilometroj kaj 280,000 loĝantojn. De Nanĵing (Nankino), la ĉefurbo de Jiangsu (Giangsu)-provinco, ĝis Yangzhou, mi veturis 2.5 horojn per aŭtobuso.

Antaŭ ol la aŭtobuso atingis la urbon, mi jam vidis elegantan antikvan pagodon. Oni diris al mi, ke

tiu sep-etaĝa pagodo konstruiĝis el brikoj kaj lignoj. Ĝi nomiĝas Wen-feng, kiu staris ĉe la suda antaŭurbo preskaŭ 400 jarojn. Poste, mi ascendis ĝian supran etaĝon kaj havis panoraman vidon de la urbo.

Iu nelarĝa rivero zigzage trafluas la urbon de la nordoriento al la sudokcidento, pasas preter la pagodo kaj fluas en Changjiang-riveron. Ĝi, je pli ol 900 jaroj pli aĝa ol la pagodo, estis parto de la fame konata Granda Kanalo inter Beijing (Pekino) kaj Hangzhou (Hangĝoŭ). En 1958 la popolo de norda Jiangsu fosis ĉe la orienta antaŭurbo larĝan kaj rektan akvovojon, kiu anstataŭas la zigzagan parton. Kaj oni nomas tiun parton "Antikva Kanalo".

Rigardante la kvietan akvon, mi pretervole memoris la imperiestron de Sui-dinastio Yang Guang, faman diboĉan tiranon en la ĉina historio.

En la komenco de la 7-a jarcento, por ŝipe vojaĝi al Yangzhou li rekviziciis pli ol 1,000,000 popolanojn por fosi grandan kanalon de Luoyang, la tiama ĉefurbo, ĝis Yangzhou centojn da kilometroj longan. Post fosado li veturis suden al Yangzhou per granda drakŝipo, en akompano de pli ol 100,000 alt-ranguloj, palacaj servistinoj kaj gvardianoj. La ŝiparo longis eĉ cent kilometrojn. Kiom da suferoj tiu tirano alportis al la popolo pro sia plezura vojaĝo!

Sed ĉiu ajn objekto havas sian dualecon. Objektive tiu kanalo turnis Yangzhou en gravan lokon de trafikado. En Tang-dinastio (618-907 p. K.) Yangzhou estis ne nur grava komerca urbo de Ĉinio, sed ankaŭ unu el la gravaj havenoj por ekstera komerco. Salo, teo, greno kaj metiartaĵoj produk-


titaj en la basenoj de Changjiang- kaj Huaihe-riveroj koncentriĝis tie por transportiĝi aliloken. Miloj da arabo kaj persoj venis tien por komerco. Multaj ĉinaj komercaj ŝipoj navigis de tie al Japanio, sudorientaziaj landoj kaj orienta Afriko. Hodiaŭ ni ankoraŭ povas trovi multajn poemojn el la "Poemaro de Tang-dinastio" laŭdantaj la prosperan Yangzhou. Bedaŭrinde, en la Suda Song-dinastio (1127-1279 p. K.) tiu prospero estis multe detruita de la suden-ekspediciaj trupoj de Jin-dinastio (1115-1234 p. K.) aperinta en norda Ĉinio. Poste en Qing-dinastio (1644-1911 p. K.) Yangzhou iom revigliĝis en ekonomio, tamen estis malpli prospera ol en Tang-dinastio. En la lastaj cent jaroj ĝi plurfoje suferis de militoj. Ĉe la liberigo en 1949 ĝia ekonomio preskaŭ bankrotis, ĉie vidiĝis depresio, kaj la popolo vivis tre mizere.

La fondiĝo de la nova Ĉinio havigis al tiu urbo novan vivon. En la pasintaj 30 jaroj konstruiĝis en la urbo 230 fabrikoj. En ĝiaj suda kaj orienta antaŭurboj jam formiĝis industriaj kvartaloj.

Mi vizitis dizel-fabrikon ne malproksime de la pagodo Wenfeng. Fabrikestro Zhou Jisheng en laborvesto akceptis min. Li estis unu el la unuaj laboristoj dum fondiĝo de la fabriko en 1950. Li bone konis sian fabrikon kaj rakontis al mi, ke ili antaŭe povis produkti nur simplajn maŝinojn por prilabori agrikulturajn produktaĵojn kaj poste komencis projekti kaj produkti dizelojn de la tipo 495. Nun ĉiujare tiu fabriko produktas maksimume 5,600 dizelojn, kies kvalito estas unuaklasa inter la samspecaj dizeloj de la tuta lando. Ĝiaj dizeloj havas debiton en 9 provincoj. Parolante Zhou radiis de fiero, sed li ne kaŝis la mankojn de la fabriko. Li diris: "La uzo-tempo de niaj dizeloj estas malpli longa ol tiu de avangardaj fremdlandaj dizeloj, kaj ni devas fari penojn."


En disvolvo de sia industrio Yangzhou iris ankaŭ zigzagan vojon. Ekzemple, al tiu loko mankis erco, sed oni konstruis afinaciajn fabrikojn dum la kultura revolucio. Tamen la erco devis esti transportata de alia loko, kio kaŭzis al la fabrikoj malprofiton en ĉiu jaro. Nun la magistrato metis sian ĉefan atenton sur disvolvon de la industrioj malpeza, tekstila kaj elektronika, de turismo kaj ekstera komerco, kaj produktadon de metiartaĵoj.

La kamparanoj de tiu regiono bredas multajn porkojn kaj anasojn, kio liveras abundajn materialojn por fari ledŝuojn, lanugajn vestojn, ladmanĝaĵojn k. a. Kiam mi vizitis ledŝuan fabrikon, mi vidis, ke en la koridoroj kaj ĉiuj vakaj lokoj amasiĝas materialoj kaj produktaĵoj. Fabrikestro Yang diris al mi: "En la lastaj tri jaroj la produktokvanto ĉiam pliiĝis. Laŭ la ĉijara plano ni devas produkti 300,000 parojn da ŝuoj, tial la fabrikdomo ne sufiĉas por produktado." La altklasaj ledŝuoj faritaj de tiu fabriko vendiĝas en pli ol dek landoj kaj regionoj, kiaj Francio, Usono, Japanio kaj FR Germanio, kaj ricevis laŭdojn de tieaj klientoj. La vesto-farejo konstruis novan fabrikdomon kun areo de 3,000 kvadrataj metroj, en kies ĉirkaŭaĵo plantiĝis arboj kaj floroj, tiel ĝi fariĝis bela kaj pura. La komercistoj el fremdaj landoj post vizito de la fabriko estis kontentaj pri la kvalito de ĝiaj lanugaj vestoj kaj iuj el ili eĉ deziris monopoli la vendadon de ĉiuj ĝiaj produktaĵoj.



La pagodo Wenfeng

Krome, Yangzhou ĝuas famon en farado de lakajoj, jad-skulptaĵoj, papertranĉaĵoj kaj pluŝaj pandoj. Inter ili la lakajoj kaj jad-skulptaĵoj jam havas historion de pli ol 2,000 jaroj. Laŭdire, la granda jad-skulptaĵo "Dayu Bridas Superakvon" kun pezo de 5.5 tunoj, konservata en la Muzeo de la Imperiestra Palaco en Beijing, estis verko de Yangzhou-aj metiartistoj en la mezo de la 17-a jarcento. En la kvardekaj jaroj de la kuranta jarcento la belartaj metioj de Yangzhou estis sufokitaj. Post fondiĝo de la nova Ĉinio la loka popola registaro organizis pli ol dek unuopajn metiartistojn de



Metiarta majstro de lakajoj



*Japanaj geamikoj
elektas por si
memorajojn en la
Yangzhou-a Ja-
dajejo.*



JILIN (GILIN), situanta inter branĉaj ĉenoj de Changbaimontaro, estas la dua granda urbo de Jilin-provinco de Ĉinio. Kiel blanka silka rubando, la Dua Songhua-rivero, fontanta el la lago sur Baitou-monto, trakuras kaj plibeligas la urbon. Tie longa estas vintro kaj ekneĝas en profunda aŭtuno. Ĝia meznombra temperaturo en vintro estas inter 20° C kaj 30° C sub la nulo. En la frosta vintro mi faris ĝojan vojaĝon al la urbo.

Matene, starante antaŭ la fenestro, mi rigardis blankajn kaj brilajn "glaciflorojn" sur ĝi, iuj similis al puraj neĝlotusoj kaj aliaj al disflorantaj peonioj. Kvankam ili ne havis koloron nek ebrigan aromon, tamen ili per siaj diversaj desegnoj riĉigis imagon de homoj kaj donis al ili ĝuon de arto. Mi rigardadis kaj imagadis, subite mi rimarkis, ke la vitroj de la fenestro ore ekbrilis. Ho, leviĝis la suno!

Ekstere la mondo sin vestis en glacio kaj neĝo. Malproksime ondis montĉenoj kovrataj de neĝo; proksime estis la supra parto de Songhua-rivero — la Dua Songhua-rivero. Je pli ol 30°C sub la nulo, la tero alfrostiĝis dike kaj la rivero glaciĝis solide. Sur la surfaco de la rivero jam kuris ŝarĝ-aŭtoj. Tamen la proksima parto de Songhua-rivero ne glaciĝis kaj fluis torente. Super la rivero regis nebuloj, kvazaŭ nubaro super altmontoj. Kaj la larĝa Jilin-pontego, kvazaŭ levata de ondoj, pendis en la nubaro.

Kial tiu parto de Songhua-rivero ne glaciĝis? Ĉar ĉe la supra parto de la rivero en distanco de pli ol 20 kilometroj for de ĝi estas Fengman-hidroelektrujo de Songhua-lago. Sub la frapado de la padeloj de la gigantaj turbinoj de la hidro-

lakaĵoj kaj jad-skulptaĵoj en produktan kooperativon. Nun tiu urbo havas 12 fabrikojn de metiartaĵoj kun 4,400 laboristoj. Krome oni starigis du institutojn pri metiartaĵoj kaj unu metiartan lernejon. Mi vidis en iu lakajfabriko belan mozaikan lakajojn. La nigrebrila lakita skatolo estas inkrustita per buntaj perlamotopecoj, malgrandaj kiel rizgrajno kaj maldikaj kiel cikada flugilo, kiuj formas desegnon de floroj, insektoj kaj birdoj. Ĝi aspektas kiel glata spegulo rigardata de proksime kaj reliefo rigardata de malproksime.

Yangzhou havas multajn historiajn lokojn, kiaj la maŭzoleo de Yang Guang, imperiestro de Suidinastio, la restaĵo de urbomuroj de Tang-dinastio, la tombo de araba misiisto Burhanding veninta al Yangzhou en la lastaj jaroj de la Suda Song-dinastio, la tombo de la vestaĵoj de la nacia heroo Shi Kefa de Ming-dinastio kaj lia memorhalo kaj nombro da elegantaj privataj ĝardenoj de mandarenoj kaj riĉaj komercistoj de Qing-dinastio. Sed la plej allogaj por mi estas Shouxi-lago kaj Daming-templo.


Shouxi-lago situas en la nordokcidenta antaŭurbo de Yangzhou. Antaŭe en tiu loko estis pluraj riveroj interkruciĝantaj. De la dinastioj Sui kaj Tang, oni iom post iom konstruis la lokon en ĝardenon kun originaleco per la ĉina ĝardenistiko laŭ la lokaj naturaj kondiĉoj. En tiu akva lando ĉirkaŭita de montoj sin trovas la Teraso por Fiŝokado,

la Blanka Pagodo, la Ponto kun Kvin Kioskoj k. a. Se oni diras, ke la Okcidenta Lago de Hangzhou estas plena kaj serena, do ĝi vidiĝas svelta kaj eleganta.

Norde de la lagobordo, mi trovis antikvan templon kun griza tegmento kaj nigraj muroj inter pinoj kaj cipresoj sur monteto. Ĝi estas Daming-templo konstruita antaŭ 1,500 jaroj. La budhaj statuoj en ĝi estas bone konservitaj. Ili, reoritaj, aspektas impone. Tangdinastia bonzo Jianzhen estis abato de tiu templo, antaŭ ol ŝipveturi al Japanio en la mezo de la 8-a jarcento. Li ofte predikis en la templo. En 1973 oni konstruis, nordoriente de la templo, memorhalon de Jianzhen de Tang-dinastia arkitekturo. En la lasta printempo la statuo de Jianzhen estis eskortita de Japanio al Yangzhou kaj lokiĝis tie por ekspozado. Okcidente de la templo estas la kvietaj kaj gracia antikva ĝardeno Xiyuan, kie troviĝas monto kaj akvo, verdas bambuoj kaj arboj. En la kiosko Yubei konserviĝas ŝtonplatoj kun gravuritaj skriboj de la imperiestroj Kangxi kaj Qianlong de Qing-dinastio dum ilia vizito al Yangzhou. En la templo kreskas antikva arbo sep metrojn alta, kiu altiris al si multajn turistojn. Ĉiu ĝia floro konsistas el ok blankaj floretoj kun 5 petaloj, similaj al arĝenta girlando. Bedaŭrinde mi venis ne en ĝusta tempo. La gastiganto diris: "Venu en la venonta printempo, kiam disfloros tiaj floroj."

VINTRO EN JILIN

de ZHOU YUCHEN



elektrejo, la akvo, fluanta el sub la glacitavolo de Songhua-lago, fariĝis varma fluo. La parto de la rivero inter Fengman-hidroelektrejo kaj la urbo Jilin ne nur ne glaciĝas, sed male senĉese vaporigigas. Pro tio en tre malalta temperaturo, la arboj ambaŭflanke de la rivero sin vestas per dika prujno. Tiaj belaj vidaĵoj de tiu urbo estas pli multaj kaj daŭras pli longe ol en aliaj lokoj de Ĉinio. Precipe la pejzaĝo ĉe la norda bordo estas plej bela, ĉar tie abundas suda vento en vintro.

Pro la beleco oni ankaŭ nomas ilin vaporaj floroj aŭ glacieroj. Ili kondensiĝis sur diversaj arboj kaj prenis malsamajn pozojn. Iuj el ili similas al spikoj de fragmitoj, kaj aliaj al umearboj. La longaj branĉoj de plorsalikoj sin tenis kva-

zaŭ blankaj ĉenoj kaj arĝentaj fade-
noj, la glacivestitaj pinopingo-
aspektas kiel disflorantaj krizantemoj.
Kiam ventetas, la arĝentaj branĉoj
skuetiĝas kaj petaloj de la glaciaj
floroj flirte falas sur la korpojn de
preterpasantoj. Promenante sur la
bordo laŭlonge de la rivero kaj ri-
gardante sennombrajn arĝentajn flo-
rojn sur la arboj, mi kvazaŭ enirus
la fabelan mondon. Laŭdire, la
surarba prujno povas ne nur servi
kiel vidindaĵo, sed ankaŭ purigi la
aeron!

La loĝantoj de la urbo Jilin fieras
pro la belaj glaciaj floroj. Matene,
kiam aperas la surarba prujno, oni
ofte frue venas al la bordoj kaj por
sin ekzerci kaj por rigardi la belajn
arbojn.

Post matenmanĝo, Lao Wang,
mia amiko en Jilin, proponis, ke
mi vizitu Beishan-parkon. Ni per
aŭto ekveturis de Jilin-hotelo ĉe la
bordo de la rivero. Sur la vojo ni
vidis artefaritajn glitejojn. Lao
Wang diris, ke la urbo Jilin estas
riverurbo, monturbo kaj ankaŭ la
"urbo de glacisporto kaj skiado".
Tie la glaciĝa tempo daŭras 5
monatojn kaj estas la bona loko, kie
oni faras sportadon sur neĝo kaj
glacio. Infanoj kaj maljunuloj ĉiuj
ŝatas sportojn sur glacio. En postla-
boraj horoj, ferioj kaj festotagoj tre
vigliĝas kelkdekaj naturaj kaj arte-
faritaj glitejoj en la urbo. La postla-
boraj surglaciaj sportteamoj de mul-
taj fabrikoj, institucioj kaj lernejoj
ofte okazigas tie konkurson kun
milo da rigardantoj.

Post mallonga irado ni jam atingis
Beishan-parkon. Antaŭ ni prezen-
tiĝis du blankaj montpintetoj, kiujn
interligas la arkforma ŝtonponto.
Sub la ponto, aroj kaj aroj da gajaj
infanoj sur glitveturilettoj fluge gli-
tis de la montdeklivo malsupren.
Iuj el ili eĉ demetis siajn surtutojn
kaj simple ruliĝis malsupren.

En la nordorienta flanko de
Beishan-monto troviĝas granda
glitejo, unu el la plej bonaj glitejoj
de Ĉinio. Tie multfoje okazis la
tutlanda surglaci-sporta kunveno.
Sur la glitejo ebena kiel spegulo, la
bele vestitaj sportistoj, kiel flugan-
taj glareoloj, libere kaj gaje sketis.
Ili lerte faris diversajn elegantajn
movojn, jen saltadis, jen sin turna-
dis.

Tie iris trejnado de la sketkura
teamo kaj la arta sketada teamo de
la Postlabora Sporta Lernejo de la
urbo Jilin. Nemalmultaj el ili jam
fariĝis elstaraj sportistoj. Ĝiaj spor-
tistinoj Shen Guoqin kaj Bao Zhen-
hua, kiel reprezentantoj de Ĉinio,
flugis al Placid-lago de Usono por
partopreni en la Vintraj Olimpikoj.
Bao Zhenhua, kiu ankoraŭ ne
atingis la aĝon de 15 jaroj, akiris la
22-an lokon de la virina kunmetita
disciplino.


Posttagmeze ni iris al Songhua-lago por rigardi fiŝkaptadon el sub la glacio. Songhua-lago, formita dum konstruado de Fengman-hidro-elektrejo, longas 200 kilometrojn kaj havas areon de 500 kvadrataj kilometroj. En somero brilas ondetoj kaj dissemiĝas velŝipoj. En vintro la vasta surfaco de la lago estas kovrita de glacio kaj neĝo, kvazaŭ blanka jado inkrustita inter montaroj kaj baraĵo de la hidroelektrejo. Ĉe la lago staras vicoj da flavaj kaj hele grizaj etaĝdomoj de la sanatorio. Ĉio aspektas kvieta.

Tamen, tie venas vigeleco post kiam komenciĝis la fiŝkaptado. Kune kun fiŝkaptistoj de la Fiŝkaptejo de Songhua-rivero ni venis sur sledo. Sperta maljuna fiŝisto, kiel lerta ĉasisto, serĉis fiŝarojn sub glacio tie kaj ĉi tie. Kiam li trovis la spuron de fiŝaro, li tuj vokis aliajn veni por rapide bori truojn kaj enmeti reton. Ili tre ĝojis, kiam ili eltiris la pezan reton kun fiŝoj el sub la glacitruoj. En la retoj saltante puŝiĝis karpoj, karasoj, blankfiŝoj, ktp. La maljuna fiŝisto, montrante grandajn fiŝojn rigidiĝintajn, diris ke ambaŭborde de la lago staras altaj montoj kaj densaj arbaroj, tial multe da humo fluas en la lagon kaj abundas la nutraĵoj por fiŝoj. Kiel

oni diras, tieaj fiŝoj plenkreskus dank' al drinkado de la supo el la tonika drogherbo ginsengo (kiu multe kreskas en Jilin-provinco). Precipe la tieaj blankfiŝoj estas famaj tra Ĉinio. En feŭda socio, la fiŝoj estis tributo al imperiestroj. La supo stufita per la fiŝo ankaŭ estas fama plado de Jilin!

Sur la vojo returnen Lao Wang diris al mi, ke ankaŭ estas multaj aliaj interesaj aktivadoj en vintro de Jilin, kiaj ĉasado kaj rigardado al glaciaj lampoj. La glaciaj lampoj


estas faritaj el diversaj koloraj elektraj lampoj, instalitaj en diversformaj gravuritaj glaciaj figuroj, inter kiuj troviĝas homfiguroj, amindaj animalfiguroj, modeloj de grandiozaj konstruaĵoj, majestaj montoj kaj muĝantaj riveroj. Enirinte en la parkon ornamitan per glaciaj lampoj, oni ŝajne iras en la buntan kristalan palacon. La vintro en Jilin per sia aparta pejzaĝo allogas al si turistojn en- kaj eksterlandajn. Ĝi ankaŭ donis al mi neforgeseblan impreson.



Fiŝkaptado en vintro



Mateno en arbaro




Fotoj de WANG SHOULIANG

Vintro de Songhua-rivero

Beishan-parko







Če Songhua-rivero

Arboj post prujno



La pavilono "Hanjiang Xueliu"



FAMA ARTISTO ZHAO DAN FORPASIS

La ĉina fama popola artisto Zhao Dan forpasis pro kancero en Beijing (Pekino) je la 10-a de oktobro, en sia aĝo de 65 jaroj.

Dum sia artista vivo de 50 jaroj, li sukcese kreis multe da artaj figuroj sur la ekrano kaj scenejo. Li estis honorita kiel popola artisto, amata kaj respektata de la amasoj. (Bv. vidi la kovrilon de la 10-a numero de nia gazeto, 1979, kaj nigra-blanka foto-serion "Fama Filmaktoro Zhao Dan".)



La popola artisto Zhao Dan

LA "ĈINA ENCIKLOPEDIO"

La unua volumo "Astronomio" de la "Ĉina Enciklopedio" kun 80 volumoj estos eldonita en la fino de la kuranta jaro. La volumo traktas pri la atingoj en astronomio kaj la longa historio de astronomia studado. Pli ol 200 astronomoj kompilis la volumon dum ĉ. du jaroj.

FINIĜIS LA BEIJING-A INTERNACIA ATLETIKA INVITAKONKURSO

En la 26-a kaj 27-a de septembro okazis en Beijing la nomita konkurso, en kiu partoprenis 264 gesportistoj de Finnlando, Francio, FR Germanio, Britio, Italio, Rumanio, Usono kaj Ĉinio. En la konkurso de 200-metra kuro itala sportisto, ricevinto de ora medalo en la Moskva Olimpikaj Ludoj, gajnis bonan rezulton, kiu superis lian rekordon en Moskvo. La rezulto de lancojetisto de FR Germanio superis tiun de la ĉampiono de la konkurso de lancojetado en la Moskva Olimpikaj Ludoj. Du ĉinaj gajnintoj de ora medalo atingis bonan sukceson en la konkurso.

El la oraj medaloj de la konkurso 12 estis gajnitaj de Britio, 8 de Usono, po 5 de FR Germanio kaj Italio, 2 de Ĉinio kaj po 1 de Finnlando, Francio kaj Rumanio.

Virina 800-metra kuro en la Beijing-a Internacia Atletika Invita Konkurso



LA ĈINA VIRINA MANPILKA TEAMO GAJNIS LA DUAN LOKON

La Tria Franca Internacia Virina Manpilka Invita Konkurso fermiĝis en Parizo je la 2-a de septembro. En la finalo la franca teamo venkis la ĉinan teamon per 21 kontraŭ 19 kaj gajnis la ĉampionecon. La ĉina teamo la duan lokon. Kaj la nederlanda kaj itala teamoj gajnis la trian kaj kvaran lokojn respektive.

Ĉina sportistino Yang Ping gajnis plej multajn poentojn en la konkurso kaj ricevis la "Pokalon por Plej Bona Ĵetistino".

ĈINA FILMO-FESTIVALO EN LONDONO

La nomita festivalo sub la aŭspicioj de la Brita Filma Instituto malfermiĝis la 2-an de oktobro en Londono.

La festivalo prezentis 30 rakontajn filmojn, 4 dokumentajn filmojn kaj 15 mallongajn filmojn, faritajn de Ĉinio en la pasintaj 45 jaroj. Tio estis la rekorda nombro de ĉinaj filmoj unufoje projekciitaj en Britio.


ĈINAJ ANIMAL-PENTRAĴOJ EN NOV-JORKO

Estis eksponataj ekde la 1-a de oktobro en 21 urboj de Usono 300 pentraĵoj de la ĉina fama pentristo Han Meilin. Liaj pentraĵoj ĉefe prezentas animalojn, ekz. pandoj firme brakumantaj unu la alian, sagaca strigo, viglega virkoko, petolemaj simioj, ktp. La animaloj en liaj verkoj estas versimilaj. (Bv. vidi "Pentraĵoj de Han Meilin" en la 8-a numero de nia gazeto de 1979.)

Jurnalistoj parolas kun usona sportistino, kiu gajnis la unuan lokon en la virina 100-metra sprinto.



EN MODERNA LAMINATEJO



La delikat-laminatilo

EN la sudorienta antaŭurbo de Wuhan, ĉe la meza baseno de Changjiang (Jangzi)-rivero, troviĝas nove konstruita laminatado de la Wuhan-a Fera-Ŝtala Kompanio. Ĝi posedas tri kompletojn de grandtipaj laminataj instalaĵoj de la avangarda teknika nivelo de la 70-aj jaroj. Ekde 1979, kiam ĝi komencis prov-produktadon per krudmaterialoj de nia lando, ĝi jam laminatis kvanton da bonkvalitaj maldikaj ŝtalplatoj, kupraj bendoj kaj silici-ŝtalaj ladoj kaj per tio faris kontri-

buon por la moderna konstruado de la patrolando.

EN LA LAMINATEJO

Somere de la kuranta jaro, mi venis al tiu laminatado. Post elaŭtigo, mi vidis tri gigantajn fumtubojn kun alteco de 20-etaĝa domo, kiuj ellasis purigitan fumon. En la fabrika domo de la termolaminatado, pli ol unu kilometron longa, teknikistoj direktas la tutan termolaminatan linion per komputeroj, kiuj povas operacii 600,000-

1,000,000 fojojn sekunde. La ekrano de koloraj televidiloj klare montras ĉiujn procedojn de la produkto. Oni manipulas transruĝajn, silici-regeblajn instalaĵojn por spuri kaj mezuri la dikecon de ŝtalplatoj kaj la produktan efikecon de la ekipaĵoj. Je eta malordo ie ajn aperanta en la tuta produkta procedo, la signalo de la komando tuj eligas alarmon.

Ascendinte la platforman ponton, ni rigardis, ke arde ruĝaj ŝtalŝtipetoj estas elportitaj

el la varmiga forno, trapasis dek unu grandtipajn krud- kaj fajnlaminatilojn, en palpebruma daŭro fariĝis ŝtalplatoj dikaj je 0.35 milimetro, kiuj trapasis tra malvarmigaj instalaĵoj, kvazaŭ flirtantaj "ruĝaj silkkrubandoj" en pluvo. Vere rava spektaklo! Tuj poste, ili estas kunvolvigitaj en volvaĵojn kun diversaj pezaj (la plej granda pezas je tridek tunoj), kaj transportataj al la Kriolaminato. Ni rigardis ankaŭ kontraŭpoluciajn instalaĵojn uzatajn por trakti ellasatajn fumon kaj likvaĵojn. Ĉio ĉi donis al ni freŝan impreson.

Kiam ni venis al la Kriolaminato, ni estis altirataj de la ĉefa kriolaminato regata de pli ol dek komputeroj. Tiu avangarda maŝino kapablas laminati ŝtalplaton en tiel maldikan kiel papero, kaj ĝi povas laminati tridek metrojn da ŝtalplato posekunde. Inter la proksimume cent normoj de ŝtalplatoj ia ŝtalplato estas uzata por pregi karoserion de aŭtomobilo, kies surfaco estas glata kiel spegulo kaj la ekarto de ĝia dikeco ne povas superi kvin mikronojn (proksimume dek-sesono de haro).

ALIA GRAVA KONSTRUAĴO DE METALURGIA INDUSTRIO

La konstruo de tiu ĉi laminata sistemo estis komencita en 1975. Ni informiĝis en la vizito, ke ĝi formiĝis el la instalaĵoj de kriolaminato kaj kontinua muldo importitaj el F.R. Germanio kaj la instalaĵoj por afinacii silician ŝtalon kaj por termolaminato importitaj el Japanio. Ĉar ĉiu el ĝiaj laminataj cilindroj longas je 1,700 milimetroj, tial la sistemo nomiĝas 1,700-milimetra laminata sistemo. Ĝiaj ĉefaj produktaĵoj

estas termo-laminata lado, krio-laminata lado, zinkita lado, stanita lado kaj silici-ŝtala lado uzata por produkti generatorojn, motorojn kaj transformatorojn.

En la fabriksdomoj kun areo de 700,000 kvadrataj metroj instaligis 33 aŭtomacioj, pli ol 280 hidraŭlikaj sistemoj kaj kontrolaj ĉambroj. La longeco de la kabloj kaj tubolinioj instalitaj en ĝi atingis pli ol 27,000 kilometrojn. La nova laminato de la Wuhan-a Fera-Ŝtala Kompanio estas la kvara grava konstruaĵo de metalurgia industrio de Ĉinio, post la plivas-tigo de la Anshan-a Fera-Ŝtala Kompanio en la kvindekaj jaroj, la konstruado de la Rad-ringa Fabriko de la Ma'anŝan-a Fera-Ŝtala Kompanio kaj la Panzhuhua-a Fera-Ŝtala Kompanio en la sesdekaj jaroj. La ŝtata investo superis tri miliardojn da juanoj, kies duono estis uzita por importi instalaĵojn.


"Kian rolon ludos en nia nacia ekonomio la 1,700-milimetra laminata sistemo tiel multekoste importita?" mi demandis ĉefinĝinieron Xu Zhiying


de la Wuhan-a Fera-Ŝtala Kompanio.

Ĉefinĝiniero Xu diplomitiĝis en la Sudokcidenta Unuiĝa Universitato de Ĉinio en la kvardekaj jaroj, kaj longtempe sin okupas pri metalurgia industrio. Li diris, ke investinte tiel grandan sumon, la ŝtato celas ŝanĝi la strukturon de nia metalurgia industrio, ŝpari fremdlandajn valutojn uzatajn por importi ŝtallaminataĵojn, posedi avangardan industrian teknikon de la mondo kaj kulturi teknikajn personojn.

Li diris kun profunda sento: "La Wuhan-a Fera-Ŝtala Kompanio estas grandtipa fera-ŝtala kombino konstruita en la kvindekaj jaroj. Dum la pasintaj pli ol dudek jaroj, kvankam ni afinaciis pli ol 140 specojn de ŝtalo, tamen, kiel aliaj samaj entreprenoj de la lando, ĝi posedis nur postgigantajn ekipaĵojn por laminati ŝtalplatojn, ŝaltubojn kaj diverstipajn ŝtalmaterialojn, kaj malgranda estis la produkta kvanto de maldikaj ŝtalplatoj. Tia neracia stato kaŭzis al la ŝtato elspezon de multa fremdlanda valuto por

Inĝinierino Wu Yongyu





La ĉefa maŝino de la Kriolaminejo

ĉiujare importi bezonatajn ŝtal-laminataĵojn.”

La stato iagrade ŝanĝiĝis, post kiam la novaj laminatiloj komencis produktadon. La produk-

ta povo de maldikaj ŝtalplatoj iom post iom leviĝas. En la unua jarduono, krom plenumi enlandajn mendojn, oni akceptis mendojn de maldikaj ŝtalplatoj

Teknikistoj de la Silici-ŝtala Fabriko Lu Shaohai (maldekstre) kaj Huang Zhengqi kontrolas la kvaliton de laboraj ruliloj.



fare de iuj landoj de sudorienta Azio.

FAJREROJ DE JUNECO

En la tagoj, kiam mi restis en la Wuhan-a Fera-Ŝtala Kompanio, mi estis kortuŝita de bonaj faroj de tiuj personoj, kiuj, por pli frue realigi la modernigon de la patrolando, peneme laboras kaj diligente studas novan teknikon. Iuj el ili lernis kaj praktikis iam en fremdaj landoj, aliaj lernis de fremdlandaj specialistoj la muntadon de instalaĵoj. Tamen, tiuj lernemaj personoj ne blinde imitis en sia praktikado, sed montris sian iniciativon. Unu el ili estas Wu Yongyu, inĝenierino de la Kriolaminejo.

Ŝi diplomitiĝis en la radio-fako en la fizika fakultato de la Ĉina Scienca kaj Teknika Universitato. Kiam ni intervidiĝis kun ŝi, ŝi estis alĝustiganta komputeron por komandi transmision sistemon. Estis ŝi, kiu, kune kun siaj kolegoj, sukcese solvis tempan eraron de integra cirkvito en la transmisiado de indicoj, kaj solvis teknikan malfacilaĵon postlasitan de fremdlandaj specialistoj, nome, la rotacia forto de la bobeno dum aŭtomata volvado de maldika ŝtalplato estis tro malgranda. Estis ŝi, kiu, post atenta observado kaj cerbumado, forigis perturbon en la transmisiado ofte aperintan inter la “elektronika cerbo” kaj unuopaj komputeroj, alĝustiginte parametron de la sistemo.


Ni informiĝis ankaŭ, ke antaŭ la foriro de fremdlandaj specialistoj, inĝenierino Wu Yongyu modeste lernis de ili teknikon kaj memvole helpis ilin en laborado. Foje, fremdlanda specialisto kaprompis

pro misfunkcio de la programa starto de komputero. Oni diris: "Se fremdlanda specialisto ne povas solvi tiun problemon, ĉu ni povus?" Malgraŭ tio, Wu Yongyu serioze klopodis por trovi la kaŭzon. Kvankam ŝi maldormis pro tio, tamen ŝi ne perdis la memfidon. Fine ŝi trovis, ke la kaŭzo de misfunkcio kuŝas en la kondensatoro de la sistemo. Post kiam ŝi alĝustigis la enmetan elementon, malaperis la misfunkcio. Tiam, la fremdlanda specialisto ĝoje premis ŝian manon kaj diris: "Multan dankon pro via helpo, sinjorino Wu!"

Antaŭ nelonge teknikistoj de la Silici-ŝtala Fabriko Lu Shao-hai kaj Huang Zhengqi sukcese prov-fabrikis laboran rulilon por avangarda laminatilo, kontentigis urĝan bezonon en la produktado kaj per tio gajnis unuan premion de scienca esplorado de la kompanio.

La afero okazis tiel. En la fabriko estas importita laminatilo, kiu bezonas sescent laborajn rulilojn ĉiujare. Por importi tiom da ruliloj necesas sescent mil usonaj dolaroj. Kamarado Lu Shaohai decidis mem fari esploron. Li esploris koncernajn eksterlandajn materialojn kaj post eksperimentado fine afinaciis novan specon de ŝtalo. Post tio, kunlaborante kun kamarado Huang Zhengqi, li sukcesis en fabrikado de laboraj ruliloj, venkinte multajn malfacilojn. Rigora ekzamenado konfirmis, ke ili atingis ĉiujn teknikajn normojn postulatajn de la kvalito kaj bone funkcias en la produktado.

Dank' al sia plenenergia laboro, la oficistoj kaj laboristoj de la laminatejo senĉese solvis diversajn problemojn aperintajn




Ĉinaj teknikistoj lernas de germana inĝeniero la reguligon de komputero en la kriolaminejo.

en la produktado, tial multe altiĝis la kvalito de ĝiaj produktaĵoj. Lastatempe, komisiite de la Ministerio de Metalurgia Industrio, specialistoj de frataj fabrikoj de la tuta lando vizitis la kompanion por ekzameni la kvaliton de zinkita lado. Kiam ili vidis produktaĵojn kun egala dikeco, ili kontente laŭdis la oficistojn kaj laboristojn pro la bona atingo. Post rigardo de produktaĵoj de la termo-laminejo, iu usona direktoro sin okupanta pri fera-ŝtala negoco diris, ke la produktaĵoj estas unuaklasaj.

* * *

En la konstruado oni trapasis zigzagan vojon. La tempo de konstruado estis tro longa, kaj

por ĝia produktado ne estis sufiĉe da elektro. Nun, por kontentigi ĝian bezonon pri elektro, la ŝtato konstruas superalttensian linion por elektrotransmisio kaj transformado 610 kilometrojn longan kun 500 kilovoltaj. Post kiam la Gezouba-a Hidroelektra Centralo kun kapacito de 2,700,000 kilovattoj finkonstruiĝos, ĝia potenco kurento estos transmisiota al la laminatejo, kaj tiu lasta faros pli grandan kontribuon al la konstruado de nia lando.





*Ma Xiufeng al laboro en
akompano de Guan Ruoqi*

HONG YING:

ĈIUJ PRIZORGAS ŜIN

LABORISTINO Ma Xiufeng de la Beijing-a Dua Jadaĵejo, paralizita en ambaŭ gamboj, enlitiĝis en la ripoz-ĉambro kaj alia knabino Meng Fanchan elprenis skatolon kun pingloj de diversaj longoj ene kaj senhaste komencis fari akupunkturaron al ŝiaj kriplaj gamboj. Jen ŝi skuis la kapon por esprimi ke ŝi sentis nenion, jen ŝi surprize ekparolis: “Bone, mi sentas la pikon rekte ĝis la plando.” Enpikiĝis ĉiuj pingloj, kaj aperis subtilaj ŝvit-gutoj sur ŝia frunto.

Ili ambaŭ estas knabinoj, kun kiuj mi ĵus konatiĝis. La 24-jara Ma Xiufeng estas serena kaj parolema. Ŝi havas rondajn vangojn sur kiuj ĉiam formiĝas kavetoj ĉe rideto. Ŝi diris al mi ridetante: “Majstro Meng estas tre kuraĝa, ŝi faras enpikadon pli profunde ol akupunkturisto.” “Ĉu malgranda Meng ne estas kuracisto de via fabriko?” mi miris. Je mia demando ili ridklukis, rigardante unu la alian.

Malgranda Ma rakontis al mi la jenon.

Iutage en la komenco de la kuranta jaro knabino Ma estis promenanta kun lambastonoj en la Parko de Ĉiela Altaro, iu grizhara maljunulino fiksitis simpatian rigardon sur ŝiaj kriplaj gamboj. Ŝi detale demandis la knabinon pri la malsano kaj konsilis: “Kiel kompatinda vi estas! Mi provu akupunkturaron al vi kaj rigardu, ĉu ĝi efikos sur vin.” Ŝiaj vortoj tre ĝojigis la knabinon. La maljunulino, pli-ol-70-jara, nomata Chen Shu, estas privata veterana kuracisto, renoma en tiu loko. Ŝi havas profundajn sciojn pri akupunkturo kaj resanigis multajn malfacile kuraceblajn malsanulojn. Post konatiĝo kun malgranda Ma, tiu kuracisto faris akupunkturaron al ŝi fojon ĉiusemajne. Kaj ĉiufoje Meng Fanchan, sekretario de la fabriko filio de la Komunisma Junulara Ligo, akompanis ŝin en ŝia ricevo de kuracado. Meng estas

ne parolema sed pripensema. Kun plena atento ŝi observis la akupunkturadon kaj elmetis diversajn demandojn. Vidinte, ke la knabino estas tre lernema, Chen Shu memvole donis al ŝi fundamentajn akupunkturajn sciojn kaj fervore instruis al ŝi akupunkturadon. Malgranda Meng aĉetis akupunkturajn pinglojn kaj faris provadon unue sur sia korpo. Kiam ŝi trovis sian teknikon praktikebla, ŝi komencis apliki akupunkturaron al malgranda Ma du fojojn ĉiusemajne.

Dum Ma rakontadis, iu laboristino alportis al ŝi manĝon. Fingromontrante ŝin forirantan, Ma diris: “Niaj majstroj traktas min kiel sian filinon kaj la junaj kolegoj kiel sian samsangan fratinnon. Nia vicfabrikestrino Wang Yufeng ofte vizitis mian hejmon por konsoli min kaj doni al mi kuraĝon de vivo. Ĉiufoje, kiam finiĝis la laboro de mia skipo, miaj kolegoj konkure helpis min enĉariĝi, kaj

kelkfoje iuj el ili akompanis min hejmen.”

Je mencio de akompano, malgranda Ma ekpensis pri io kaj elprenis foton el la mansako. Sur la foto vidiĝas eleganta junulo, kiu biciklas apude de la kriplula triciklo de malgranda Ma, puŝante per la dekstra mano. Malgranda Ma diris: “Li nomiĝas Guan Ruoqi. Li estas maŝinisto de la Beijing-a Telekomunika Buroo. Nun li studas en la Beijing-a Poŝta kaj Telekomunika Instituto. Ĉu en ventaj kaj pluvaj tagoj, aŭ en ferioj, li puŝis mian triciklon jam tri jarojn.”

Iun vesperon antaŭ tri jaroj Guan hastis hejmen post laborado. Subite li vidis, ke knabino, paralizita je gamboj, kun granda malfacilo manipulas la triciklon por ascendi ponton. Sed malpufiĝis unu pneŭmatiko, kaj la triciklo neniel povis suprenruliĝi. En tiu momento li tuj venis helpi ŝin. Li unue pufiĝis la pneŭmatikon, poste antaŭenpuŝis la triciklon, kaj akompanis ŝin ĝis ŝia hejmo. Pro tio malgranda Ma dankis lin foje-refoje. Ŝia dankemeco malkvietigis lin. Li pensis, ke prizorgi la kriplulojn estas devo de ĉiu civitano kaj precipe, li, komunisto, devas laŭeble helpi ilin. De tiam li ofte akompanis ŝin al ŝia fabriko matene kaj reveni hejmen vespere. Precipe en malbona vetero li ĉiam akurate venis al ŝia hejmo kaj ŝia fabriko por helpi ŝin. Printempe sablovento blovdas en la urbo, sed Guan venis helpi al ŝi preskaŭ ĉiutage. La tuta familio de malgranda Ma estis tre danka al li. Pasis unu jaro, tamen ili ne konis lian nomon nek sciis, kie li laboras. Ĉiufoje, kiam malgranda Ma demandis,

li ĉiam respondis jene: “Tion mi ja devas fari. Pro kio vi prezentis tian demandon?” Foje malgranda Ma surprizis lin: “Pardonu, mi forgesis vian nomon.” Kaj li senintence eldiris sian nomon. Post multa klopodado la patro de malgranda Ma informiĝis, ke Guan laboras en la Beijing-a Telekomunika Buroo.

Iun matenon de la sekvanta vintro Guan estis riparanta ŝian triciklon duonvoje. Liaj oreloj ruĝiĝis de frosta vento kaj liaj manoj estis makulitaj de lubrikajo. Malgranda Ma ĉagreniĝis vidinte tion kaj murmuretis al si: “Mi kriplulo estas balasto por la socio!” Ŝiaj vortoj lin surprizis, kaj li konsciis, ke oni devas ne nur doni helpon pro ŝia kripleco, sed ankaŭ kuraci la vundon en ŝia koro kaŭzitan de la paralizigo. Li konsolis ŝin: “Ne tion diru. Kvankam viaj gamboj kripliĝis, tamen vi ne estas senutila. Vi persistas en via laboro por kontribui al la socio, ĉu ne?” Poste Guan plurfoje rakontis al ŝi pri herooj-kripluloj. Tio inspiris

malgrandan Ma kaj komprenigis al ŝi, ke ŝi devas esti optimisma en la vivo. Poste Guan ekvizitis lernejon, tamen en vintraj kaj someraj ferioj kaj dimanĉo aŭ en ventaj kaj pluvaj tagoj li ankoraŭ venis helpi ŝin kiel antaŭe.

Multaj homoj en la socio prizorgis kaj helpis ŝin. Kiam malgranda Ma estis unujara, ŝin trafis poliomjelito kaj pro tio ŝiaj gamboj paralizigis. Kiam ŝi ekvizitis elementan lernejon, ŝia ĉefinstruistino Yue ofte dorsportis ŝin al la lernejo. Foje, malgranda Ma falis survoje al la lernejo, iu maljunulo starigis ŝin. Kiam la maljunulo informiĝis, ke ŝiaj gepatroj okupiĝas pri laboro kaj ŝiaj gefratoj estas tre malgrandaj, li volontis esti ŝia akompananto. Poste kiam malgranda Ma lernis en mezlernejo, en malbona vetero ĉiam troviĝis helpantoj el ŝiaj kunlernantoj, iuj dorsportis ŝin, aliaj tenis ŝian librosakon, kaj triaj ŝiajn lambastonojn. Ŝiaj kamaradinoj ankaŭ kunportis ŝin por kune rigardi filmon.

Meng Fanchan faras akupunkturon al Ma Xiufeng.





Ma Xiufeng
en laboro

En 1976, kiam malgranda Ma diplomitiĝis en supera mezlernejo kaj akiris profesion, kamaradoj de ŝia patro faris por ŝi triciklon. En sia ĉiutaga vivo ŝi ĉie renkontis helpemulojn. Iutage post deĵoro ŝi venis al te-butiko. Ĵus kiam ŝi haltis ĉe la pordo de la butiko, iu komizino rapidis al ŝi kaj demandis, kian teon ŝi volas. Post momento la komizino jam pretigis por ŝi la deziratan teon. Kiam ŝia triciklo difektiĝis, ŝi devis iri al la fabriko per aŭtobuso.

Kaj en tia okazo ŝi ofte renkontis entuziasmajn konduktorojn, kiuj subapogis ŝin por ŝia enbusiĝo, kaj bonkorajn ŝoforojn, kiuj haltigis la aŭtobuson kie ŝi deziris.

“Ĉiam, kiam mi rememoris ĉion tion, naskiĝis ĉe mi ia forto, kiu kuraĝigas min venki malfacilojn kaj bone fari mian laboron,” iom ekscitiĝis malgranda Ma.

Tiumomente Meng Fanchan ne povis silenti kaj ekparolis:

“Malgranda Ma estas bona knabino. La gvidantoj permesis al ŝi malfruiĝi en malbona vetero, tamen ŝi neniam malfruis. En la lastaj jaroj, anstataŭ malfruiĝi ŝi ĉiam venis antaŭ laborkomenco. Ŝi estas saĝa kaj lerta. Ŝia laborefiko estas alta kaj ŝiaj produktaĵoj bonkvalitaj. En la pasinta jaro ŝi estis elektita kiel avangarda laboristino de la laborejo kaj portantino de ruĝa standardo de la Beijing-a Industria Kompanio de Specialaj Meĉiantaĵoj.”

Meng eliris la pinglojn el la gamboj de malgranda Ma. La akupunkturado daŭris unu horon. Mi demandis Meng, kial tiom longe. Malgranda Ma respondis anstataŭe: “Por akiri bonan efikon. Antaŭe mi eĉ ne povis stari, sed nun, post akupunkturado, la muskoloj de miaj gamboj fortiĝis rimarkinde.” Ĉe tiuj vortoj ŝi faris kelkajn paŝojn antaŭ mi.

Je adiaŭo kun tiu vivoplena kriplulino, mi promesis, ke mi revizitos ŝin tuj kiam ŝi povos piediri sen lambastonoj.

TRAVIVAĴO SUR LA LAGO

de ERNST HAUCK (FRG)



Hezite nia ŝipo for de l' bord' veturas;
al ĝi ne plaĉas kvazaŭ la pluvema tago.
Ni sidas malantaŭe. La helic' susuras
mallaŭte en la ŝaŭmaj ondoj de la lago.
Subite la vetero ekfariĝas hela,
la grizajn nubojn pelas for la freŝa vento.

Miksiĝas sunobril' kun ondludado bela,
kaj blu' superas montojn ĉe la firmamento.
Aspekto tia sentimente nin inspiras:
la sunradioj rompas sin en ŝaŭm' de l' ondo,
kaj sepkolora arko daŭre kun ni iras,
el ŝaŭmo ĝi salutas ĉion en la rondo.

* Ernst Hauck naskiĝis je la 4-a de aprilo 1890. Li estis pedagogo, nun estas literaturisto kaj germanlingva poeto.

Trad. A. BENDERS

Novaj libroj



Ĝeamiketoj en Nia Korto

Infanlibro kun plurkoloraj bildoj

88-ES-158p

208×180mm 16 p.

£0.22 US\$ 0.40

Ĉinaj Popularaj Ludiloj


Multkoloraj pentraĵoj de ĉinaj ludiloj

kun naciaj trajtoj

84-Es-492

182×208mm 80 p. bind.

£0.81 US\$ 1.70



Eldonitaj de Fremdlingva Eldonejo, Beijing,

Mendu ĉe perantoj de EPC

aŭ ĉe Esperanta Sekcio de GUOJI SHUDIAN, P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Verda Majo:

Flustr' el Uragano

nova eldono kun kelkaj artikoloj


12.8 × 18.2cm. 89p. 8.00gld (aŭ egalvaloro)

Mendu ĉe PIRATO: Misaki 7-5-13, Suminoe, Osaka, 559 Japanio

aŭ Libroservo de UEA, vialanda libroservo

Vojaĝo al la Orienta Insulo

de ZHANG WEI



Skisto sur la insulo

LA Orienta Insulo situas oriente de Xisha-insularo en la Suda Ĉina Maro, je 200 marmejloj for de la kontinento de nia lando. Tiu insuleto, ĉirkaŭata de la senlima maro, havas areon de nur ĉ. 1.6 kvadrataj kilometroj. Ĉu oni sentas solecon sur la insuleto?

Mi venis tien en ĝia ora sezono, marto. La sveltaj kokos-arboj, la neĝblankaj suloj runde flugantaj en la blua ĉielo, ĥelonioj malrapide moviĝantaj sur strando, la groteskaj koraloj alkroĉiĝantaj sur la rifoĵoj. . . Antaŭ tia viveca sceno mi estis ravita!

REGNO DE SULOJ

Kiam la insulo aperis en mia vidkampo, ĝi ŝajnis kaj kvieta kaj miriga kvazaŭ smeraldo in-

krustita sur la panoramo de la ĉielo kaj maro. “Kie videblas birdoj?” leviĝis en mia cerbo la demando. Sed kiam mi surpaŝis strandon, subite pafiĝis svarmo da neĝblankaj birdoj el densaj arboj. Ili svingis siajn flugilojn kaj flugis ĉirkaŭ ni, super marbordo kaj arboj. “A. . . A. . .” la birdoj bruis laŭte, kvazaŭ neĝflokaj flirtantaj.

Ni iris pluen kaj la birdoj flugis ĉirkaŭ ni. Iuj el ili flugis tiel proksime, ke ni eĉ povis kapti ilin per la mano. Mia provizora gvidisto Xiao Pan, kiu vivis ĉi tie plurjare, diris al mi, ke en tiu insulo troviĝas kelkdek specoj da birdoj, inter kiuj la suloj estas la plej grandnombraj, ilia nombro eĉ povas esti komparata kun tiu de la steloj sur la ĉielo.

Apenaŭ finiĝis liaj vortoj, unu sulo haltis sur lia ŝultro. Vidante ĝian hoksimilan bekon, mi eksentis timon.

Xiao Pan klarigis: “Mildaj ili estas.” Li prenis la birdon kaj transdonis al mi. Ĝi estas grasa kiel anaso, ĝia beko griza, kaj ĝiaj piedoj ruĝaj, la tuta korpo kovriĝis de blankaj plumoj. Starante sur mia manplato ĝi rigardis nin mire.

La mildaj suloj sin nutras per fiŝoj. Je la unua vido mi ne kredis tion pro ĝia korpulenteco. Tiu dubo forvapiĝis en la sekvanta tago.

Frumatene, aro da suloj vigle flugis de sur tiu insulo kaj disiĝis super la maro, ili libere rondflugis en la aero, subite ili sin pafis en la maron kaj tuj soris, kun briletanta fiŝo en la beko. Ili ofte tiel persekutas fiŝojn en la ondeganta maro.

La sulo kiel leterkolombo neniam eraras en la flugo. Sur la senlima maro oni povas taksisian lokon laŭ la direkto de la flugo de la sulo kaj trovi insulon. Tial la fiŝistoj intime nomas ilin gvid-birdoj.

Foje unu sulo haltis sur mia ŝultro. Mi kaptis ĝin kaj, palpante ĝian grasan korpon, demandis Pan:

“Ĉu la sulo estas manĝebla?”

“Sendube, kaj la viando kaj la ovo,” li diris. “La sulo estas rara birdo kaj estas protektata de la ŝtata leĝo. Pro tio ni ne ĉasas ĝin.”

INTERESA FOTADO

Ĉio sur la insulo estis interesa pro ĝia mirinda pejzaĝo. Mi promenis kun kodako, por kapti oportunajn ŝancojn por foti.

Sude de tiu insuleto troviĝas ovala lago, kies ĉarmeco allogas sovaĝajn bovojn kaj ardeojn — la tieajn loĝantojn.

Estas ne facile trovi spuron de sovaĝaj bovoj malgraŭ ke la insulo estas malgranda. La insuleto estas kovrita de densaj arbustoj. La sovaĝaj bovoj havas akrajn sensojn, eĉ tre mallaŭta sono povas fortimigi ilin. Kaj mi vidis ilin nur en la mateno de la tria tago, kiam ili estis trinkantaj ĉe la bordo de la lago, kie estis ankoraŭ kelke da ardeoj.

Matene ĉie regis kvieto. La maraj ondoj plaŭdis takte kaj malrapide. La sovaĝaj bovoj kaj ardeoj libere promenis ĉe la lagbordo. Unu ardeo haltis sur la dorso de bovo kaj frapis ĝin per sia longa beko. Dume la lasta gaje svingis sian voston. La sceno reaperigis antaŭ ni prahistorian epokon.

Ni kaŝiĝis en arbustoj retenante la spiradon. Alĝustiginte la interfokusan distancon mi rapide premis la obturilon. Tamen ĝuste tiu softa sono de la obturilo surprizis la singardajn ardeojn, kaj ili tuj soriĝis. Mi haste kodakis kelkfoje. La kriadado de la ardeoj rompis la kvieton kaj la sovaĝaj bovoj kuregis for.

“Ni iru,” Xiao Pan ektuŝetis min, “hodiaŭ ili ne venos plu.” Kun nenia bedaŭro mi forlasis la lokon, ĉar la animaloj jam restis sur la filmo de mia kodako. Mi ekinteresiĝis pri la sovaĝaj bovoj: De kie alvenis la bovoj al tiu insuleto ĉirkaŭata de la senlima maro. Xiao Pan, kolektanta bird-ovojn, solvis tiun enigmon por mi, dirante ke antaŭ ĉ. cent jaroj iu mandareno de Qing-dinastio venis

ĉi tien por inspekti kunportante viandbovojn. Kelkaj el ili perdiĝis en ĝangalo kaj ili postvivis kaj generadis sur la insulo per la ege favora medio.

Ĉe la marbordo ĉie videblas buntaj konkoj, inter kiuj estas speco de konko, kies makuloj estas tute similaj al la strioj de tigro. Tial ĝi fariĝas tre plaĉa luksajeto. La konkoj diferencas per sia koloro kaj ĉiuj estas amindaj. Mi metis la kolektitajn konkojn en platan sakon kaj Pan kaptis paron da grandaj omaroj.

GEJUNULOJ DE LA INTERNACIA AVIADIL-GVIDA STACIO

En verdaĵo kaŝiĝas kelke da helflavaj duetaĝaj domoj kaj ĉielskrapantaj antenaj turoj de A-formo, ili aldonas iom da moderna koloro al tiu bela insulo. Ĝi estas la unua internacia aviadil-gvida stacio en la maro kun modernaj ekipaĵoj de Ĉinio.

Eble estas ne kredeble ke ĉiutage super tiu ondanta maro

de Ĉinio, aviadiloj transflugas pli ol 100 fojojn. Ili estas internaciaj aviadiloj.

Dum mia vizito, la staciestro kamarado Yang Wenguang sciigis min ke la starigo de tiu stacio ege oportunigis la aviadon de la sudorient-aziaj landoj per sia plej kurta linio.

La gvida stacio elsendas radian signon, per kiu la aviadiloj klare scias siajn orientiĝon kaj lokon.

Ĉiuj laborantoj de tiu ĉi stacio estas junaj, plejparto el ili estas diplomitoj el supera lernejo aŭ mezgrada faka lernejo. Ili laboras diligente kaj cetere ili konstruis per siaj propraj manoj sportejon, klubon, helan restoracion kaj komfortan banejon. Post laborhoroj ili aŭ ludas korbopilkon kaj volejbalon sur la sportejo, aŭ legas librojn kaj jurnalojn en la legoĉambro.

La sunbruna observisto Xiao Luo estas 28-jara energiplena junulo, diplomito el supera ler-

Suloj





Suloj en verda arbaro

“Ne. Tamen ŝi translokiĝos ĉi tien baldaŭ.”

Mi benas lin kaj ankaŭ ĉiujn gejunulojn kiuj persistas en sia posteno kaj diligente laboras.

Post vespermanĝo gejunuloj okazigis vesperkunvenon sur la strando. Pli ol 20 gejunuloj, sidante en rondo, ludis harmonikon kaj gitarojn. La facila marvento taŭzis iliajn hararojn, karesante iliajn sunbrunajn vizaĝojn.

Tiuj gejunuloj venintaj de diversaj lokoj de la lando havas saman deziron: konstrui la insulon por servi al la patrio. Ili ĝoje kantis kaj la forta voĉo esprimis ilian profundan amon al la patrio kaj la insulo kie ili vivas kaj laboras.

*Ho, Insulo Orienta, bela,
Riĉa, de l' Patrio vi fiero!
Vivas ni kun ĝojo kaj fidelo.
Kaj batalas por la sankta celo.*

nejo. Li fervore kondukis min rigardi la porkojn, kokojn kaj anserojn breditajn de ili kaj legomkulturejon.

“Ĉu vi ne sopiras vian hejmon?” mi demandis. Ĉar lia hejmloko Shandong-provinco estas milojn da kilometroj malproksima de ĉi tie.


“Komence mi ja sopiris. Sed nun ne. Tiu insuleto jam fariĝis mia dua hejmloko.”

“Eble vi jam edziĝis?”

“Ne,” li honteme ridetis, “antaŭ nelonge mi fianĉiĝis. Si estis mia kunlernantino kaj laboras en la meteorologia observatorio de Guangzhou (Kantono).”

“Ĉu vi ofte renkontiĝas unu kun la alia?”

La Internacia Aviadil-gvida Stacio de la Orienta Insulo






Dancistino de Tang-dinastio (ligna skulptaĵo)

de YANG YUNHUA

Foiro en Xinjiang



Kashi, kiu situas en la okcidenta parto de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono de Ĉinio, estas antikva urbo kun nacia trajto kaj loka koloro. Tie loĝas ujguroj, ĥalĥazoj kaj aliaj naciminoritatoj kaj prosperas foiro. La kamparanoj kaj paŝtistoj interŝanĝas siajn produktaĵojn kaj metiartaĵojn, kio oportunigas kaj riĉigas la popolan vivon kaj ankaŭ prosperigas la merkaton.


Fotoj de AIHAITI



Ujgura maljunulo vendas siajn bovaĵon.


Potoj kaj kruĉoj fari-
taj de ujguraj metiistoj





En foiro abundas freŝaj bovaĵo kaj ŝafajo.

La ŝtata rondira komerca grupo starigis vendostandojn.



Ujguraj virinoj elektas tapiŝojn mane teksitajn de halĥazoj.





Klientoj aĉetas ŝtofon.



Tranĉiloj tre taŭgaj por tranĉi viandon kaj melonon

Tripersona manpremado estas maniero uzata de la ujguroj en marĉando.





KRAKOVO — la iama ĉefurbo de Pollando — ĉiam estis kaj estas unu el la plej gravaj mondaj kulturaj kaj sciencaj centroj. Antaŭ jarcentoj ĝi donis al la mondo Kopernikon, en la lasta tempo donis la nunan Papon. Ĝi famas pro sia pli ol 600-jara Jagellona Universitato, unu el la plej malnovaj en la mondo universitatoj, ĉiam vigla kaj alloga. Por la esperantistoj ĝi estas konata kiel dufoja Kongresurbo, kaj daŭre aktiva esperantista centro.

La urbo restis ĝis nun kiel majesta arkitektura monumento. Tro grava kaj tro granda, por ke sole la lokaj fortoj sukcesu savi ĝin. La tempopaso, malbona klimato, industria polucio endanĝerigas ĝiajn historiajn postrestaĵojn. Al kelkaj miloj da konstruaĵoj, kiuj memoras la mezepokon kaj de tiam senĉese servas al la lokaj kaj tutmondaj uzantoj — nun minacas ruiniĝo. Kun granda fortostreĉo de la ŝtataj kaj sociaj fortoj oni nun laŭgrade konservas kaj renovigas la plej ĉefajn monumentojn. Sed ne la unuopaj malnovaj domoj, preĝejoj, fortikaĵoj decidis pri la valoro de la antikva urbo — sed la tuto: la urba kaj arkitektura komplekso de jarcentoj restinta sensanĝe kaj funkcia ĝis nun. Ĉu vi povas imagi la grandeccon de la bezonoj? La gravecon de la problemoj montras la fakto, ke UNESCO decidis enskribi Krakovon en la liston de la 12 plej altvaloraj trezoroj de la mondo, konservindaj

kaj konservindaj kun la helpo de la internacia kunlaboro.

Sur la historia ĉefplaco de Krakovo troviĝas grandega vitra ŝparkesto, ĉiam plenplena de moneroj kaj banknotoj de diverslandaj bankoj. Tiel la eksterlandaj turistoj apogas la celon de la monkollektado klarigitan sur la supro de la kesto per la multlingve gravurita surskribo: „Por la renovigo de la krakovaj historiaj monumentoj.“ Sur la malgrandaj kopioj de la monkollektujo

PRZEKROJ KRAKOW 32784 — 600008.

Unuopuloj, institucioj, organizaĵoj, kiuj sendos iujn ajn sumojn, eĉ simbolajn, ricevos specialajn diplomojn. Por speciale malavaraĵoj kontribuantoj oni antaŭvidas premiojn. Ĉiuj nomoj de la mondonacintoj aperos en la ĉefa pola semajnavuo PRZEKROJ legata tutmonde de poloj. Pri viaj eventualaj kontribuoj informos ankaŭ la Pola Radio kaj „Pola Esperantisto“. Se vi bonvolos donaci sumon, krom via nomo nepre indiku ESPERANTO-n, kiel rimedon inspirantan vin pri tio. Pri via kontribuo informu la Delegiton de UEA en Krakovo (D-ro L. Kordylewski, poŝtkesto 693, 30-960 Krakow), kaj la korespondantojn en Esperanto adresu al: ODNOWA KRAKOWA, Bracka 13, 31-005 Krakow, Pollando.

KRAKOVO PETAS HELPO

oni aldonadis pli kaj pli da lingvoj. Fine la Socia Komitato por la Renovigo de la Krakovaj Historiaj Monumentoj decidis establi la surskribon en Esperanto. De ni, la tutmonda esperantistaro, dependos, ĉu la esperantlingva kesto ne restos malplena kompare al la alilingvaj. Ne necesas persone enmeti en ĝin monerojn. La Banko „Polska Kasa Opieki SA“ kaj ĉiuj ĝiaj filioj en la mondo akceptas ĉiujn monsumojn por la renovigo de Krakovo. Jen la numero de la konto: PekaO SA

Krakovo estas unika kaj ĝi vere valoras vian apogon. Se vi jam estis en Krakovo, vi bone tion komprenas. Se vi ankoraŭ ne estis — venu kaj ĝuu ĝian unikan etoson; vi mem spertu ĝiajn bezonojn. Ni invitas vin!

Ni esperantistoj nepre kontribuu al la afero. Pripensu, kiel vi kontribuu al la projekto de UNESCO. Ĉiu groŝo valoras. Ĉiu ideo gravas. Tiu ĉi alvoko estas direktata ankaŭ al vi.

Pola Esperanto-Asocio
Varsovio, la 19-an de julio 1980 j.





MI AMAS MIAN ĈINAN PATRINON

de JIA HONGTU]



Nobesava Jukio kaj onklino Su

LA 8-an de julio ĉijare, subite ek-bolis iu kvieta korteto de Xuanwei-strato en Nangan-distrikto de la urbo Harbin: japana amiko Nobesava Jukio venis por viziti sian ĉinan patrinon. Enirinte la pordon, li tuj sin ĵetis en la sinon de la 87-jara Onklino Su, dirante: "Panjo, mi estas Xiaozi, revenis via filo!" Eldirinte tion, li ekploris ĉirkaŭprenante sian patrinon, kaj samtempe la onklino karesis lian kapon kaj ploris: "Kara mia, vi finfine revenis!"

I

Nobesava Jukio aĝas 50 jarojn. En 1944, kiam li estis nur 14-jara, li estis varbita de la japanaj militaristoj al Ĉinio kaj fariĝis ano de la Mangmeng-aj Eksploatantaj Junaj Volontuloj. Kune kun aliaj 120 knaboj en aĝo de dekelkaj jaroj el Kobe li ekspluatistis kaj kulturis en izolita montarbaro de la provinco Heilongjiang.

Post unu jaro la japanaj invadantoj malvenkis. Ĉiuj plenaĝaj volontuloj foriris, sed restis la knaboj.

Post sia alveno la Oka-voja Armeo disdonis al ili rizon. Sub la minaco de mortigo fare de Kuomintanga trupo ili devis fuĝi en la montaron. Post nelonge ilia greno estis forkonsumita, Nobesava Jukio fariĝis almozulo. Vintre li portis maldikan veston kaj suferis de pernioj tutkorpe. Iutage la malsata Jukio kuŝis sur la perono de stacio.

Apud la stacio loĝis malriĉa kamparano Su. La mastro nomiĝis Su Shouqian. La familio vivis de terkulturado kaj butikado. En tiu tago lia tria filo Huanfu diris al sia patrino, ke ĉe la stacio troviĝas japana knabo baldaŭ mortonta de frosto. Tion aŭdinte, Onklino Su tuj sendis lin porti la knabon hejmen.

La malforte spiranta Nobesava Jukio kuŝis sur la terlito. La onklino demetis de li ĉifonajn vestojn, lavis al li perniojn per abrotana dekoktaĵo kaj manĝigis al li maizkaĉon. . . Poste, rememorante pri la travivaĵo Nobesava Jukio diris: "Apenaŭ mi resaniĝis kaj povis

paŝi, la patro vokis al mi miajn fratojn kaj diris al ili: 'Li estas via frato. Nomu lin Xiaozi, kaj neniu lin malbone traktu!' " Ambaŭ maljunuloj prenis lin kiel sian propran filon. Tiamaniere Nobesava Jukio pasigis preskaŭ ok monatojn ĉe siaj ĉinaj gepatroj kaj fratoj.

Poste Jukio kune kun aliaj japanoj revenis al sia lando. Ĉe la adiaŭo, la patrino kaj la pliaĝa frato venis al la stacio. Tenante lian manon la patrino diris kun larmoj: "Zorgu vin men survoje." Jukio portis sur la dorso farunon bakitan de lia patrino en tiu nokto kaj havis en sia poŝo monon gajnitan de lia patro kontraŭ 150 kilogramoj da greno. La vagonaro estis baldaŭ ekveturonta, kaj Jukio surgenuiĝis antaŭ la patrino: "Panjo, mi neniam forgesos vian favoron dum mia tuta vivo!"

II

Ekde tiam jam pasis pli ol 30 jaroj. En tiu longa tempo Nobesava Jukio ĉiam sopiris sian ĉinan patrinon.

Je la 26-a de julio, 1979, kiam la Delegacio de Popola Ĵurnalo (*Renmin Ribao*) faris viziton al Kobe, iu nekonato telefonis al delegaciestro Qin Chuan:


“Pardonon, sinjoro delegaciestro, mi vin ĝenas per bagatelo! Mi estas ŝoforo de la Kobe-a Taksia Kompanio. Antaŭ tridek tri jaroj, iu ĉina patrino savis min. Mi deziras ke sinjoro delegaciestro helpu min trovi mian savanton!”

Kelkajn horojn poste, la estro kaj alia membro Chen Ruiqing akceptis la japanan amikon. Li estis neniu alia ol Nobesava Jukio. Aŭdinte lian kortuŝan rakonton, ili promesis ke ili nepre helpos lin trovi la ĉinan patrinon. Nelonge post la reveno al sia patrolando, Qin Chuan sukcesis trovi la onklinon.

Je la 17-a de septembro, 1979, Jukio ricevis leteron transsenditan de la Kobe-a Filio de la ĵurnalo «Yomiuri», kun la foto de la onklino. Vidinte ŝian afablan vizaĝon, Jukio nereteneble eklarmis. La ĉina pliaĝa frato diris en sia letero: La tuta familio tre ĝojas, informiginte pri li. La patro jam forpasis, sed la patrino estas tre sana. Ŝi diris kun larmoj ke ŝi deziras lin vidi kiel eble plej baldaŭ!

III

Por akcepti sian japanan fraton, la filo de Onklino Su speciale alvenis al Beijing (Pekino) je la 7-a de julio de la kuranta jaro. Li intencis akompani Jukion sin distri kelkajn tagojn en Beijing. Tamen Jukio diris: “Mi venis por vidi mian patrinon, sed ne por min amuzi, ni rapidu hejmen.” Tiunokte ili veturis al Harbin per trajno kaj en la sekvanta tagmezo ili elvagoniĝis kaj veturis al la hotelo Guoji. La frato diris: “Unue vi ripozu ĉi tie.” “Ne. Rapidu hejmen por vidi la patrinon!” diris Nobesava Jukio. En la sama tago li jam



Nobesava Jukio (la tria de dekstre) kun onklino Su (meze) kaj ŝiaj familianoj

renkontiĝis kun sia ĉina patrino, kaj en la sekvanta tago li translokiĝis al la hejmo de la patrino.

En tiuj feliĉaj tagoj, Jukio ĉiam estis kune kun sia patrino. Ĉiumatene post sia ellitiĝo li unue rigardis la patrinon. Dum manĝado li sidis apud la patrino kaj prenis por ŝi manĝaĵojn. Vespere li ŝin akompanis sidante apud ŝia lito. Ĉiuj najbaroj estis kortuŝitaj de la faroj.

En la tempo, kiam Jukio devis adiaŭi la ĉinan patrinon por reiri al Japanio, ĵurnalisto intervjuis lin. Li diris kortuŝite: “La tagoj en kiuj mi kunvivis kun mia ĉina patrino estis la plej feliĉaj kaj gajaj por mia tuta vivo. Mi amas la ĉinan patrinon kaj ankaŭ Ĉinion. Mi deziras, ke miaj posteuloj vivu por ĉiam en amikeco kun la ĉina popolo.”

Nobesava Jukio kaj la filo de onklino Su (la unua de maldekstre)






Cigna Lago de Xinjiang

En la centro de la granda stepo Bayanbulak de Xinjiang troviĝas bela Cigna Lago.

Printempe, grandaj kaj malgrandaj cignoj, travintrantaj en la sudo, refluas ĉi tien por vivi sur ĝi. Cignoj estas belaj, noblaj kaj tene-raj. Ili nutras sin per freŝaj herboj, kaj neniam damaĝas plantaĵojn. El maturiĝintaj viraj kaj inaj cignoj formiĝas dumvivaj paroj, kiuj kune konstruas nestojn kaj kovas ovojn alterne, tial la tieaj paŝtistoj nomas ilin "ĉastaj birdoj".

Ĉi tie la nombro de cignoj jam kreskis de kelkcent al pli ol dek mil post kiam la popola registaro prenis la Cignan Lagon kiel naturan rezervejon. Somere, se vi traveturas la malprofundan marĉon per kaŭĉuka boato kaj atingas la lagon, vi povas trovi sur ĝi gaje ludantajn



cignojn, sovaĝajn anserojn kaj anasojn, ardeojn kaj alispecajn akvobirdojn. La blankaj cignoj je dekelkaj paŝoj for de nia boato montris neniom da timo al ni. Ili konstruas siajn nestojn ĉe la bordoj de la lago kaj generas idojn tie. La cignidoj eloviĝas en la meza tagdeko de julio, kaj kreskas tiel rapide ke ili povas flugi suden kune kun siaj ge-

patroj aŭtune. Tie kelkaj paŝtistoj prove bredas cignojn, sovaĝajn anserojn kaj aliajn sovaĝajn akvobirdojn inter la kortobirdoj. En aŭtuno de 1977, paro da bredataj cignoj, kies flugiloj ne estis tonditaj, subite forflugis kun cignaro, tamen en la sekvanta printempo ili revenis kune kun la cignaro kaj ree falis inter la kortobirdojn.




Simio-paŝtisto

Ĉe la piedo de Xima-monto de Yunnan-provinco, simio, kaptita antaŭ ses jaroj, paŝtas 30 porkojn por sia mastro.

Ĉiumatene, kun bambua bastoneto en la mano, ĝi saltas en la porkostalon kaj rajdas sur nigra porkino. Tuj post kiam la mastro malfermas la pordon, ĝi blekas plurfoje kaj pelas la porkojn sur la monton.

Vere kapabla estas tiu simio en paŝtado. Se iuj porkoj kuras for, ĝi revenigas ilin; se porkoj ne obeas ĝian ordonon aŭ ŝtele mordas plantaĵojn, ĝi bastonas ilin. Kelkiam, se porkido laciĝas kaj ne povas iri plu, la simio zorgeme protektas ĝin kaj portas ĝin en la stalon.

Areko en Ĉinio



Origine la areko kreskis en Malajo kaj Filipinoj. Oni ne scias, kiam ĝi transplantigis en Ĉinion. Tamen la historia noto montris, ke areko kreskas en Ĉinio jam ĉ. 1,500 jarojn. Ĝi estas la simbolo de amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj sudorient-aziaj landoj.

La areko estas tre valora.

Ĝiaj grajnoj entenas oleon, alkaloidon, kateĉuon, kolinon k.a., kiuj povas esti uzataj por kuraci disenterion, inflamon, astmon, hidropson kaj haŭtan malsanon, kreskigi karnon, ĉesigi doloron kaj forigi vermojn. Ĝia ligno, rekta kaj fortika, estas bona materialo por fari laborojn, meblojn kaj muzik-instrumentojn.




La loĝantoj de la sudorientaj provincoj de Ĉinio kutimas manĝi areknuksojn. Jam de antikveco tieaj loĝantoj prenis ilin kiel bongustajn fruktojn por regali gastojn. En la pasinteco areknuksa estis uzata kiel fianĉa donaco. Se viro petis la manon de iu fraŭlino, li devis sendi al la fraŭlina familio skatolon kun areknuksoj. Se ŝiaj gepatroj malfermis ĝin kaj elprenis unu el la areknuksoj, do tio signifis konsenton pri la peto. Ĉe la nupto la nova edzino devis regali siajn gepatrojn kaj samvilaĝanojn per areknuksoj. Eĉ hodiaŭ troviĝas iuj naciminoritatoj, kies junuloj ankoraŭ prenas areknuksosimbolon de amo.

La areko havas rektan trunkon de sama dikeco, kaj estas tute sen flankaj branĉoj. Iuj naciminoritatoj de nia lando kutimas planti arekon ĉe la pordo de la domo, kiam oni naskas filinon, kaj transplanti ĝin en la domon de la edzo, kiam la knabino edziniĝas. Per tio oni esperas ke la knabino estos honesta kaj aminda kiel areko. Tie estas malpermesate al viroj pisi sub la areko.



LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

- 1 Jiamusi
- 2 Harbin
- 3 Jilin
- 4 Xi'an
- 5 Wuhan
- 6 Yangzhou
- 7 Xisha



RATO-KAPTADO

de GUO DAGUANG




Intereso ŝanĝiĝis

Pentrita de LIU MANHUA



1

2




3

4

ĈU ANKAŬ ILI

POVAS ...

de LIU XIANGCHENG





HUMURAJOJ

Ilustrita de JIANG FAN



Kuko de Peĉjo

Festotago de Peĉjo. Ok jaroj! La bonkora patrino preparis por li logan kukon.

—Nu, tranĉu mem vian tranĉaĵon! — ŝi diras al la fileto. Kaj Peĉjo tranĉas kvaronon de la kuko.

—He! — miras la patrino. — Kia granda tranĉaĵo por eta bubo!

—Ho, vi pravas, panjo, do mi prenu tion, kio restas!

G. ROATTINO (Italio)

Ne estas ŝtonoj surface



Urba turista grupo motorboatas sur lago kaj demandas maljunulon fiŝhokantan ĉe lagokolo: “Ĉu estas ŝtonoj surface?” La maljunulo lakone respondas: “Ne!” La motorboato akcelas sian rapidon kaj tuj ĝia helico tuŝas ŝtonon. La boatisto blekas: “Tamen estas ŝtonoj surface!” Je tio la maljunulo trankvile respondas: “La ŝtonoj estas surfunde!”

J. JANTTI (Finnlando)

Milda mallaŭdo

La rusa poeto Puŝkin promenis iam kun junulo, kiu deklamis al li siajn malbonajn versaĵojn. Jen renkontis ilin iu viro kaj oscedante preteriris. Tiam Puŝkin diris al sia akompananto: “Amiko, parolu iomete malpli laŭte — tiu homo estas aŭdinta vin!”

A. KUPCZAK (Pollando)



Ekde 1981, oni devas pagi por la anoncetoj laŭ la prezo 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj kaj por fotoj laŭ la prezo 1 resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj, kontribuantoj kaj aliaj kunlaborantoj povas ĝui minimume 30-pocentan rabaton. Esperantaj organizoj kun konsento de la redakcio de EPC povas senpage aperigi, en la revuo, anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

LA RED.

- * Stefan Winner (17-jara gimnasciano), Karlsgayer-str. 16, D-8000 Munchen 50, FR. Germanio, dez. kor. tutmonde, prefere kun ĉinoj.
- * S-ro Kurko Stefan (55-jara), Feltiz 582, Sindominic. Distrikto Harghita, Rumanio, kun samaĝa esp-istoj el Ĉinio, kaj tutmondo.
- * Miss Maria Monteverdi (27-jara ĵurnalistino), P.O.Box 1566, Fontana, CA 92335, U.S.A. dez. kor. kaj interŝ. bildkartojn kun amikoj el la tuta mondo.
- * Luis Carlos de Morais Junion (19-jara), Ajuratuba, 150/F/302, Rio de Janeiro RJ 20731, Brazilo, pri kutimoj, literaturo, arto ĝenerala kaj muziko.
- * 18-jara esp-istino, Jaqueline Tergolina, Pedro de Carvalho, 161/Co2, Rio de Janeiro FJ 20721, Brazilo, pri ĉiuj temoj. Atendas leterojn laŭeble kun foto.
- * Jose Carlos Barbosa (28-jara), Jupira 34, Niteroi RJ 24110, Brazilo, pri lingvoj, muziko, literaturo, sciencoj, arto ĝenerala kaj vajaĝoj.
- * Tintor Tatjana (15-jara), Susedgradska 1, 41000 Zagrebo, Jugoslavio, kun amik(in)o.
- * Fornaro Albano (12-jara), kaj Sabina (10-jara), Via Viganotti 10-Vercelli, Italio, kun gejunuloj de la tuta mondo precipe ĉinaj junuloj.

- * Grupo da Hispanaj gejunuloj dez. kor. kun ĉinaj junaj esp-istoj, Madrida Esperanto Liceo, Strato Atocha 98-4 —, Madrid 12, Hispanio.
- * Gyözö Bedegi (32-jara), 3100 Salgotarjan, Kemerovo krt. D/4, C.Lh.fez. 2. Hungario, pri religio, folkloro, historio, k.t.p.
- * S-ro Szegedi Arpad (magiisto), Arpad Fejedelem u. 30, H-1023 Budapest, Hungario, dez. tutmonde interŝ. spertojn pri magio kaj aliaj cirkaj truko.
- * Harada Cukuru (19-jara lernanto), Hakuzan, 2-7-4, Kumamoto 862, Japanio, dez. kor. kun ĉina virino sen aĝolimo.
- * S-ro Vincze Ferdinand (elektristo), Sirok, Rakoczi u. 28/I.II. 12, H-3332 Hungario, kun ĉinoj pri diversaj temoj.
- * S-ro Bertil Englund (simfonia orkestromuzikisto), Moltkestr. 32, D-8670 Hof, FR. Germanio, kun ĉina muzikist(in)o.
- * András Pápai, H-3300 Eger, Kodály Z.U. 24, Hungario, kun ĉinaj E-istinoj.
- * S-ro Robert Arnaudet (ĉefa poŝtinspektoro), 40, rue Ingres, 81000 Albi Francio, kun ĉinaj geesp-istoj.
- * Ramon Astrada, Adgar de Ancianos, 5900 Villa Maria (6BA), Argentina, dez. kor. pri diversaj temoj.
- * Helena Byl (17-jara), kaj Yanina Byl (15-jara), Rzepowo-10, 76003 Sucha Kosz, Woj, koszalinские, Pollando, kun junularo de la tutmondo pri ĉiutaga vivo kaj muziko.
- * Rafaël Bar-Illan (26-jara studento), Box 254, PO.Dickson, A.C.T.Aŭstralio, dez. kor. pri ĉiaj temoj ĉefe literaturo, muziko, ktp.
- * Santiago del Pino (17-jara studento), Marcelo Usera, 161, Madrid 26, Hispanio, kun samaĝaj tutmondaj geamikoj pri ĉiuj temoj.
- * Sonja k. Leonid Senj (30-jaraj geedzoj-esperantistoj), KV. "Pish-



* Esther Hauptenthal (knabino 10-jara), Schulstrasse 30, D-6601 Scheidt, FR. Germanio, kun samaĝaj geknaboj el ĉiuj landoj.

mana" BG 79, VH. "6" ap 17, Veliko Tirnovo, Bulgario, dez. kor. tutmonde.

* Giuseppe Migliore (17-jara studento), C.P.9, 25043 Breno (BS)/Bré (Bréha), Italio, pri etnio kaj dialektoj.

* S-ro Matti Lahtinen (25-jara studento de matematiko), Ilmarisenk, 16-18 C37, 40700 Jyväskylä 10, Finnlando, dez. kor.

* Luis Vicino, Str. Castro Barros 1433, 1237 Buenos Aires 36, Argentina Respubliko, kolektas poŝtmarkojn.

* F-ino Maria José (23-jara instruistino), C/Cadiz Nr. 15, Valencia-6, Hispanio, kun geesp-istoj de la tuta mondo.

* Velimir Piškorec (14-jara lernanto), Stjepana Radića 133, 43350 Ĝurĝevac, Jugoslavio, kolektas p.m. k. bildk.

*Vajda Ioan (30-jara programisto), Căsuța postală 91, 2200 Brasov 1, Rumanio, kun gesamideanoj el Azio, Ameriko, Okcidenta Eŭropo, interŝanĝas p.m. bildk. Eglumarkojn. Rekompencos filatelan afrankon.

* S-ro James F. Cool, 137 N. Mulberry Str., Wilmington, OH 45177, Usono, dez. kor.

* Phyllis Purnell, 16, Fern Road, Downend, Bristol BS16 5TD, Anglio, Britio, kun ĉina Esperantist(in)o pri historio, pentrado, konservado de naturo, politiko.

* S-ro Jan Slowinski (29-jara), ul. Krakowska 3/30, 44-335 Jastrzebie Zdroj, Pollando, kun geesp-istoj pri ĉiuj temoj.

* S-ro Mirosław Kwietniewski (24-jara), ul. Kwiatowa 8/19, 44-310 Wodzisław 2, Pollando, kun geesp-istoj tutmondaj pri ĉiuj temoj.

* S-ro Grazyna K. Janusz Czerny, 27-jara mekanika teknikisto, ul. Nowe Miasto 17, 67-115 Bytom Odrzanski, Pollando, dez. kor. kun ĉinaj geamikoj.

* S-ro Pierre Guiton k. s-ino Christine Guiton, 69-jara k. 59-jara, 93 avenue John Kenedi a Parame, 35400 St. Malo, Francio, dez. kor. kun geĉinoj samaĝaj.

* F-ino Marguerite Bazin, 62-jara, 49 rue Clemenceue, St. Servan, 35400 St. Malo, Francio, dez. kor. kun ĉinino samaĝa.

* S-ro Camille Robin, 50-jara help-direktoro por la regiono de la poŝtoŝeĉejo, 38 rue Leguen de Kerangal, 35700 Rennes, Francio, dez. kor. kun ĉino samaĝa, kaj proksimuma samprofesio.

* Jwanicki Zbigniew, 18-jara lernanto de elektronika mezlernejo, ul. B. Bieruta 41/2, 78-440 Czaplinek, Pollando, kolektas monerojn de diversaj landoj kaj dez. kor. kun junularo de la tuta mondo pri ĉiutaga vivo kaj jogo.

* S-ro Nussbaum lothar, 50-jara oficisto, Berg. Gladbacher Strasse 862, 5000/Ko 1 n-80, FR. Germanio, dez. kor. kaj interŝ. p.m. kun geesperantistoj el Ĉinio kaj aliaj landoj.

* S-ro Franco Raimondi, via andria, 300, I-70059 Trani-BA, Italio, dez. kor. k. interŝ. p.m. kun filatelisto en Ĉinio.

* Ingo Bruckl, 18-jara lernanto, Ibacher Feld 31, D-5630 Remscheid 1, FR.Germanio, dez. kor. kun ĉirkaŭ 18-jara ĉina E-istino pri ĉiuj temoj.

* S-ro Peter Browne, 420 East 9th Street Vayne Nebraska, Usono, dez. kor. kun ĉinaj kaj tutmondaj amikoj pri kulturaj aferoj, arto, naturo, lingvistiko kaj E-movado.

* Anna Lena Bergstrom, 18-jara studentino, Solvesborgsgatan 4, 214 36 Malmo, Svedio, dez. kor. kun ĉinaj kaj japanaj geamikoj pri kulturaj aferoj kaj bona amikeco.

* S-ro Pierre Lataste, 57-jara inspektoro de lernejoj, Residence Marhaba, 271, Rue Emile-Combes, 33700-Merignac, Francio, dez. kor. kun ĉino por interŝ. p.m.

ABON-VARBADO DE EPC POR 1981 20% DA RABATO AL NOVA ABONO!

La abonanto-varbado de EPC por 1981 jam komenciĝis kaj daŭros ĝis la 31-a de januaro, 1981. Ĉiuj, kiuj abonos EPC-on en tiu ĉi tempo, povos ĝui rabaton de 20%. Ne perdu la ŝancon kaj tuj abonu ĝin, kaj rekomendu ĝin al viaj parencoj kaj amikoj. Ĉiu, kiu varbos abonantojn por ni, ricevos rekompencan kun ĉina originaleco, donacitan de Guoji Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj).

ABONTARIFO DE EPC

12 numeroj (1 jaro)	£3.00	US\$ 6.00	Gld.12.60	Yen1400
24 numeroj (2 jaroj)	£5.00	US\$10.00	Gld.21.00	Yen2800
36 numeroj (3 jaroj)	£7.50	US\$15.00	Gld.31.50	Yen4000
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:				
12 numeroj (1 jaro)	£2.20	US\$4.30		
24 numeroj (2 jaroj)	£3.60	US\$7.20		
36 numeroj (3 jaroj)	£5.40	US\$10.80		

SPECIMENOJ SENPAGE AKIREBLAJ LAŬ PETO

Abonu ĉe: Peranto en via loko

Esperanta Sekcio de Guoji Shudian, P. O. Kesto 313, Beijing Ĉinio



Imperiestra gvardio antaŭ 2,100 jaroj

Vizito al la Muzeo de Argilaj Militistaj kaj Ĉevalaj
Figuroj de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio

de LUO CAO

Mi aŭte veturis el la antikva urbo Xi'an (Hi'an) orienten laŭ la piedo de Lishan-monto kaj baldaŭ prezentigis al miaj okuloj granda arkforma konstruaĵo kun arĝenta tegmento — jen la fama Muzeo de Argilaj Militistaj kaj Ĉevalaj Figuroj de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio.


La muzeo estas 230 metrojn longa, 72 metrojn larĝa kaj 22 metrojn alta. Antaŭe tie estis kampoj. En 1974, kiam la lokaj kamparanoj fosis puton, ili trovis argilajn figurojn sub la tero. La arkeologia institucio faris prifosadon kaj konsta-

tis, ke ili estas argilaj militistaj kaj ĉevalaj figuroj enterigitaj kune kun la Unua Imperiestro (259-210 a. K.) de Qin-dinastio.

La menciita Imperiestro la Unua unuigis Ĉinion. Li unuigis la leĝojn, mezurunuojn, monojn kaj skribajn lingvojn de Ĉinio kaj konstruigis ĉeval-vojojn, la Grandan Muron k.a., per kio li ludis progresan rolon en la ĉina historio. Sed li multe imposti la popolon kaj rekviziciis grandajn fortojn homajn, materiajn kaj financajn por fari multajn grandiozajn konstruaĵojn, kio multe sutferigis la popolon. Laŭ historiaj

notoj de Ĉinio, li estis surtronigita en sia 13-jara aĝo. En la sekvanta jaro granda sumo da mono estis asignita por konstrui palacon kaj tombon en la ĉefurbo Xianyang (en la nordo de la nuna Xi'an). Post kiam li unuigis Ĉinion en 221 a.K., li decidis konstrui luksan maŭzoleon. Por tio li rekviziciis pli ol 700,000 homojn kaj la konstruado daŭris dek jarojn. La maŭzoleo kun areo de 2.5 kvadrataj kilometroj kaj alteco de 166.7 metroj lokiĝas ĉe la norda piedo de Lishan-monto. Oni diras, ke tiu maŭzoleo estas grandioza, luksa palaco profunde sub-

La ekspona halo de la muzeo





*La Muzeo de Argilaj Militistaj kaj Ĉevalaj
Figuroj de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio*

tera, en kiu estas rivero el hidrargo kaj lumilo de fiŝoleo kaj troviĝas tre multaj raraj valoraĵoj. La kavo de argilaj militistaj kaj ĉevalaj figuroj distancas je 1.5 kilometroj oriente de la maŭzoleo.

En la muzeo prezentiga bildo de Qin-dinastio antaŭ 2,100 jaroj. Starante sur revua teraso alta je 6 metroj, mi vidis la imperiestran gvardion en kvadrato. Tri oficiroj en kirasoj gvidas 210 militistojn en tri vicoj tiel impone, kvazaŭ ili sturmus kriante. Ĉiu el ili portas

militistan robon kaj laĉe kunligebajn ŝuojjn, kun vindoj ĉirkaŭ siaj kruroj, ligitaj haroj sur la kapo sen kasko, pafarko kaj sagoj sub brako. Ili formas avangardon de la formacio. Malantaŭ ili estas 38 kolonoj el infanterianoj kaj militĉaroj. La infanterianoj portas militistan robon sub veŝta kiraso kaj ĉiu el la ĉaroj estas tirata de kvar ĉevaloj. Ili estas la ĉefa parto de la formacio. En la suda kaj norda flankoj de la formacio kaj en ĝia malantaŭo staras po vico da militistoj fronte


eksteren. Ili estas la du aloj kaj ariergardo de la formacio.

Mi descendis de la teraso kaj malsupreniris laŭ ligna ŝtuparo al la foso de la argilaj militistaj kaj ĉevalaj figuroj. Tie la argilaj militistoj altas 1.8 metrojn kaj la argilaj ĉevaloj altas 1.5 metrojn kaj longas 2 metrojn. Ili havas saman grandecon kiel la vera homo kaj la vera ĉevalo. Ĉiu el la militistoj havas sian propran aspekton. Iuj kun larĝa frunto, forte kunpremitaj lipoj kaj larĝe malfermitaj okuloj fikse

Argila militista figuro



Riparo de argila ĉevalo





Arkeologoj en laboro

rigardas antaŭen, aliaj kun elstarantaj zigomoj, kaviĝintaj okuloj, abunda barbo kaj fortika korpo estas eble el naciminoritato de nordokcidenta Ĉinio, triaj vivoplenaj kun ronda vizaĝo, naŭva mieno, densaj brovoj kaj grandaj okuloj aspektas

kiel rekrutoj, kaj kvaraj rekte starantaj en meditado kun serioza mieno kaj mano sur spadtenilo estas evidente generaloj spertintaj cent batalojn. Tiuj argilaj ĉevaloj kun rekte starantaj oreloj, antaŭen rigardantaj okuloj kaj fortaj muskoloj

staras sur fortikaj kruroj kvazaŭ atendante ordonon.

Tie ni vidis ankaŭ nombron da elterigitaj bataliloj. Ĝis nun elteriĝis jam pli ol 10,000 spadoj, glavoj, lancoj, arbalestoj, pafarkoj kaj sagoj. Inter ili du bronzaj spadoj restas trembrilantaj kaj tre akraj. Tio vidigas ne nur la eminentan faradon de armiloj de Qin-dinastio, sed ankaŭ la altan nivelon de la fanda tekniko de la antikva Ĉinio.

Mi venis al la akceptejo de la muzeo. Ĝia laboranto diris al mi, ke oni jam trovis tri tiajn fosojn. Tiu, kiun ni vizitis, estas foso n-ro 1 kun areo de pli ol 14,000 kvadrataj metroj, en kiu estas ortangula formacio ĉefe de infanterianoj. La foso n-ro 2 kun areo de 6,000 kvadrataj metroj havas unuigitan formacion ĉefe de militĉaroj kaj kavalerianoj. La foso n-ro 3 kun areo de 520 kvadrataj metroj estas komandejo de la formacioj de la fosoj n-roj 1 kaj 2, kaj tiu komandejo havas 73 militistojn kun armilo en mano viciĝintajn ĉirkaŭ la militĉaro de la ĉefkomandanto. La tri fosoj kune formis imponan formacion sistemon defendantan la maŭzoleon de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio kaj prezentas simbole lian gvardion garnizonantan ekster la ĉefurbo. Nun la muzeo ekspozicias nur la kavon n-ro 1. Laŭ esploro kaj parta fosado, oni taksas, ke la tri kavoj havas 7,000-8,000 argilajn militistajn kaj ĉevalajn figurojn. Nun estas ekspoziciataj nur kelkcent pecoj. Kiel imponos la spektaklo, se montriĝos ĉiuj tiuj argilaj militistaj kaj ĉevalaj figuroj!

KOREKTO

En la n-ro 3 de nia revuo, ni aperigis en la rubriko "Esp-Novajoj" la artikoleon "Donaco de JEI — Albumo 'Hirosima-Nagasaki'". En la raporto ni faris eraron kaj nun faras jenan korekton: La albumo

estas donacita kaj sendita *ne de JEI, sed de la Eldon-Komitato por Hirosima-Nagasaki* (Heiwa Kaikan, 1-4-9 Siba, Minato-ku, Tokyo 105), kaj esperantigita de *Esperantista Societo por Hirosima-Nagasaki*, Ĉe JEI (kontakto-adreso). Ni petas pardonon de la Komitato pro tiu eraro.

INDEKSO DE EPĈ 1980

Nr. : pĝ.

Nr. : pĝ.

ESPERANTO

La verda stelo brilu ankoraŭ pli forte en Ĉinio	1 : 3
Kunveno de ĉinaj Esperantaj organizoj	3 : 2
Neforgesebla vizito	4 : 10
Espero de ĉina erudiciulo	5 : 9
Pri la ĉina Esperanto-movado en la pasinta jaro	5 : 12
Pri la zorgo de kamarado Chen Yi al la Esperanta laboro	6 : 10
Nova konstanta komitato de ĈEL	6 : 14
Esperanta traduka ekzercado	6 : 15
Rememoro pri kamarado Xu Ziqi	6 : 16
Esperanta ekspozicio en Beijing	7 : 5
Rememoro pri Verda Majo, kunbatalantino de la ĉina popolo	9 : 12; 10 : 14
Karmemore al japana esperantisto Mijake Ŝihej	9 : 14
ĈEL fariĝis aliĝinta landa asocio de UEA	10 : 10
Raporto pri la 65-a Universala Kongreso de Esperanto	11 : 14
Senĉese batalu por forigi diskriminacion	11 : 17
Danko kaj espero	11 : 19
Saluton al nova estraro de UEA	11 : 18
Reveno de Vankuvero	12 : 12
Japanaj esperantistoj en Ĉinio	12 : 15
Memore al kamarado Eltunko	12 : 20
Mia kompetenta mentoro	12 : 22
El mia kontakto 50-jara kun la ĉina Esperantujo	12 : 2
Disfloru nia kunlaboro	12 : 2

NIA KULTIVEJO

Lingva problemo en sciencoj kaj rolo de Esperanto	1 : 4
Okaze de nia vojaĝo en Ĉinio	2 : 5
Perspektivo de Esperanto el "dek milionoj"	3 : 3
"Unu vido pli taŭgas ol dek aŭdoj"	4 : 2
Esperanto — ponto de amikeco kaj kultura interŝanĝo	5 : 10
Jugoslavia Esperanto-movado	7 : 33
Kial kaj kiel mi amas Esperanton?	8 : 7

Miaj proponoj	9 : 9
Mi kaj Esperanto	10 : 12
Somera semajno de esperantistoj en Chongqing	11 : 37
Impreso pri la Universala Kongreso de Esperanto	12 : 10

PAGO DE RADIO PEKINO

La 15-jara jubileo de Esperanto en Radio Pekino	2 : 2
Nia Esperanta disaŭdigo	5 : 16
Raportu la aŭdeblecon al Radio Pekino	9 : 51
Respondo al aŭskultantoj	9 : 52

POLITIKO

Restarigo de reputacio de k-do Liu Shaoqi	6 : 12
Kamarado Tito ĉiam vivos en la koro de la ĉina popolo	7 : 2
Pri la socialisma leĝa sistemo de Ĉinio	9 : 2
En prizono de Ĉinio	9 : 4
La ĉina sistemo de pledado vidita en unu proceso	9 : 8
Kongreso plena de demokratia kaj reforma spirito	11 : 2
Konsekrado de nova episkopo en Beijing	3 : 30
Religioj en Ĉinio	5 : 38
Tomboŝtonoj de tri misiistoj en Beijing restarigitaj	10 : 33

INDUSTRIO KAJ TRAFIKO

Iom pri la riĉfontoj de energio en Ĉinio	1 : 12
Pri la ŝosea persontrafiko en Yantai-subprovinco	1 : 19
Vizito al Beijing-a poŝtmarka presejo	2 : 28
La novaj konstruoj de la Beijing-a Internacia Aerodromo	3 : 25
La Beijing-a Fabriko de Naciaj Muzikiloj	4 : 19
Jingdezhen — urbo de porcelanaĵoj	4 : 22
Por vestoj de 900-miliona loĝantaro	5 : 17
Teknika reformado de la tekstila industrio de Shanghai	6 : 19
Vestado de Beijing-anoj	7 : 17
En moderna laminatejo	12 : 30

AGRIKULTURO

Metano — nova hejtajo en ĉina kamparo 1 : 15
 Ŝanĝiĝo de Xigou-brigado 5 : 20
 La ĉina agrikulturo en rapida disvolvo 7 : 9
 Novaj ŝanĝiĝoj en ĉina kamparo 7 : 14
 Kelkaj vidaĵoj sur la insulo Hainan 8 : 19
 Ŝanĝiĝo de iu kamparana familio en 30 jaroj 9 : 29
 Reformado de sal-alkala tero 10 : 27
 Sur la grasa grundo 12 : 3

EKONOMIO KAJ KOMERCO

Pri la altiĝo de la prezoj de agrikulturaj produktoj aĉetataj de la ŝtato 2 : 21
 Pri fondo de entreprenoj per ĉina kaj alilanda kuna investo 4 : 27
 La nacia ekonomio de Ĉinio en stabila disvolviĝo 9 : 18
 Vizito al kampara foiro 4 : 25
 Reformo de la ekonomia administra sistemo de Ĉinio 11 : 20
 En kombinato de agrikulturo, industrio kaj komerco 11 : 22


EDUKO, SCIENCO KAJ KULTURO

Superklasa instruistino Liu Yufang 1 : 25
 Sciencistino Lin Lanying 5 : 32
 Por savi krimajn gejunulojn 6 : 2
 Ili hieraŭ kaj hodiaŭ 6 : 4
 Harbin-a postlabora universitato de laboristoj 6 : 23
 Vipura Insulo 6 : 28
 La unua vizito de ĉinaj sciencistoj al Antarkto 8 : 9
 Pri la Ĉina Scienca kaj Teknika Universitato 8 : 12
 Flugo al Pacifiko 8 : 17
 Mistera informkapablo de la homa korpo 8 : 30
 Scienca esplorado de la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo 9 : 22

LITERATURO KAJ ARTO

Steleto en pentrarto 1 : 27
 Elekto de la perlo (novelo) 1 : 29; 2 : 36; 3 : 35

Baleto “Sur la Silka Vojo” 1 : 33
 Suspektemo 1 : 43
 Grandioza kunveno de ĉinaj literaturaj kaj artaj rondoj 2 : 17
 Karikaturaj 2 : 35
 La komedio “Du Ĝemeloj kaj Du Ĝemelinoj” 3 : 28
 Kantoj, dancoj kaj teatraĵoj de la ĉinaj nacimallimultoj 4 : 12
 Originala floro de arto 4 : 17
 Saĝa edzino (ĉina popolrakonto) 4 : 35
 Predo de fiŝisto 4 : 36
 Kiosko de Ebria Oldulo 4 : 37
 Ĉu vi rigardis Pekinan operon? 4 : 38
 Knabinoj tefoli-kolektantaj 5 : 23
 Ellogo el la domo (humuraĵo) 5 : 28
 Komponisto Lü Yuan 5 : 41
 Tintsonoras Fonto (Soprana solo) 5 : 42
 Flutado de cervopaŝtistino 5 : 44
 Baleto “Ĝaŝutun kaj Nannona” 6 : 30
 Parfuma Rozo (novelo) 6 : 33
 Lerta (popolrakonto) 7 : 20
 La ĉina humura dialogo 7 : 22
 Bone (humura dialogo) 7 : 24
 Pri romano de Ba Jin 7 : 28
 Sub homara flago 8 : 8
 Kelkaj vortoj pri la ĉina klasika poezio 8 : 21
 La dramo “Tetrinkejo” 8 : 26
 Popola artisto — Lao She 8 : 28
 Premio “Cent Floroj” 9 : 25
 En la Aŭtunmeza Festo (novelo) 9 : 32
 Kvar tajloroj (humuraĵo) 10 : 33
 Mao Dun kaj lia “Meznokto” 10 : 34
 Meznokto (fragmento) 10 : 37
 La baleto “Al la Luno” 10 : 40
 Danca konkurso 11 : 29
 Rifoj de edzonsopiro (popola rakonto) 11 : 32
 Poemoj
 Hejmen-reveno 12 : 23
 Antaŭ forveturo 12 : 23
 De vi mi estas fore 12 : 9



Nr. : pĝ.

Nr. : pĝ.

Travivaĵo sur la lago	12 : 30
Humuraĵoj	
Milda mallaŭdo	12 : 47
Kuko de Peĉjo	12 : 47
Ne estas ŝtonoj surface	12 : 47

MEDICINO, HIGIENO KAJ SPORTO

Ĉinio bridas kreskon de sia loĝantaro	2 : 11
La nombro de la loĝantoj de Ĉinio	2 : 13
Pri la naskolimigo en Shifang	2 : 13
Grava afero por la ĉinaj sportistoj	2 : 24
Shao Lingfang — ĉina specialisto pri ezofaga kancero	3 : 33
Ma Yanhong, nova gimnastika stelo	3 : 9
Eminenta altosalta trejnisto Huang Jian	4 : 32
Plej elstaraj sportistoj de Ĉinio	5 : 24
La Ĉina Virina Flugpilka Teamo en granda progreso	8 : 14
Kion mi vidis en la frenezulejo Anding?	8 : 40
Nutrado kaj kancero	9 : 41
La tradicia medicino de Ĉinio	11 : 5
La "Medikamenta Urbo" — mia hejmloko	11 : 9
Antikvaj popolaj terapioj de Ĉinio	11 : 12
Li nun estas en la aĝo de 142 jaroj	11 : 34

POPOLA VIVO

Sur la putobora ŝipo "Bohai n-ro 1"	1 : 17
Kiel mi edukis miajn infanojn?	2 : 33
Pri la reformo de la sistemo de geedzeco kaj familio en Ĉinio	3 : 11
Kial mi amas lin?	3 : 14
Kiel oni traktas kazojn de eksedziĝo?	3 : 17
60 jarojn en Beijing	5 : 29
En korto de Beijing	5 : 34
Juna generacio en progreso	6 : 7
Brogita ŝafajo de Beijing	8 : 33
Por havigi laboron al gejunuloj	10 : 2
Ili ricevis laboron	10 : 4
Pri la spezo de iu laborista familio	10 : 8
Ĉiuj prizorgas ŝin	12 : 34

HISTORIO, NACIECOJ KAJ HISTORIAJ OBJEKTOJ

EL ĈINA MODERNA HISTORIO

La fondiĝo de la Komunista Partio de Ĉinio	1 : 38
La Unua Kunlaboro inter Kuomintango kaj la Komunista Partio de Ĉinio	3 : 38
La Norden-Ekspedicia Milito	7 : 39
Kontraŭrevolucia Puĉo de "la 12-a de Aprilo"	9 : 37
La Nanchang-a Leviĝo	11 : 50

EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ

Vojaĝo en Diexi	1 : 36
Mongola geedziĝa ceremonio	3 : 19
Gejunula rajdludo de kazaĥoj	5 : 48
Gastado en ŝe-a vilaĝo	7 : 37
Kantofesto de la ĝuang-oj	9 : 35
Ŝanĝiĝo de Ĝino-regiono	11 : 48

HISTORIAJ OBJEKTOJ

La kaverno de Maijishan-monto	2 : 42
Antikva tombo kun freskoj	4 : 46
Antikvaj pentraĵoj en la Muzeo de Imperiestra Palaco	6 : 42
Fosilioj de prahomoj eltrovitaj en Ĉinio	8 : 44
Qufu — naskoloko de Konfuceo	10 : 46
Imperiestra gvardio antaŭ 2,100 jaroj	12 : 50

POR LA 30-JARA JUBILEO DE EPC

Retrospektivo kaj perspektivo	5 : 2
30 jarojn kune kun EPC	5 : 3
Gratulo al la 30-a datreveno de la fondiĝo de El Popola Ĉinio	5 : 5
Grava ŝanĝo al El Popola Ĉinio	5 : 6
El popolo al popolo	5 : 7
Kion "El Popola Ĉinio" signifas por nederlanda leganto?	5 : 8
Tutkora gratulo	6 : 13
Gratulon al vi, ĉinaj geamikoj	7 : 7
Koraj gratuloj kaj bondeziroj	7 : 8
Kunveno de Beijing-aj esperantistoj	8 : 2
EPC kaj Ĉinio ekfloras	8 : 4





Nr. : pĝ.

Nr. : pĝ.

TRA ĈINIO

Havenurbo Ningbo en konstruado	2 : 39
Antikva urbo Quanzhou	4 : 42
Nova industria urbo Xiangfan	6 : 37
Baotou — Ŝtala urbo sur la stepo	8 : 42
Nanĵing — antikva kaj juna urbo	10 : 30
Vojaĝo al Yangzhou	12 : 24

VIDINDAJ LOKOJ

La kvar mirindaĵoj de la monto Huangshan	1 : 22
La montaro Tianshan	2 : 25
Ĉinaj akvofaloj	3 : 22
Yandang-montoj	4 : 29
La Sep Steloj-rokoj	5 : 26
Pejzaĝoj de Tibeto	6 : 25
Hainan-insulo	7 : 25
Muzeo de bambuoj	8 : 24
Jiuzhaigou	9 : 27
Ok vidindeĵoj de Beijing	10 : 22
Vojaĝo al la ŝtona arbaro de Lunan	11 : 27
Vintro en Jilin	12 : 27
En la hejmloko de orharaj simioj	11 : 44
Vojaĝo al la Orienta Insulo	12 : 38

INTERNACIAJ PROBLEMOJ KAJ AMIKECO

Pri la perspektivo de energio en la mondo	1 : 9
Pri la nombro de la mondaj loĝantoj	2 : 9
La perspektivo de la monda ekonomio en la okdekaj jaroj	6 : 17
La plej granda kontribuo de kamarado Tito	7 : 4
Kiu estis la unua vojaĝisto al Meksikio?	5 : 50
Memore al la granda muzikisto Ŝopeno	6 : 48
Verda urbo Varsovio	7 : 36
Ĉinio rigardata de eŭropano antaŭ 700 jaroj	9 : 39
Albert Einstein — ŝerce kaj serioze	10 : 20
Memorinda operacio	2 : 31
Amikeca floro sur fluoresko-ekrano	4 : 5
En Ĉinio	4 : 9

La monda boksa ĉampiono Muhammed Ali en Beijing	4 : 49
Pri edziniĝo de Huan Huan	6 : 45
Rememorante mian unuan viziton al Ĉinio	8 : 5
La statuo de antikva bonzo Jianzhen en Ĉinio	8 : 36
Jianzhen	8 : 38
Kiel mi vidis antikvan kaj novan Ĉinion	10 : 18
Majstroj de la Pariza Opera Teatro en Beijing	10 : 42
Gastado ĉe jugoslavaj amikoj	11 : 38
Kara gasto el Ĉinio	11 : 39
Mi amas mian ĉinan patrinon	12 : 42

TRA LA MONDO

La nacia plado de Nederlando	1 : 44
Pluva arbo	1 : 44
Interesaj manieroj de saluto	1 : 44
Plej gigantaj konstruaĵoj de la mondo	1 : 45
La insularo en fandiĝo	3 : 46
Kuriozaj monoj; Etiketo de Nepalo; Ŝtonboatoj	3 : 48
La Ĝeneva Nokto de Eskalado	5 : 52
Urbo de alumetoj; parko de vulkano	5 : 53
Interesa sveda urbo Uppsala; Karnavalo en GFR; Humuro de Gabrovo	7 : 42
Blazono de Varsovio; Legendo pri Sireno; Bov- sanga vino de Eger	9 : 46
Antikva miraklo de Filipinoj; Fianĉiĝo per glaso da kafo	9 : 47
Tetrinkado en diversaj lokoj	11 : 43

KALEJDOSKOPO KAJ ALIAJ

“Lazura Jada Maro”	2 : 44
Interesaj neĝleporoj	4 : 50
Vivipovo de antikva lotussemo; Duonfiŝoj	4 : 51
Kurioza papili-pokalo; La reĝo de la arboj	6 : 36
Rara birdo — Bonazio	7 : 47
Sukcesis operacio por amputi parazititan kapon; Blanknaĝila delfeno; Plado de vivanta karmo	8 : 35
Papilio-frukta arbo — oledona arboreĝo de mon- toj; Pri kornobeka birdo	10 : 45
Cigna Lago de Xinĵiang; Areko en Ĉinio; S’mio- paŝtisto	12 : 44



FOTOJ PRI NATU- RAJ BELAĴOJ FA- RITAJ DE E-ISTOJ


Restajo de la Domo de Ak-
celo de Industrio en Hiroŝima
post eksplodo de la atombom-
bo

de FUSACUGU KIDO (Japanio)

Pandoj de Guangzhou gastis en Japanio


Por memori pri la unua datreveno de la fon-
diĝo de amika rilato inter la ĉina urbo Guangzhou
kaj la japana urbo Fukuoka, direktoro de la Fu-
kuoka Urba Zoologia kaj Botanika Ĝardeno s-ro
Mori Singo, nia malnova leganto en Japanio, spe-
ciale venis al Ĉinio je la fino de marto kaj reportis
per aviadilo pandojn Shanshan kaj Baoling de
Guangzhou kiel gastojn al Fukuoka.

Dum aprilo kaj majo, la du pandoj intervidiĝis
kun pli ol 870,000 japanoj bone plenumante sian
mision. Post ilia reveno al Guangzhou oni trovis,
ke ili eĉ iom plipeziĝis dank' al bona prizorgo de
japanaj amikoj. La foto montras, ke s-ro Mori
Singo kaj Baoling salutas unu la alian.




Muzeo de Argilaj Militistaj kaj Ĉevalaj Imperiestro de Qin-dinastio

Parto de la muzeo



Figuroj de la Unua


Fotoj de WANG JINGREN
kaj REN REN



Argilaj militistoj



Argilaj militistoj en malpeza militista robo kaj kun vandoj ĉirkaŭ la kruroj antaŭ argilaj ĉevaloj



Militisto kaj ĉevaloj



815 IV

